

# El Popola Ĉinio

V-19034/1959

人民中國報道



1959

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO






## PEKINO JUNIĜAS

En la pasintaj 10 jaroj, konstruigis en Pekino 27,000,000 kubmetroj da novaj loĝejoj, fabrikoj, lernejoj, hospitaloj ktp., kiuj egalas al la tuta konstru-areo de la malnova Pekino kaj faras la antikvan ĉefurbon pli juna kaj pli bela

1. Tri el la salonegoj de la Tutlanda Agrikultura Ekspoziciejo.
2. Novaj konstruaĵoj apud Bejhaj-parko.
3. La centra stadiono de la Laborista Sportejo havas sidlokojn por 80,000 rigardantoj.
4. La nova Pekina fervoj-stacio konstruita en 10 monatoj havas 19 salonegojn por gastigi samtempe 14,000 pasaĝerojn.
5. La Ĉina Historia Muzeo kaj la Historia Muzeo de la Ĉina Revolucio.
6. La Popola Halo, kies aŭditorio havas sidlokojn por pli ol 10,000 personoj, estas finkonstruita en 10 monatoj same kiel la du Historiaj Muzeoj.
7. Jen estas la malnova aspekto de Tian-anmen-placo en 1958. Anstataŭ la malnovaj domoj ambaŭflanke de ĝi, nun staras la domegoj de la Popola Halo kaj la historiaj muzeoj.

*(Daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo)*



# La bela sonĝo de la homaro

## efektivigōs

El popola Ĉinio ni salutas niajn karajn legantojn en ĉiuj landoj.

Forpasos tuj la jaro 1959.

Ĝi estas jaro neordinara.

Ĝi estas jaro, en kiu la forto por paco kreskas tiel kiel oni kredeble povas batalakiri pligrandan malstreĉon de la internacia situacio.

Ĝi estas jaro, en kiu la Ĉina Popola Respubliko celebris sian dekjaran feston per sia daŭriga grandioza antaŭensaltado.

Kaj plie, ĝi estas Jaro Zamenhofa!

### EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto  
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

#### Enhavo de N-ro 6 (57), 1959

*Bildo sur la kovrilo — Ĝojo de Abunda Rikolto* (Pentris Jang Ven-hiu)

**Grandioza jardeko**

**Vivu la popola komunumo**

**La Ŝanhaja Fabriko de Maŝinfabrikiloj**

**Samaj trosekecaj katastrofoj kun malsamaj rezultoj**

**Feliĉa familio**

**Mia verkista vivo en lastaj dek jaroj**

**Popola Ĉinio ĉie havas amikojn**

**La semoj de korea panjo**

**Simplaj kaj belaj fajencoj**

**Defendu pacon!**

**Antaŭparolo de "Ĉina Antologio"**

**Alilandaj literaturoj elesperantigitaj en Ĉinio**

*Bildo sur la dorsa kovrilo — Riĉa Rikolto de Rizo kaj Kotonono* (Pentris Sun Vej)

D-ro L. L. Zamenhof estas unu el la bonkoraj grandaj filoj de la homaro. Malfeliĉe li vivis en la epoko, kies atmosfero estis venenigita de imperiismo kaj milito. Li forpasis de la homa mondo ne ĝisvidinte la sendependecon kaj liberiĝon de sia patrio — Pollando.

Estu benata eterne D-ro Esperanto! Li havis sanktan idealon kaj fortegan volon por interfratiĝo de la popoloj dividitaj jam de jarcentoj, por kies efektiviĝo li dediĉis sian vivlongan diligentan laboron kaj tutan genian saĝon.

Kiel kreanto de internacia helpa lingvo li sukcesis nedisputeble. Sed kiel batalanto por la alta celo kunligi la tutmondajn popolojn, bedaŭrinde, li fiaskis.

La historio de la jarcento post la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof plene pruvis, ke tio, kio kaŭzas disdividecon kaj militojn inter la popoloj estas la socia sistemo en kiu oni sin riĉigas je la kosto de la feliĉo de la plejmulto. Ĉi tiu sistemo en la nuna mondo koncentriĝe montriĝos en imperiismo kaj koloniismo. La imperiistoj kaj koloniistoj, por la intereso de plenmano da monopolaj kapitalistoj, dissemas malamikecon kaj disdividecon inter la nacioj. Tio estas la vera kaŭzo malhelpi la reciprokan komprenon kaj amikiĝon inter la diversaj popoloj. Rilate diversecon de la naciaj lingvoj oni povas diri, ke ĝi grandigas objektive la malfacilon por interpopolaj amikaj kunlaboroj, sed ne estas la ĉefa kaŭzo de la disdivideco inter la popoloj.

Malgraŭ tio, la tuta vivo de Zamenhof kaj lia klopodado spegulas la bonkoran volon kaj altan celon de la tuta homaro en ĉi tiu jarcento, ke la nuna stato de la homa socio devas esti ŝanĝita, la progresaj kaj diligentaj popoloj en diversaj landoj devas esti unuigitaj en unu grandan rondon familian, la malhelpoj barantaj la vojon al la antaŭeniranta homaro devas esti forbalaitaj kaj la kaŭzoj de popola disdividiteco kaj militoj devas esti forigitaj.

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante*

*Ni iru la vojon celitan!*

*Eĉ guto malgranda, konstante frapante,*

# GRANDIOZA JARDEKO

*Jene estas traduko de speciala artikolo de Ĉefministro Ĝoŭ En-laj, publikita en "la Popola Tagĵurnalo" je la 6-a de oktobro.*

— La Red.

**K**IAM la Ĉina Popola Respubliko festas la dekan datrevenon de sia naskiĝo, ĉiuj homoj tra la mondo, kian ajn politikan opinion ili havas, ne povas nei, ke vere mondskuaj ŝanĝiĝoj okazis en Ĉinio. La ĉina popolo transformiĝis el sklavoj de surtera infero en sentimajn mastrojn de sia propra sorto: La tuta nacio rerigardas kun ĝojplena koro la jam akiritajn grandajn venkojn kaj samtempe antaŭenrigardas kun plena fido al la estonteco.

Ni vidu, kiajn ŝanĝiĝojn Ĉinio efektive travivis, dum la jardeko, kial ili okazis kaj kiajn ĉefajn instruojn oni povas tiri el ili.

Kiel ĉiuj scias, antaŭ dek jaroj Ĉinio estis lando, ekonomie ekstreme postrestinta. Tiutempe, Ĉinio okupis la 26-an lokon en la monda ŝtalproduktado, la 25-an en elektroproduktado; pli alte en karboproduktado, la 9-an, eĉ en la relative pli disvolviĝinta ŝpinindustrio — kotonfadena produktado ne pli antaŭan ol la 5-an. Nombriĝis la industriaj laboristoj tra la tuta lando nur tri milionoj, malpli ol 0.6 procentoj el la tuta loĝantaro. La malnova, vasta Ĉinio konata de longe

kiel lando agrikultura, devis importi ĉiujare tritikon, rizon kaj kotonon dum dekoj da jaroj antaŭ la Liberiĝo. Laŭ la statistiko de la doganejo, estis importitaj da grenoj 6,000 milionoj da ĝinoj (= 3 milionoj da tunoj — red.) en 1933, kaj da kotono 6,900,000 danoj (345,000 tunoj — red.) en 1946. Dum longa tempo la eksterlanda komerco havis malfavoran bilancon, kaj la ŝtata buĝeto suferis deficiton jaron post jaro. Dum la periodo de dekdu jaroj ekde la komenco de la Kontraŭ-japana Milito en julio 1937 ĝis majo de 1949, la reakcia Kuomintang-a registaro pliigis la kvanton de sia papermono je pli ol 140,000 milionoj da obloj, kaj la varprezo leviĝis je pli ol 8,500,000 milionoj da obloj.

Tiel mizere tiutempe statis Ĉinio, ke la ŝtata sekretario de Usono George C. Marshall en sia deklaro, legita al la Kongresaj Komitatoj por Eksterlandaj Aferoj kaj Eksterlandaj Rilatoj en plenuma sesio en februaro 1948, devis rekoni ke la senĉesa elversado de helpoj de Usono ne povas savi Ĉinion el ĝia ekonomia krizo; kaj li asertis ke "mankas al Ĉinio krudmaterialoj kaj industriaj

---

*Traboras la monton granitan,  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco —  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.*

Kiel prikantis Zamenhof, per l' espero, l' obstino kaj la pacienco la homoj senĉese antaŭen marŝas, senĉese forigas la vojbarantajn malhelpojn, kaj fine oni rompas la mallumon kaj brilas en la oriento mildaj sunradioj, sub tiuj sunradioj, milionoj da popolanoj de malsamaj rasoj kaj malsamaj religiaj kredoj unuiĝos en unu fratan grandan familion en kiu troviĝas nek nacia disdividiteco, nek rasa malamikeco. Oni diligente laboras por krei belan estontecon por si mem kaj ankaŭ heroe batalas por sin defendi kaj subteni la fratojn ankoraŭ subprematajn.

Karaj legantoj, permesu nin informi al vi ĝojigan novaĵon el popola Ĉinio: Ni jam plenumis la antaŭensaltajn celojn de la ĉefaj produktoj industriaj kaj agrikulturaj por 1959. La popola komunumo pli fortikiĝas kaj disvolviĝas. Sub brila standardo de Maŭ Ze-dong nia tuta popolo nun kun sia tuta forto kaj alta celo faras ĉion eblan por pli granda antaŭensalto en venonta jaro. Ŝanĝinte siajn postiĝintajn fizionomiojn ekonomian kaj kulturan, popola Ĉinio fariĝos granda forto por defendi la mondpacon kaj por la interfratiĝo de tutmondaj popoloj. La interfratiĝo de la tutmondaj popoloj certe venkos la militforton de la imperiistoj kaj la kolonian sistemon kaj alportos al la tuta homaro senliman lumon kaj esperon. Jen estas la vojo nia.

La malamikoj de la paco ankoraŭ dissemadas disdividecon kaj malamikecon, ankoraŭ malhelpas

naturriĉaĵoj”, tial ke ne eblas al ĝi fariĝi en proksima estonteco unuaklasa potenco. En aŭgusto 1949 Dean Acheson, la sekvinta ŝtata sekretario post Marshall, en sia letero al Usona prezidanto Truman mokis “la promesojn” koncerne al “solvido de nutra problemo de la popolo” faritaj de la Ĉina Komunista Partio, kaj antaŭdiris, ke super tiu ĉi problemo neniu ĉina registaro sukcesos.

Sed jam en junio 1949, k-do Maŭ Ze-dong solene deklaris en la inaŭgura ceremonio de la Prepara Komitato de la Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco: “La ĉina popolo vidos, ke, tuj kiam la sorto de Ĉinio estas en la manoj de la popolo, Ĉinio lumigos la teron per siaj brilantaj radioj, kiel la leviĝanta suno en la oriento, rapide forlavos la kotajon postlasitan de la reakcia registaro, resanigos la militajn vundojn kaj elkonstruos novan, fortan kaj prosperan popoldemokratian respublikon de Ĉinio, kiu estos vere tia kiel nomata.”

Kies antaŭdiro fariĝis veraĵo?

Laŭ la alĝustigitaj planitaj ciferoj por 1959 (ties ĉefaj celoj, antaŭvideble jam nun, estos superplenumitaj) nia tuta produktvaloro de industrio kaj agrikulturo estos 5.3 obloj de tiu de 1949, en kiu la valoro de industria produkto estos 11.7 obloj. La produkto de ŝtalo atingos la 12 milionojn da tunoj, 76 oblojn de la 158,000 tunoj de 1949; karbo 335 milionojn da tunoj, pli ol 10 oblojn de la 32,430,000 tunoj de 1949; elektro 39,000 milionojn da kilovat-horoj, pli ol 9 oblojn de la 4,310 milionoj da kilovat-horoj de 1949; kotonŝpinaĵo 8.2 milionojn da pakajoj 4.5 oblojn de la 1.8 milionojn da pa-



la interfratiĝon de la popoloj. Ili vane klopodos. La popoloj vekigintaj neniam plu estos trompeblaj de la demonoj. Ili povos per siaj propraj fortoj krei mondon pacan kaj interfratiĝan inter ĉiuj nacioj.

Frostan vintron anstataŭos fine la milda printempo. Por krei belan mondon homaran nia laboro ĵus komencas. Ni do ripetu la famajn versojn de Zamenhof:

*Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos,  
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.*

Bonvenigante la jaron 1960 plena de esperoj, ni sendas al niaj karaj legantoj la plej bonajn dezirojn!

— La Red.

kajoj de 1949. En la jaro 1958, niaj produktoj de ŝtalo, karbo, elektro kaj kotonŝpinaĵo jam antaŭensaltis al la 7-a, 3-a, 11-a kaj 2-a lokoj respektive en la mondo. Por proksimume cent jaroj malnova Ĉinio entreprenis konstruadon de modernaj industrioj sed ĝis 1949 ĝia fiksa posedaĵo sumis entute ne pli ol 13,000 milionojn da juanoj; sed en dek jaroj de nova Ĉinio la nove aldonitaj fiksaĵaj posedaĵoj jam atingis proksimume 45,000 milionojn da juanoj. La elektra industrio de malnova Ĉinio, evoluinta jam preskaŭ 70 jarojn, havas produktan kapaciton nur de malpli ol 1.9 milionoj da kilovatoj en 1949; en dek jaroj de nova Ĉinio la nove pliigita produkta kapacito superis tri oblojn de tiu cifero. En malnova Ĉinio la produkta kapablo de ŝtalo post proksimume 60-jara disvolvado de la fer- kaj ŝtal-industrio atingis en 1949 nur malpli ol milionon da tunoj jare; en dek jaroj de nova Ĉinio sole la nove pliigita kapablo de jara ŝtalproduktado estas pli ol 10 obloj de tiu cifero.

La imperiistoj mokridis pri nia alĝustigita plano de 1959 kiel “granda retrosalto”. Kiel ĉiuj scias, 1958 estas jaro de speciale granda antaŭensalto de industria kaj agrikultura produktado en nia lando, kun konfirmata produktvaloro de industrio je 66% pli granda ol tiu de 1957. La alĝustigita celcifero por industria produktvaloro por 1959 estas ankoraŭ je 25.6% pli granda ol tiu de 1958, la jaro de speciale granda antaŭensalto. Estas evidente ke tio estas plua granda antaŭensalto sur la bazo de speciale granda antaŭensalto. La rapidecon de tia antaŭensalto ja neniu imperiista lando kuraĝas imagi eĉ sonĝe. Ni komparu nian rapidecon de disvolviĝo kun la du ĉefaj imperiistaj landoj. En la 9 jaroj de 1950 ĝis 1959, nia industria produktvaloro meznombre kreskis ĉiujare je 28%, dume tiu de Usono je 3.7% kaj de Britio je 2.9%. En 1958, la jaro de speciale granda antaŭensalto de nia industrio, la industria produkto de Usono malkreskis je 6.5% kaj en Britio je 0.9%, kompare kun la antaŭa jaro. Se nia rapideco estas nomata “granda retrosalto”, kiel estu nomata la ilia?

Por bagateliĝi la grandan signifon de nia granda antaŭensalto kapitalistaj komentariistoj elmetis ankaŭ alian sofisman argumenton dirante, ke la alta rapideco de disvolviĝo de Ĉinio eblas nur pro tio, ke ĝia origina nivelo estis tre malalta. Sed kia estas la fakto? Nia rapideco de disvolviĝo manifestiĝis ne nur en la procento de ĉiujara meza kreskado, sed ankaŭ en ĝia absoluta kvanto. Nia jara produkto de ŝtalo estis 158,000 tunoj en 1949 kaj atingos 12 milionojn da tunoj en 1959, t. e. kresko de 11,842,000 tunoj en dek jaroj, kiu prok-

simume egalas al la kvanto kreskinta en la 29 jaroj, de 1872 ĝis 1901 en la historio de Usono, aŭ en la 67 jaroj de Britio de 1869 ĝis 1936. Kial Usono kaj Britio ne povis progresi siatempe kun sama rapideco de antaŭensalto kiel faras nun Ĉinio? Kian argumenton nun vi, burĝaj sofistoj ankoraŭ povas prezenti por pravigi la limakan rapidecon de disvolviĝo de kapitalismaj landoj?

Rezulte de tiel rapida disvolviĝo de industrio, speciale de la peza industrio, okazis al la strukturo de nia nacia ekonomio okulfrapa ŝanĝiĝo. La tuta produktvaloro de industrio ampleksis 30% de la totala produktvaloro de industrio kaj agrikulturo en 1949, kaj tiu de la produktaj materialoj ampleksis 26.6% de la totala industria produktvaloro. En 1958 ili kreskis ĝis 63.6% kaj 57.3% respektive. Nun ni mem jam komencis produkti ĉirkaŭ 500 tipojn de ŝtalo kaj 6,000 tipojn de rulpremita ŝtalo, multajn novajn tipojn de pezaj metaltranĉaj maŝinoj, 2,500-tunajn hidraŭlikajn forĝajn premmaŝinojn, kompletajn ekipaĵojn por karboelminado kaj koaksproduktado, ekipaĵojn por granda altfornego kun volumeno de pli ol 1,500 kubmetroj, jetojn, diverstipajn aŭtomobilojn, traktorojn, oceanajn ŝipojn kun ŝarĝkapacito de 5,000 tunoj, 72,500-kilovatajn hidroelektrajn ekipaĵojn kaj tiujn termoelektrajn de 50,000-kilovatoj, kompletajn ekipaĵojn por ŝpin-teksado, paperfarado kaj sukerrafinado ktp. Okulfrapa ŝanĝiĝo okazis ankaŭ al la geografia dislokigo de industrioj. La fera kaj ŝtala industrioj antaŭe koncentriĝis pli ol 90-elcente en nordorienta Ĉinio; nun en ĉiuj provincoj, urbegoj kaj aŭtonomaj regionoj estas starigitaj ferŝtalaj bazoj kun variaj skaloj kaj en variaj nombroj, escepte Tibeton. Elektrejoj koncentriĝis estinte nur en malmultaj, grandaj urboj kaj industria bazoj; nun en ĉiuj urboj grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj tra la tuta lando kaj eĉ en certaj vilaĝoj troviĝas elektrostacioj kun variaj grandecoj. La ŝpinteksa industrio en la pasinteco koncentriĝis ĉefe en la urboj Ŝanhajo, Kingdaŭ, Tiangin kaj Vuhi; nun multaj modernaj ŝpinteksejoj estas starigitaj en plejparto de ĉinaj provincoj. En la antaŭe senhomaj regionoj de interna Mongolio, Hingiang, Kinghaj, Gansu kaj en urboj kun malmulta loĝantaro nun estas konstruitaj grandaj industria bazoj. Ĉiuj tiuj faktoj montras ke la fundamento de industriigo de nia lando estas starigita. Nenia forto en la mondo povos malhelpi, ke nia lando disvolviĝos en ne tro longa tempo en prosperan kaj riĉan, fortan, grandan landon industran.

Disvolvante industrion, ni ne forgesis disvolvi agrikulturon. En dek jaroj, la totala jara produktvaloro de nia agrikulturo kreskis je 1.5 obloj

pli ol antaŭe. La grenprodukto atingos 550,000 milionojn da ĝinoj (= 275 milionoj da tunoj — red.) en 1959 kun pliigo de 1.5 obloj kompare kun la 216,200 milionoj da ĝinoj (= 108.1 milionoj da tunoj — red.) de 1949; la kotono atingos 46.2 milionojn da danoj (=2.31 milionoj da tunoj — red.) kun pliigo de 4.2 obloj kompare kun la 8.89 milionoj da danoj (= 444,500 tunoj — red.) de 1949. Nia jarprodukto de grenoj jam ekokupis la unuan lokon en la mondo ekde 1952, kaj tiu de kotono okupis la duan lokon en la lasta jaro. Certe, laŭ pokapa kalkulo nia agrikultura nivelo restas, same kiel la industria, ankoraŭ tre malalta. Sed la ĉefpunkto de la demando estas la rapideco de disvolviĝo. Kvankam nia lando disponas ankoraŭ tre malmulte da agrikulturaj maŝinoj kaj kemiaj sterkoj, dum Usono disponas ilin multoble pli ol ni, sed de 1949 ĝis 1958, la pliigo de grenprodukto de nia lando estis 130%, dum tiu de Usono estis nur 25%; pliigo de kotonprodukto nia estis 372%, dum la kotonprodukto de Usono malkreskis je 28%.

En la kamparo fundamenta konstruado rapide progresas. En la komenca tempo post la Liberiĝo, la irigacia areo sumiĝis nur 240 milionoj da muoj (= 16 milionoj da hektaroj — red.) tra la tuta lando; dank' al multnombraj konstruaĵoj akvomastromaj kaj akvorezervaj, faritaj dum la dek pasintaj jaroj, la irigaciata areo nun sumiĝas pli ol 1,000 milionoj da muoj (= 66.667 milionoj da hektaroj — red.). Starigitaj en vilaĝoj estas ankaŭ multnombraj malgrandaj fabrikoj, kiuj ĉefe priservas la agrikulturon. La kun agrikulturo intime rilatantaj arbarkulturo, bestbredado, flankokupadoj kaj fiŝkulturo ankaŭ disvolviĝis rimarkeble. De 1949 ĝis 1958, entute 500 milionoj da muoj da tero estas nove forsitaj, la nombro de bredataj ŝarĝbrutoj kreskis de 60 ĝis 85 milionoj, kaj tiu de porkoj kreskis de pli ol 57 ĝis 160 milionoj.

Konforme al la disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo multe disvolviĝis ankaŭ la komunikado kaj transportado. La tuta longeco de funkciaj fervojoj de nia lando en 1949 ankoraŭ ne atingis 22,000 kilometrojn, sed en 1958 ĝi superis 31,000 kilometrojn. Nun, krom Tibeto, en ĉiuj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj tra la tuta lando funkcias fervojoj. Dume, landvojoj etendiĝis ĝis 400,000 kilometroj de la antaŭaj 80,000 kilometroj. Civilaj aviadlinioj de nia lando en 1950 longis entute nur iom pli ol 11,000 kilometrojn, sed en 1958 kreskis ĝis 33,000 kilometroj. En la naŭ jaroj de 1949 ĝis 1958 la fervoja frajttransportado kreskis dekoble, la aŭtomobila transportado pli ol 27-oble, kaj vaporsipa kaj trenŝipa transportado, pli ol dek-oble. La frajttransportado de lignoboatoj,

brutaroj kaj aliaj nemekanikizitaj veturiloj ankaŭ rimarkeble kreskis. En la naŭ jaroj estas plenumitaj multaj gigantaj konstruprojektoj, ekzemple, la fervojoj Ĉengdu-Ĉongking-a, Baŭgi-Ĉengdu-a, Jingt'an-Hiamen-a, Tiansŭj-Lanĝou-a, Baŭtoŭ-Lanĝou-a, la Jangzi-rivera Ponto ĉe Vuhan, la landvojoj Kinghaj-Tibeta, Hikang-Tibeta, Hingiang-Tibeta kaj aliaj. Estas nun konstruataj la fervojoj Lanĝou-Hingiang-a, Siĉuan-Gujĝou-a, Nejgiang-Kunming-a, Hunan-Gujĝou-a kaj kelkaj grandaj pontoj super Jangzi-rivero kaj la Flava Rivero. Dank' al la grandnombra konstruado de simplaj aŭtovojoj en 1958, 97% el la guberniaj urboj en la tuta lando jam estis atingeblaj per aŭtoj. Rapide kreskis ankaŭ poŝtaj kaj telegrafaj servoj kaj radio-disaŭdigoj. La sumo de poŝtaj kaj telegrafaj oficejoj en la tuta lando kreskis de pli ol 20,000 en 1949, ĝis pli ol 60,000 en 1958. Kaj 98% el la popolaj komunumoj estas komunikeblaj telefone. La kvanto de detala vendado en 1958 estis 3.2 obloj de tiu en 1950. Kompare kun 1950 la kresko en vendkvanto de la ĉefaj konsumajoj estis: grenoj je 62%, manĝeblaj vegetalaj oleoj — 97%, salo — 94%, sukero — 300%, akvaj produktaĵoj — 240%, kotona ŝtofo — 120% kaj maŝinfabrikita papero — 270%. Dank' al la daŭre kreskanta provizado de konsumajoj, la plena elimino de spekulacio, la ekvilibro de ŝtataj buĝetoj en- kaj el-spezaj kaj de la bankaj kreditoj, la varprezoj en nia lando ekde 1950 estas ĉiam stabilaj. Certaj alĝustigoj estis laŭplane faritaj nur al rilataj prezoj inter industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj.

Multe ŝanĝiĝis ankaŭ nia komerco kun eksterlandoj en lastaj 10 jaroj. La rajto de administrado de doganejoj estis reprenita el la manoj de la imperiistoj tuj post la venko de nia revolucio en 1949, Komencas ŝanĝiĝi ankaŭ la malfavora situacio de la longe ekzistanta eksceso de importoj super eksporto. En 1958, la totala sumo de importoj kaj eksporto pli altiĝis je 2.1 obloj, en kio la importoj plialtiĝis je 1.9 obloj, kaj eksporto — 2.3 obloj, kompare kun 1950. Fundamente estas ekvilibritaj la importoj kaj eksporto. Kontraŭe al la stato antaŭ la Liberiĝo, kiam la importoj estis ĉefe konsumajoj, nun pli ol 90% de la importitaj varoj estas rimedoj de produktado kiel maŝinoj, krudmaterialoj kaj aliaj materialoj. Tio ludis grandan rolon en la ekonomia konstruado de nia lando. Niaj eksportoj restas ankoraŭ ĉefe agrikulturaj produktaĵoj, tamen la proporcio de industriaj produktaĵoj paŝo post paŝo kreskis de 9.3% en 1950, ĝis 27.5% en 1958.

Kiel kamarado Maŭ Ze-dong anticipis: "Sekve de la alveno de alta tajdo de ekonomia konstruado aperos neeviteble alta tajdo de kultura

konstruado." Ekde 1949 ĝis 1958, la nombro de lernantoj en altaj lernejoj kreskis de 117,000 ĝis 660,000, kun pliigo de 4.7 obloj; en mezgradaj fakaj lernejoj de 229,000 ĝis 1,470,000 kun pliigo de 5.4 obloj; en ĝeneralaj mezlernejoj, de 1,040,000 ĝis 8,520,000, kun pliigo de 7.2 obloj; en elementaj lernejoj, de 24,400,000 ĝis 86,000,000 kun pliigo de 2.5 obloj. Fundamente universaligis la elementa edukado en multaj gubernioj kaj urboj en 1958, kaj 85% de la lernaraj geknaboj registriĝis en lernejoj. Multe disvolviĝis ankaŭ la analfabetelikvida kampanjo kaj postlabora klerigado inter la oficistoj, laboristoj, kamparanoj kaj urbaj loĝantoj. La politiko de l'Komunista Partio "eduko en servo al la politiko de proletaro kaj kombino de eduko al produkta laboro" estas plene efektiviĝinta en diversgradaj lernejoj, kaj tiel profunde disvolviĝis la socialisma revolucio en la eduka fronto.

Sciencaj esploroj ege disvolviĝis en lastaj 10 jaroj. Ĝis la fino de 1958 en la tuta lando troviĝis pli ol 840 specialaj natursciencaj kaj teknikaj institutoj kaj pli ol 32,000 sciencesploraj laborantoj, kun kresko de proksimume 20 kaj 50 obloj, respektive, kompare kun la tempo ĉe la Liberiĝo en 1949.

Dum la sama periodo, granda kresko okazis ankaŭ en la kampoj de eldono, filmo, teatro kaj ceteraj artoj.

Same rapida estas la disvolviĝo de sanitaraj laboroj dum la lastaj 10 jaroj. En 1958, troviĝis pli ol 5,600 hospitaloj, kaj sanatorioj kun 440,000 litoj por malsanuloj en la tuta lando, kun kresko de pli ol 4 obloj ol en 1949. Krome nove instaliĝis pli ol 900,000 simplaj litoj por malsanuloj en malgrandaj urboj kaj vilaĝoj. La higiena teknika laborantaro nombriĝis en 1958 2,160,000, kun kresko de 1.8 obloj kompare kun 780,000 en 1950.

Kun la disvolviĝo de konstruado en ĉiuj kampoj, la vivonivelo ambaŭ materia kaj kultura de la popolamasoj multe leviĝas. Tiun ĉi faktan plene manifestis la suprecitata kresko de detala vendado kaj disvolviĝo de edukaj kaj sanitaraj laboroj. En 1949, la laboristoj kaj oficistoj en diversaj entreprenoj, institucioj kaj ŝtataj administracioj nombriĝis 8 milionoj, sed ĝis la fino de 1958 ilia nombro jam atingis pli ol 45 milionojn, t. e. kresko de 4.7 obloj; inter kiuj la nombro de la industriaj laboristoj kreskis de 3,000,000 ĝis 25,600,000, t. e. 7.5 obloj pli ol antaŭe. Ne nur plene malaperis la fenomeno de senlaboreco postlasita de la malnova Ĉinio, sed ankaŭ rimarkeble plivastiĝis la sfero de okupiĝo. Meznombro du el ĉiu kvino el la urbaj loĝantoj ricevis laboron. De 1949 ĝis 1958 la meza salajro

de la oficistoj kaj laboristoj kreskis ĝis pli ol duoblo kaj la persona enspezo de la kamparanoj proksimume duobliĝis. La nombro de oficistoj kaj laboristoj ĝuantaj laborasekuron kreskis de 600,000 en 1949 ĝis 13,780,000 en 1958. La plejparto de la kamparanoj nelaborkapablaj ĝuas senpagan manĝadon aŭ provizadon de grenoj, de post la aliĝo de la kamparanoj en la lando al la popolaj komunumoj. La antaŭa malfacila vivo, en kiu ili devis ĉagreniĝi pro necerteco de nutraĵo, baldaŭ fariĝos historia memoro.

Al la konstruado en regionoj loĝataj de naciaj malplimultoj la ŝtato donas grandan atenton. De 1950, ĝis 1958, la investo de la ŝtato en tiuj regionoj sumiĝis pli ol 7,000 milionoj da juanoj. En multaj regionoj de naciaj malplimultoj nun konstruiĝis novaj industriaj bazoj, fervojoj kaj landvojoj. La totala produktvaloro industria de tiuj regionoj en 1958 egalas al dek obloj de tiu en 1949, la produkto de grenoj kaj bredata brutaro ankaŭ kreskis pli ol unu oblo kompare kun 1949. La kvanto de varvendoj de ŝtataj komercaj entreprenoj kaj kooperativoj en tiuj regionoj dum 1958 kreskis je 4.7 obloj pli ol en 1948, kaj de la aĉetoj je 5.2 obloj. La nombro de lernantoj nacimalplimultaj superis 9 oblojn de tiu antaŭ la Liberiĝo. Hospitaloj kaj sanatorioj jam nombriĝis 775 kun entute 34,000 litoj; krome troviĝis ankoraŭ pli ol 14,000 kuracejoj kaj sanitaraĵoj. La tendenco de ĉiam malpliigo de loĝantaro de naciaj malplimultoj en lastaj jarcentoj estas plene inversigita kaj aperis nova fenomeno de prosperado de ilia ekonomia kaj kultura vivo. Iom malsame statis en Tibeto, kie la demokratia reformo estis longe malhelpata antaŭe; sed post la subpremo de la ribelo, la popolo tie ankaŭ komencis energie antaŭenmarŝi al nova vivo. Oni ne bezonas longe atendi ĝis konstruiĝos feliĉa kaj prospera Tibeto.

Oni ja scias, ke antaŭ 10 jaroj la politika situacio en Ĉinio estis ekstrema malluma kaj reakcia. La lakeoj de la imperiistoj, t. e. la kompradoraj kapitalistoj, la feŭdaj bienuloj, la militaristoj, burokratoj, la lokaj despotoj kaj fisinĵoroj tiranis kaj ĝisoste ekspluatit la popolon rajdante sur ilia kapo. La vastaj popolamasoj troviĝis en stato de sklavoj havante nenian rajton. La popolo de multaj naciaj malplimultoj suferis krom la subpremado de imperiistoj kaj la nobeloj, bienuloj kaj sklavoposedantoj de sia propra nacio, ankaŭ la nacian subpremon de la han-naciaj regantoj. La lando longe restis displitita; dum kelkaj jardekoj sinsekvis imperiistaj invadmilitoj, intermilitoj de diversaj militaristoj, kontraŭrevoluciaj militoj komencitaj de la reakciaj regantoj, kaŭzante al la popolamasoj

multe da militsuferoj. Dum la Kuomintang-a reĝimo, ĉie impertinentis banditoj, friponoj, superstiĉaj kaj trompaj societoj kaj netolereble kaosis la sociordo.

Kia granda ŝanĝo fariĝis en ĉio dum la lastaj dek jaroj! Malaperis la koruptita putriĝinta registaraĉo, kiu pezis sur la kapo de la popolo, kaj ĝin anstataŭas honesta, laborema registaro vere servema al la popolo kaj sopirata de la popolo de generacio post generacio. Finiĝis por ĉiam la stato de senrajteco de la popolo; tre vastaj popolamasoj ĝuas ne nur leĝe, sed ankaŭ fakte, plej vastan demokratian rajton partopreni en la administrado de la publikaj oferoj de la lando. Malaperis la fenomenoj de nacia subpremado; nia patrolando fariĝas jam granda familio de tute egalrajtaj, amikaj kaj interhelpantaj nacioj. Realiĝas en la lando senprecedence firma unuiĝo, kaj estas tute eliminataj la banditoj, friponoj, superstiĉaj kaj trompaj societoj, prostituitinoj, almozuloj, hazardludejoj kaj narkotajoj. Bonordo regas en la socio. La vastaj amasoj firme unuiĝintaj, kun freŝa entuziasmo, alta batalspirito kaj ĝisĉiela laborenergio konstruas sian feliĉan vivon.

Oni ankaŭ bone scias, kian mizeran pozicion en la internacia politiko Ĉinio okupis antaŭ 10 jaroj. De multaj jaroj Ĉinio estis kolonia kaj duonkolonia lando. La imperiistaj potencoj rigardis nian landon kiel pecon da grasa viando, el kiu ĉiu rabis kion li povis. La imperiistoj Eŭropaj intencis distranĉi ĝin; la japanaj invadintoj volis ĝin engluti solaj; kaj en la jaroj 1937-1945 jam englutis preskaŭ duonon; post la dua mondmilito, Usono plene sin okupis por heredi la pozicion de la japanaj invadintoj. Kiel lando kun plej multnombra loĝantaro en la mondo, Ĉinio estis ne nur senigita de ĝiaj meritataj rajtoj en la monda politika vivo, sed ankaŭ preskaŭ senigita de la rajto decidi siajn proprajn aferojn.

Nun jam forpasis senrevene la malnova Ĉinio kolonia kaj duonkolonia. Aperis la nova popola Ĉinio sendependa kaj libera. Kiel kamarado Maŭ Ze-dong deklaris okaze de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko: "Nia nacio de nun enviciĝos en la granda familio de pacon kaj liberon amantaj popoloj de la mondo kaj laboros brave kaj diligente por krei sian propran civilizacion kaj feliĉon, kaj samtempe antaŭenpuŝos la pacon kaj liberon de la mondo." La malforteco de Ĉinio estas transanta al sia malo—forteco. Samtempe ankaŭ la senrajteco de Ĉinio en internaciaj aferoj ŝanĝiĝas al sia malo. Sur la tuta teritorio liberigita, Ĉinio plene praktikas sian suverenecon; kaj ĝi ankaŭ



nepre devas havi la rajton diri siajn vortojn koncere al ĉiuj gravaj internaciaj problemoj koncernantaj ĝiajn interesojn kaj tiujn de la mond-paco.

Komencante la invadan militon al Koreio, la Usonaj imperiistoj okupis nian teritorion Tajvan, kaj intencis etendi la invadajn flamojn de Koreio al la ĉina kontinento en vana atenco strangoli la ĵus naskitan novan Ĉinion per milita forto. La ĉina popolo kondukis grandiozan lukton por rezisti la Usonan invadon kaj helpi Koreion, protekti siajn hejmojn kaj defendi sian patrolandon, kaj frakasis la invadan intrigon de Usono. Kvankam Tajvan estas ankoraŭ okupata de la Usonaj imperiistoj, sed la ĉina popolo nepre ĝin liberigos, kaj nenia forto povos tion malhelpi. Ĝis nun la Usonaj imperiistoj ankoraŭ klopodas izoli kaj ekskludi Ĉinion de internaciaj aferoj, sed ankaŭ tiu ĉi klopodo renkontas pli kaj pli grandan malsukceson tagon post tago. Jam kun 33 landoj ni nun havas plenajn aŭ partajn diplomaciajn interrilatojn; kun 93 landoj kaj regionoj ekonomiajn interrilatojn; kun 104 landoj kaj regionoj kulturajn interrilatojn kaj amikajn intervizitojn. Ni intime unuiĝas kun la granda Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj. Laŭ la Kvin Principoj de Paca Kunekzistado kaj la Deklaracio de Bandung, ni starigis kaj disvolvis amikajn kooperajn interrilatojn kun multaj Aziaj kaj Afrika landoj nacie sendependaj, formante vastan regionon de paco. Kiel unu el la grandaj potencoj de la mondo, kaj kiel membro de la granda socialisma tendaro kun Sovetunio ĉe la kapo, ni faris kaj faras decajn kontribuojn al la defendo de mond-paco kaj disvolvo de la progresado de la homaro.

Kiel klarigi ĉiujn ĉi tiujn flugrapidajn disvolviĝojn? Kiel ili fariĝis?

La flugrapida disvolviĝo de Popola Ĉinio precipe devenas de tio, ke la ĉina socio trapasis plej radikalajn demokratian kaj socialisman revoluciojn, kaj ke ĝi jam starigis socialisman socion baziĝantan sur la sistemo de komuna posedo de la produktaj rimedoj.

Se la ĉina popolo ne renversus imperiismon, feŭdismon kaj burokratan kapitalismon, kiuj pezis sur ĝia kapo kiel tri montegoj, ĝi certe droniĝus senfine en mizero kaj postresteco. Kaj se tuj post la renverso de la tri montegoj, ni ne surpaŝus la vojon socialisman, ne plene efektivigus la socialisman revolucion kaj ne disvolvus laŭplanan socialisman konstruadon, sed prenis kapitalisman vojon kiel iuj landoj faris post sendependiĝo de

sia nacio, ni ne povus atingi la flugrapidajn disvolviĝojn dum la pasintaj dek jaroj, por ne paroli jam pri la granda antaŭensalto en ekonomia konstruado ekde la lasta jaro.

La reakcia opinio, ke ekonomie kaj kulture postresta lando ne povas realigi socialismon, jam estas frakase refutita de Lenin kaj kamarado Maŭ Ze-dong. Tamen koncerne al la demando, kial la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio disvolviĝas tiel rapide kaj glate, sin trovas ambaŭ objektivaj kaj subjektivaj kondiĉoj. Objektive, Ĉinio estas lando kun vasta teritorio, abundaj riĉaĵoj kaj grandnombra loĝantaro; la popolamasoj postulas revolucion kaj havas revoluciajn tradiciojn. La ĉina revolucio okazis post la Oktobra Revolucio, sekve ĝi povas profiti la spertojn kaj helpojn de Sovetunio, kaj la helpojn de la tuta socialisma tendaro. Subjektive, tio ebligas dank' al la korekta gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj ĝia gvidanto kamarado Maŭ Ze-dong. Tiu gvidado bone scias kombini la universalan veron de marksismo-leninismo al la konkreta praktikado de la ĉina revolucio; kombini la progresintajn spertojn en konstruado de Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj kun la propraj spertoj de Ĉinio; kombini laŭ la ĉinaj kondiĉoj la marksismo-leninisman teorion de seninterrompa revolucio kun la marksismo-leninisma teorio de disvolvado de revolucio laŭ stadioj; apliki, sub la kondiĉoj de Ĉinio, la labormetodon de amasa linio, kombini la gvidadon de la partio kun la amasa movado de miliarda popolo, kun la aktiveco kaj kreemo de miliarda popolo. Tie ĉi mi volas iom pli multe paroli pri la metodo de gvidado de la partio kaj kamarado Maŭ Ze-dong, precipe pri la metodo de seninterrompa revolucio kaj la metodo de amasa linio.

La disvolviĝado de Ĉinio en la dek pasintaj jaroj estas procedo de seninterrompa revolucio.

Ankoraŭ en la Dua Plena Sesio de la 7-a Centra Komitato de la Ĉina Kompartio, okazinta en marto, 1949, la Centra Komitato kaj kamarado Maŭ Ze-dong jam montris, ke la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko markos la landskalan venkon de la demokratia revolucio, kaj samtempe la komencon de la socialisma revolucio. La ŝtatpotenco de popola diktatoreco gvidata de la proletaro kaj bazita sur la alianco de la laboristaro kaj kamparanaro, starigita en 1949 rezulte de la venko de la revolucio, kvankam inkludante iom da reprezentantoj de la nacia burĝaro, estas esence jam ŝtatpotenco de la proletara diktatoreco. Tiam jam solviĝis landskale la centra problemo de la demokratia revolucio, t. e. la renverso de la reakcia

regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, kaj la fundamenta kontraŭdiro en la lando jam estis tiu inter la proletaro kaj la burĝaro. La revolucio ne devis halti je la stadio de demokratia revolucio, ĝi devis disvolviĝi antaŭen plu al la triumfo de la socialisma revolucio.

En la unuaj kelkaj jaroj post 1949, la ĉina popolo devis multe peni por finplenumi la taskon postlasitan de la stadio de demokratia revolucio — ĉefe la efektivigo de la landskala kontraŭfeŭdisma agrara reformo. Post la venko de la granda popola revolucio tra la tuta lando en 1949, pro la konfisko de la burokrata kapitalo kaj la ŝanĝo de burokratkapitalista posedo al socialisma tutpopola posedo, la popola revolucio, en ekonomio, jam transpasis la kadron de demokratia revolucio. Establi potencan socialisman ŝtatan ekonomion, kaj firme starigi sian gvidan pozicion en la tuta nacia ekonomio fariĝis tasko de unuaranga graveco de la proletaro kaj la laboranta popolo. Por rebati la kontraŭlegajn agadojn de burĝaj legrompantoj kontraŭ la nacia ekonomio, la Partio gvidis en 1952 la amasan batalon “Kontraŭ la Tri Malbonoj” (kontraŭ koruptiĝo, malŝparo kaj burokratismo inter la funkciuloj de ŝtataj institucioj) kaj “Kontraŭ la Kvin Malbonoj” (kontraŭ subaĉeto, impost-evito, ŝtelado de ŝtataj proprajoj, trompado en kontraktoj kun la ŝtato kaj ŝtelado de ŝtataj ekonomiaj informoj inter burĝaj industriistoj kaj komercistoj). Tio donis frakasan baton al la ofensivo farita de la burĝaro, kaj sur la bazo de tiu ĉi venko, puŝis grandpaŝon antaŭen la kapitalisman industrion direkte al ŝtata kapitalismo, kiu estas submetata al la gvidado de la socialisma ekonomio kaj kontrolado de la laboristaro. Post la agrara reformo, la Centra Komitato de la Partio ĝustatempe donis direktivon pri disvolvo de la movado de interhelpo kaj kooperado, por plenforte kuraĝigi kaj stimuli la kamparanojn individue mastrumantajn, marŝi antaŭen al kooperado, kaj daŭre kondukis akran batalon kontraŭ pensado devianta en la dekstrula direkto pri tiu ĉi problemo. La Centra Komitato de la Partio kaj kamarado Maŭ Ze-dong firme refutis la burĝajn vidpunktojn de iuj personoj en kaj ekster la Partio, kiuj postulis “firmigon de la novdemokratia ordo”, “longtempan kunekzistadon de socialismo kaj kapitalismo” kaj la “garantiadon de la kvar grandaj liberoj en la kamparo—libero de vendo kaj aĉeto, luigo kaj luado de tero, libero de dungado de terlaboristoj, libero de pruntado de mono kaj libero de komercado”, kaj ĝustatempe elmetis la ĝeneralan linion de la Partio por la transira periodo de samtempa efektivigo de socialisma transformo kaj socialisma konstruado. Tiu ĉi ĝenerala linio tuj

akiris la subtenon de la popolo tra la tuta lando kaj estis enskribita en la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko. Dank’ al la apliko de serio da rimedoj por socialisma transformo fare de la Partio sen perdo de tempo, la revolucia movado marŝis, paŝon post paŝo, antaŭen sen interrompo kaj fine aperis en aŭtuno kaj vintro de 1955, la alta tajdo de agrikultura kooperiĝo tra la tuta lando. Kaj’ tiu ĉi tajdo siavice stimulis la altan tajdon de transiro de kapitalismaj industrio kaj komerco tra la tuta lando laŭ skalo de tuta profesio, al kuna funkciado ŝtata-privata, kaj stimulis ankaŭ la altan tajdon de organizado de individuaj metiistoj en metiajn kooperativojn. Tiamaniere, la socialisma revolucio en la kampo de posedo de produktaj rimedoj estis fundamente plenumita.

Sed la taskoj de la socialisma revolucio ne finiĝis ĉi tie. Nelonge poste, la Partio elmetis novan taskon, ke estas necese daŭrigi la socialisman revolucion sur la politika kaj ideologia frontoj kaj ĝin efektivigi ĝisfunde. Estas necese pli bone konformigi, sur ĉiuj terenoj la super-strukturon al la socialisma ekonomia bazo, kaj samtempe, surbaze de la jam starigita socialisma posedo de la produktaj rimedoj, plene alĝustigi la interhomajn rilatojn en produktado, por ke la socialismaj rilatoj de produktado ankoraŭ pli fortikiĝu kaj disvolviĝu. Tio estis la tasko de la kontraŭdekstrula batalo kaj la rektifa kampanjo en 1957-1958. Rezulte de la kontraŭdekstrula batalo kaj la rektifa kampanjo, la kontraŭ-socialismaj burĝaj dekstruloj estis komplete izolitaj de la popolo kaj la socialisma konscio de la popolamasoj multe altiĝis. La kontraŭdiroj interne de la popolo ricevis pluan korektan traktadon, kaj tiel la rilatoj ĉu inter la funkciuloj de ŝtataj organoj kaj entreprenoj kaj la laboristoj kaj kamparanaj popolamasoj, ĉu interne inter la lastaj mem, ĉu inter la diversaj nacioj, ĉiuj estis plue plibonigitaj. Kaŭze de la triumfo de la kontraŭdekstrula batalo kaj la rektifa kampanjo, la revolucia entuziasmo de la popolo tra la tuta lando por konstrui socialismon leviĝis ĝis senprecedenca alteco.

La revolucia movado, kiu disvolviĝis seninterrompe post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, akiris neniam renkontitan grandiozan rikolton en 1958 kaj 1959, la unuaj du jaroj de la Dua Kvinjara Plano. Ĝi estis la granda antaŭensalto en la nacia ekonomio.

La rapideco de kresko de la ĉina industria produktado estis jam tre alta en la periodo de la Unua Kvinjara Plano. Tamen la rapideco en 1958 kaj 1959 multe superis tiun de la antaŭaj kvin jaroj. La totala valoro de industria produkto

meznombre pliiĝis je 18 procentoj en ĉiu jaro dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano. Sed en 1958 kaj 1959 (ĉitie kaj aliloke, la ciferoj por 1959 estas planitaj celnombroj), la meznombra jara pliiĝo estas 45 procentoj. La meznombra jara pliiĝo de ŝtalo estis 31.7 procentoj en la periodo de la Unua Kvinjara Plano kaj 50 procentoj en ĉi tiuj du jaroj, la meznombra jara pliiĝo de karbo estis 14.4 procentoj en la periodo de la Unua Kvinjara Plano kaj 60 procentoj en ĉi tiuj du jaroj. La totala valoro de agrikultura produkto meznombre pliiĝis ĉiujare po 4.5 procentoj en la periodo de la Unua Kvinjara Plano kaj 17 procentoj en 1958 kaj 1959. La meznombra jara pliiĝo de grenoj estis 3.7 procentoj en la periodo de la Unua Kvinjara Plano kaj 22 procentoj en ĉi tiuj du jaroj kaj tiu de kotonon estis 4.7 procentoj en la periodo de la Unua Kvinjara Plano kaj 19 procentoj en ĉi tiuj du jaroj. Preskaŭ 10,000 industriaj projektoj estis plenumitaj en la periodo de la Unua Kvinjara Plano sed pli ol 41,000 estis plenumitaj nur en 1958 sola. El tiuj, la super-normaj industriaj projektoj, kiuj estis tute aŭ parte plenumitaj kaj ekfunkciigitaj, nombriĝis 537 en la periodo de la Unua Kvinjara Plano, sed 700 en 1958 sola.

Kial la ekonomio de nia lando povis kreski kun ankoraŭ pli alta rapideco en 1958 kaj 1959 ol en la periodo de la Unua Kvinjara Plano? Tio estas ne nur ĉar la antaŭprepara fundamento por industriigo estis metita dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano kaj tiel favoraj materiaj kondiĉoj kreiĝis jam por rapida ekonomia kreskado en la periodo de la Dua Kvinjara Plano; eĉ pli grave, ĉar dum la plejparto de la periodo de la Unua Kvinjara Plano la socialisma transformo de agrikulturo, metiindustrio kaj kapitalismaj industrio kaj komerco estis ankoraŭ plenumata sed ne finita, la rilatoj de vere kamaradeca kunlaborado inter homoj en produktado ankoraŭ ne estis tute starigita kaj burĝaj influoj serioze ekzistis sur la politika kaj ideologia frontoj — ĉio ĉi malhelpis la iniciatemon de la laboranta popolo en produktado. En la lasta duono de la periodo de la Unua Kvinjara Plano, t. e. de la dua duonjaro de 1955 ĝis 1957, la socialisma revolucio gajnis unu grandan venkon post alia sur la ekonomia, politika kaj ideologia frontoj, la produktivaj fortoj de la socio kaj la iniciatemo de la laboranta popolo en produktado emancipiĝis senprecedence kaj nia Partio, surbaze de tiu ĉi favora situacio, elmetis kaj efektivigis en ĝusta tempo la ĝeneralan linion “strebi plenforte kaj, celi alte, por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ŝpare. Ĝuste pro ĉio ĉi tio, la ĉina

popolo povis malfermi novan situacion de antaŭensaltego ĉe la komenco de la Dua Kvinjara Plano kaj akceli la disvolvon de la nacia ekonomio kun multe pli alta rapideco ol en la periodo de la Unua Kvinjara Plano.

Post kiam la socialismaj rilatoj de produktado kaj la superstrukturo kiu konformiĝas al ili, t. e. al la ekonomia bazo, estis starigitaj, ili ankoraŭ estas en la procedo de daŭraj disvolvo kaj perfektigo, tial ili ne povas esti senŝanĝaj. La diversaj aspektoj de la rilatoj de produktado bezonas alĝustigon de tempo al tempo por plenumi la bezonojn de la daŭra disvolvo de la produktaj fortoj, kaj kune kun tio ĉi, la diversaj aspektoj de la superstrukturo konstruita sur tiu ĉi ekonomia bazo ankaŭ bezonas reformon de tempo al tempo. Inter la produktaj fortoj kaj la rilatoj de produktado kaj inter la ekonomia bazo kaj la superstrukturo, kontraŭdiroj senĉese estiĝas, solviĝas, kaj denove estiĝas. Tio estas dialektika procedo simila al senĉesa riverfluo konstante renovigita, Senĉesa kreskado de la produktaj fortoj estas certigebla, ĝuste pro tio ke la socialismaj rilatoj de produktado kaj ilia superstrukturo povas esti daŭre alĝustigitaj kaj reformitaj laŭ bezono. La disvolviĝo de la movado de popola komunumo tra la kamparo kiu komenciĝis dum la antaŭensaltego de agrikultura produktado de nia lando en 1958 estas freŝa pruvo de tiu ĉi vero. Fronte al la bezonoj de la granda disvolviĝo de agrikultura produktado kaj la tuta kampara ekonomio, la originaj altgradaj agrikulturaj kooperativoj jam ne povis konformiĝi al la situacio. Inter la somero kaj aŭtuno de 1958, pli ol 740,000 agrikulturaj kooperativoj tra la tuta lando, ĉiu havanta meznombre ĉ. 160 familiojn, kuniĝis kaj reorganiziĝis en pli ol 26,000 komunumoj, ĉiu havanta meznombre ĉ. 4,600 familiojn; kaj poste, post la kontrolado, ili reorganiziĝis plue en pli ol 24,000 komunumoj, ĉiu havanta meznombre pli ol 5,000 familiojn, alivorte, pli ol 30-oble tiel grandaj kiel la originaj agrikulturaj kooperativoj. Grandskala kaj forta, la popola komunumo ne nur kapablas disvolvi produktadon kaj konstruadon rapide en agrikulturo, arbarkulturo, bestobredado, flankokupoj kaj fiŝkulturo, sed ankaŭ atingas unuecan gvidadon super la laboroj de industrio, agrikulturo, komerco, edukado kaj militaj aferoj en la kamparo, efektivigante la integrecon de la ekonomia organizo kaj la baza organizo de ŝtata povo. La kampara popola komunumo ankoraŭ estas ekonomia organizaĵo bazita sur kolektiva posedo kun ĉefaj produktaj rimedoj ankoraŭ apartenantaj al produktaj brigadoj kiuj proksimume respondas al la antaŭaj agrikulturaj

kooperativoj, sed la komunuma nivelo jam posedas parton de la produktaj rimedoj kaj povas ĉerpi ĉiujare certan parton el la akumulajoj de la diversaj produktaj brigadoj, kaj en la distribua sistemo de la enspezo de komunumanoj estas entenataj ankaŭ certgrade elementoj de senpaga provizado. En 1958, la jaro kiam la popolaj komunumoj estis sukcesplene fonditaj, la totala produkta valoro de ĉina agrikulturo pliiĝis 25 procentojn kompare kun 1957. El tio, la produkta valoro de arbarkulturo pliiĝis 193.2 procentojn, fiŝkulturo 128 procentojn kaj bestobredado 5.2 procentojn. La kresko en kampara akvomastumado kaj la areo de arbarkulturado multe superis tiun en la tuta periodo de la Unua Kvin-jara Plano. Industrio kaj transporto funkciigataj de la popolaj komunumoj ankaŭ faris grandan progreson. Laŭ freŝa statistiko kompilita post la kontrolado de komunumo, la popolaj komunumoj tra la lando funkciigas ĉ. 700,000 industriajn unuojn, kun totala produkta valoro trioble tiel multa kiel dum la responda periodo de la pasinta jaro. En 1958, la fonduso akumulita de la kamparaj popolaj komunumoj atingis 10,000 milionojn da juanoj, pli ol duoble kiel tiu dum 1957. En 1958, la enspezo kaj la vivnivelo de la kamparanoj tra la lando estis ĉ. 10 procentojn pli alta meznombro ol en 1957. Ĉiuj ĉi tiuj faktoj montras ke la grandaj avantaĝoj de la popolaj komunumoj estas nedisputeblaj kaj ĉiuj "argumentoj" de tiuj homoj kiuj kontraŭas al tiu ĉi movado estas tute senbazaj.

Kiel granda ŝanĝo estas tiu ĉi transformiĝo de la pli ol 110 milionoj da individuaj kamparanaj familioj en pli ol 24,000 komunumojn! Kia glora venko por la marksismo-leninisma teorio de seninterrompa revolucio!

La procedo de socialisma revolucio en Ĉinio estas tiu de seninterrompa revolucio; samtempe, ĝi estas paŝo-post-paŝa progreso laŭ ĉiu stadio de disvolviĝo. Kiel la Rezolucio de la Sesa Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio atentigis, "Ni estas advokatoj de la marksismo-leninisma teorio de seninterrompa revolucio; ni opinias ke nenia Granda Muro ekzistas aŭ estas permesite ekzisti inter la demokratia revolucio kaj la socialisma revolucio kaj inter socialismo kaj komunismo. Ni estas samtempe advokatoj de la marksismo-leninisma teorio de disvolviĝo de revolucio laŭ stadioj; ni opinias ke malsamaj stadioj de disvolviĝo spegulas kvalitajn ŝanĝojn kaj ke tiuj ĉi stadioj de malsamaj kvalitoj ne devas esti konfuzitaj." En la praktiko, ni ne nur zorgeme distingas inter la

taskoj de la demokratia revolucio kaj tiuj de la socialisma revolucio, inter la principoj de socialismo kaj tiuj de komunismo, kaj kontraŭas al klopodoj transsalti la necesajn stadiojn de socia, historia disvolvo, sed ĉe ĉiu difinita stadio de socia, historia disvolvo, ni ankaŭ zorgeme distingas, laŭ la konkretaj kondiĉoj, inter la diversaj sub-stadioj kiuj pli malpli havas la karakteron de kvalitaj ŝanĝoj (la ŝanĝo de unu substadio al alia estas ankaŭ, kompreneble, tiu de malpli granda kvalita karaktero); kaj ni alprenas konvenajn rimedojn konforme al la bezonoj de la paŝo-post-paŝa transformiĝo de la rilatoj de produktado kaj la paŝo-post-paŝa maturiĝo de la konscio de la popolamasoj. La vasta amaso de la kamparanoj povis antaŭen iri, konscie kaj memvole, de la individua ekonomio al popolaj komunumoj, ĉar ili trairis serion da stadioj de interhelpaj grupoj, de regulaj tutjare interhelpaj grupoj, de elementaj agrikulturaj produktaj kooperativoj kaj de altgradaj agrikulturaj produktaj kooperativoj. Kapitalismaj industriistoj kaj komercistoj povis ne tre malvolonte akcepti kulan ŝtat-privatan funkciigon laŭ tuta profesio, ĉar ili ankaŭ trairis serion da stadioj de plenumado de registaraj kontraktoj por manufakturo kaj prilaborado de varoj fare de kapitalismaj entreprenoj, de la ŝtata aĉetado de la produktajoj de kapitalismaj entreprenoj kaj de la ŝtata distribuado de ĉiuj iliaj produktajoj, en la kampo de industrio; kaj de la ŝtata asignado al komercistoj agantaj komisie kiel distribuantoj por la ŝtato kaj komercistoj aĉetantaj varojn de ŝtataj stokoj kaj podetale vendi ilin je fiksitaj prezoj, en la kampo de komerco; kaj de la kuna ŝtat-privata funkciigo de individuaj entreprenoj. Simile, la socialisma revolucio sur la politika kaj ideologia frontoj ankaŭ trairis serion da amas-movadoj, kiuj konforme al la konkretaj kondiĉoj de klas-batalo, marŝis antaŭen kiel ondoj, iam altaj kaj aliam malaltaj, kaj pliprofondiĝis paŝon post paŝo. Tiu ĉi korekta gvidado de la Partio ebligis al la amaso konservi sian revolucion entuziasmon en konstanta, plena fluso, sen malvarmiĝo pro paŭzoj en la disvolviĝo de la revolucio, kaj altigi la nivelon de ilia konscio konstante, paŝon post paŝo tiel ke ili ne estu senpreparaj por la plua disvolviĝo de la revolucio. Pro tio ĉiu alvoko de la Partio dum la tuta periodo de la socialisma revolucio estis varme subtenata de la popolamasoj. Ankaŭ pro tio, kvankam la socialisma revolucio disvolviĝis tre rapide, tamen industria kaj agrikultura produktado konstante plialtiĝis kaj preskaŭ nenia detruo okazis.

La sukceso akirita de la Partio en la aplikado de la teorioj de seninterrompa revolucio kaj la

disvolviĝo de revolucio laŭ stadioj estas nedisi-geble rilatanta al la fakto ke la Partio persistis en la marksismo-leninisma labor-metodo de amasa linio tra la procezo de la socialisma revolucio. La Partio ĉiam atentis pri kombino de ĝia gvidado kun vastaj amas-movadoj, gvidante la amasojn levi la nivelon de sia revolucia konscio konstante kaj organizi ilian propran forton por liberigi ilin mem paŝon post paŝo, anstataŭ altrudi revolucion al la amasoj aŭ donaci venkon al la amasoj kiel favoron. Ni parolis pri tio ĉi jam en ne nur unu, sed multaj okazoj, ĉar firme persistante tiun ĉi labor-metodon la Partio gajnis la venkon de la demokratia revolucio. La novaĵo en tiu ĉi afero estas ke post la plena venko de la socialisma revolucio, la Centra Komitato de la Partio kaj kamarado Maŭ Ze-dong daŭre aplikas tiun ĉi labor-metodon sisteme en socialisma konstruado, tiel formuliĝis la Partia ĝenerala linio por konstrui socialismon kaj okazis la granda antaŭen-salto en la nacia ekonomio. Oni povas diri kun certeco, ke, se la labor-metodo de la amasa linio kiu kombinas la Partian gvidadon kun la amasa movado estus forlasita, ne estus la ĝenerala linio de la Partio por socialisma konstruado kaj sekve ne estus tia granda antaŭensalto en la nacia ekonomio kia okazis ekde lasta jaro.

La esenco de la ĝenerala linio de la Partio por konstrui la socialismon estas alta estimo al la politika konscio, aktiveco kaj kreemo de la popolamasoj en la socialisma konstruado. La ĝenerala linio postulas strebi plenforte kaj celi alte, por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ŝpare. Tio signifas alvoki al la 650 milionoj da ĉinoj ke ili plialtigu siajn konscion, aktivecon kaj kreemon, ke ili plene mobilizu sian entuziasmon, sian saĝon kaj siajn fortojn en la afero de socialisma konstruado. Estas postulate konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ŝpare. Ĉu estas eble, plenumi tiun ĉi komplikan kaj mal-facilan taskon? La imperiistaj kaj burĝaj ele-mentoŝoj diras al ni, ke tio estas ne ebla. Ili asertas ke ne eblas atingi multecon kaj rapidecon, samtempe kun boneco kaj ŝparo, ke tion deziri estas nenio alia ol “deziri ĉevalon kurigi sen doni-ian fojnon por manĝi”. La dekstremaj oportunistoj en niaj vicoj ankaŭ resonas eĥe post ili, dirante ke tio estas neebla. Tamen ni firme respondas ke jes. Ĉar ni apogas nin, antaŭ ĉio, sur la kreanto de la historio — la popolamaso — kiu estas ĝuste la forto nekomprenebla aŭ ne tute komprenebla por ĉiuj imperiistoj, burĝoj aŭ dekstremaj oportunistoj. Nia lando havas vastegan homforton, kaj la homo, kiel laboranto kaj kiel kreanto kaj manipolanto de la produktaj instrumentoj, estas

la decida faktoro en la produktaj fortoj de la socio, estas la plej altvalora “kapitalo”. Nature, kiel ni jam diris supre, la aktiveco de 650 milionoj da personoj, kiu estas grandega krea forto, ne povus funkcii sen la socialisma revolucio. Sed, eĉ post la realiĝo de la socialisma revolucio, se oni ne atentus pri ĝia mobilizo per taŭga metodo, ĝi ankaŭ ne povus sufiĉe disvolviĝi kaj, sekve, ankaŭ ne estus atingebla la celo konstrui so-cialismon multe, rapide, bone kaj ŝpare. Konforme al la objektivaj leĝoj en la ekonomia kaj politika vivo, la ĝenerala linio de la Partio ĝuste aranĝis la rilatojn inter la industrio kaj la agrikulturo, inter la peza industrio kaj la malpeza industrio, inter la industrioj administrataj de la centra registaro kaj de la lokaj instancoj, inter la grandaj entreprenoj kaj la mezaj kaj malgrandaj. Estas difinita samtempa disvolvo de la industrio kaj la agrikulturo, de la peza industrio kaj la malpeza sub la kondiĉo ke la antaŭeco estu donata al la peza industrio kaj samtempa disvolvo de la industrioj administrataj de la centra kaj de la lokaj aŭtoritatoj, de la grandaj entreprenoj kaj de la mezaj kaj malgrandaj entreprenoj, de la produktado per modernaj metodoj kaj per indiĝe-naj metodoj, sub la kondiĉo de koncentrigita gvidado, de ĉioninkluziva planado kaj de divido kaj kunordigo de laboroj. La apliko de tiu ĉi politiko de “irado per ambaŭ kruroj” ne nur celas konservi la necesan ekvilibron inter ĉiuj branĉoj de la ekonomio, sed antaŭ ĉio plene mobilizi la pozitivajn fortojn de ĉiuj flankoj kaj malfermi plej vastan agadkampon, por ebligi disvolvon de la konstruajn trupojn de la plej vastaj popol-amasoj kaj utiligon de iliaj fortoj tute en la socialisma konstruado, garantiantes tiamaniere, la plenumon de la postulo pri multeco, rapideco, boneco kaj ŝparo. Kvankam la produktiveco de la industriaj entreprenoj mezaj kaj malgrandaj kiu produktas per indiĝenaj metodoj aŭ per metodoj duonindiĝenaj kaj duonmodernaj, estas malpli granda ol tiu de la industriaj entreprenoj grandaj, uzantaj modernajn metodojn en la pro-duktado, sed ĝi estas evidente multe plialtigita kompare kun tiu de la simpla manlaboro en la pasinteco. Sub la nunaj kondiĉoj de nia lando, zorgi pri la disvolvo de la mezaj kaj malgrandaj entreprenoj industriaj, kiu produktas per indi-ĝenaj metodoj aŭ per metodoj duonindiĝenaj kaj duonmodernaj, samtempe kun la disvolvo de la grandaj industriaj entreprenoj uzantaj modernajn metodojn en la produktado, estas nenia malŝparo de homaj fortoj, sed kontraŭe, ĝuste estas ilia racia utiligo, ĝi tute ne prokrastas la industriigon, sed kontraŭe, ĝin multe akcelas. Krome, en ĉiu

ajn branĉo de la ekonomio kaj en ĉiu ajn entrepreno, estas praktikata la labormetodo de kombinado de koncentrigita gvidado kun grandskalaj amasaj movadoj. Tiel, la centra tasko de la socialisma konstruado — tiu de industriigo — fariĝas afero en kiu partoprenas rekte kaj aktive la plej vastaj amasoj, kaj, en certa senco, oni povas ankaŭ diri, ke tio estas tutnacia irigado de industrio.

Unu el la fundamentaj kialoj ke en nia Partio troviĝas certaj personoj kiuj falis en la marĉon de dekstrema oportunismo konsistas en tio, ke ili ne rekonas la aktivan kaj pozitivan rolon kiun ludas la popolamasoj en la konstruado. Ili kontraŭstaras la ĝeneralan linion de la Partio, kaj precipe, la politikon “irado per ambaŭ kruroj” de samtempa disvolvo de la industrioj administrataj de la centra kaj de la lokaj aŭtoritatoj, de la grandaj entreprenoj kaj la mezaj kaj la malgrandaj entreprenoj, de la produktaj metodoj modernaj kaj indiĝenaj; ili kontraŭstaras la aplikadon de la metodo de amasaj movadoj en la socialisma konstruado, dirante ke tio estas nur ia “etburĝa fanatika movado”, el kiu rezultas “nur multeco kaj rapideco sed ne boneco kaj ŝparo” kaj per kiu oni “gajnas malpli ol perdas”. La dekstremaĵoj oportunistoj kaptas izolajn kaj dumtempajn mankojn en la laboroj, kaj sen ia ajn analizo ilin libere troigas, por atingi sian celon nei la grandan antaŭensalton kaj kontraŭstari la ĝeneralan linion. Kontraŭ ĉiuj iliaj argumentoj de malfido, timo kaj kalumnio al la popolamasoj la fakto estas plej bona refuto.

Ĉu apliko de la metodo de amasaj movadoj en socialisma konstruado estas vere “etburĝa fanatika movado”? Ĉu el ĝi vere rezultas “nur multeco kaj rapideco sed ne boneco kaj ŝparo” kaj ĉu per ĝi oni vere “gajnas malpli ol perdas”? Estas konate, ke dum la granda antaŭensalto, dank’ al plena streĉiĝo de laborfervoro de la laboranta popolo multe da gravaj inĝenieraj projektoj estis realigitaj kaj komencis funkcii antaŭ la difinita dato. Ekzemple, la moderna alta fornego de Vuhan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio, kun taga produkta kapablo de pli ol du mil tunoj de fero, estis planita finkonstruiĝi dum du jaroj, sed fakte post nur 14 monatoj ĝi jam komencis produkti. La moderna Martin-fornego de Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio, kun taga produkta kapablo de pli ol mil tunoj da ŝtalo, estis planita finkonstruiĝi dum pli ol dek monatoj, jam komencis funkcii nur post pli ol kvar monatoj de konstruado. Du kaj duonon da jaroj bezonis la konstruado de Guanting-a Akvorezervejo, kun kapacito de 2,270

milionoj da kubmetroj, kiu postulis laboron de 1,450,000 kubmetrojn da tero kaj ŝtono. Sed ĉe la nun konstruata Mijun-a Akvorezervejo, kun projektita kapacito de 4,100 milionoj da kubmetroj, kiu postulas laboron de 20,560,000 kubmetroj da tero kaj ŝtono, post nur unu jaro estas jam finita laboro de 14,670,000 kubmetroj de tero kaj ŝtono, kaj ĝi jam montris sian utilon en reteno de superakvego. Tia granda konstruaĵo, kia estas la Granda Popola Halo en Pekino bezonis nur pli ol dek monatojn por finkonstruo. Ĝi ne nur superas en beleco, la samspecajn konstruaĵojn antaŭe ekzistantajn en nia lando, sed ankaŭ staras inter la unuaklasaj en la mondo. Krome, la investoj por ĉiuj ĉi tiuj konstruoj estis multe malpli grandaj ol tiuj por la samspecaj konstruoj faritaj dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano. Ni prenu por ekzemplo la konstruadon en la ferŝtala kaj karba industrioj. Antaŭe, la konstruado de grandtipa alta forno bezonis meze investon de 25,000 juanojn por ĉiu kubmetro da kapacito, nun nur de 14,000-18,000 juanojn, t. e. 28-44% malpli. Antaŭe la konstruado de granda minejo bezonis meznombro investon de 33 juanoj por ĉiu tuno da produkta kapablo, nun nur de 22 juanoj, t. e. 33% malpli. Ĉu oni povas aserti antaŭ tiaj faktoj ke ĉe tiuj konstruoj efektivigis nur multeco kaj rapideco sed ne boneco kaj ŝparo? En la produktado, same estas realigitaj ne nur la multeco kaj rapideco, sed ankaŭ boneco kaj ŝparo. En 1958, ne nur la industriaj produktaĵoj ege plimultiĝis, sed dank’ al la plena mobilizo de la popolamasoj kaj la klopodado per ĉiuj rimedoj por venki la malfacilojn, oni sukcesis provfabriki multege da novaj produktaĵoj, preskaŭ kiom estis fabrikitaj dum la tuta periodo de la Unua Kvinjara Plano. Ne multaj el tiuj novaj produktaĵoj estas altkvalitaj, precizaj, grandtipaj, komplikaj, pioniraj, atingintaj aŭ proksimiĝantaj al la nivelo internacia. Sammaniere, dank’ al la plena mobilizo de la kolektiva saĝo de la amasoj, la koeficientoj de utiligo de diversaj produktaj ekipoj daŭre altiĝis en la lastaj du jaroj. I. a. la koeficientoj de utiligo de alta forno, Martin-forno, lokomotivo, k. c. jam atingis la plej altan nivelon en la mondo. Dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano, la industriaj ministerioj de la centra popola registaro malaltigis en kvin jaroj entute la produktan koston je 29%, dum en la jaro 1958 sole la produkta kosto malaltiĝis je 12.5%. Respondu vi dekstraj oportunistoj kiuj opinias ke povas esti nur multeco kaj rapideco sed ne boneco kaj ŝparo, ke la amasaj movadoj en la industrio kondukas al kaoso, kaj ke per ĝi oni gajnas malpli ol perdas: Kiamaniere vi klarigos ĉion ĉi tion?

La dekstremaj oportunistoj intencas ataki la ĝeneralan linion de la Partio per la faktoj ke iuj malgrandaj entreprenoj kiuj laboras laŭ indiĝenaj metodoj, precipe la malgrandaj altaj fornoj, fabriki produktadojn de kompare malalta kvalito je kompare alta produkta kosto en siaj unuaj tagoj. Sed ankaŭ en tio la dekstremaj oportunistoj ankoraŭ vidas nur arbojn sed ne la arbaron. Ili ne vidas kian grandan rolon ludas tia malgrandskala produktado en la granda antaŭensalto en la socialisma konstruado. En 1959, ĉirkaŭ la duono de la 20 milionoj da tunoj da gisaĵo, kiun nia lando planis produkti, estos produktata per malgrandaj altfornoj. La altaj fornoj, grandaj kaj mezaj, kiujn ni konstruis dum multaj jaroj, havas la suman kapaciton de 24,000 kubmetroj, dum la malgrandaj altaj fornoj, konstruitaj ekde 1958 kaj normale funkciantaj, havas suman kapaciton de pli ol 43,000 kubmetroj. La produkta tekniko de la malgrandaj altfornoj, ĝuste kiel tiu de la grandaj, bezonas tempon por disvolviĝo. Pri tio ja estas nenia kaŭzo por miregi kaj surpriziĝi. Post la klopodo en la unua duono de la kuranta jaro, la koeficientoj de utiligo de la malgrandaj altfornoj kaj la kvalito de iliaj produktadoj estis multe plialtigitaj, dume la produkta kosto multe malleviĝis. Inter tiuj malgrandaj altfornoj, la plej bonaj jam proksimiĝas al la nivelo de la grandaj altfornoj. Nun la malgrandaj altfornoj havas en si ankoraŭ grandan latentan forton kiun oni povos daŭre utiligi. Dum la periodo de la Dua Kvinjara Plano, laŭ antaŭkalkulo, la malgrandaj altfornoj povos produkti entute ĉirkaŭ 55-60 milionojn da tunoj da gisaĵo. Kaj la kvanto de karbo produktata de la mezaj kaj malgrandaj minejoj okupos ĉirkaŭ 40% de la suma produkta kvanto de karbo, ĉijare. Do, ne estus la granda antaŭensalto, nek la ĝenerala linio, se ni apartiĝus de la menciita principo de "irado per ambaŭ kruroj" kaj de la apliko de la metodo de la amasa linio en la industriigo.

Lastatempe la Oka Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de Ĉina Komunista Partio kritikis la dekstreman konservativan penson kaj alvokis la popolon tra la tuta lando batali kontraŭ la dekstra tendenco, tutforte strebi kaj disvastigi grandiozan kampanjon por plimultiigi produkton kaj praktiki ŝparadon. Tiu ĉi ĝustatempa decido jam kaŭzis novan ŝveladon de produktado inter la laboranta popolo de la tuta lando. Laŭ la statistiko farita de la Ŝtata Buroo de Statistiko, la totala valoro de industria produkto en aŭgusto pliiĝis 14% kompare kun julio, kaj en septembro denove multe pliiĝis ĉirkaŭ 27% kompare kun aŭgusto. La produktkvanto de ŝtalo en aŭgusto pliiĝis 13.5% kompare kun julio, kaj en septembro pliiĝis 20% kom-

pare kun aŭgusto. Kaj tiu de karbo en aŭgusto pliiĝis 11.5% kompare kun julio, kaj en septembro pliiĝis 18% kompare kun aŭgusto. De januaro ĝis septembro, la totala valoro de industria produkto estas 45.5% pli ol la responda periodo de la lasta jaro, la produktkvanto de ŝtalo plimultiĝis 67%, de karbo 72%. Kompare kun la responda periodo de la lasta jaro, la kvanto de la tutlanda ŝarĝotransportado plimultiĝis 69%. La kvanto de varoj aĉetitaj de la ŝtato plimultiĝis 42%, kaj tiu de la pomalgranda vendo de varoj plimultiĝis 16%. Fine de septembro, la ŝtata stoko estas 22% pli kompare kun la responda periodo de la lasta jaro kaj la situacio de la merkata provizado estas bona. Kvankam la agrikulturan produktadon de nia lando ĉijare trafis severaj katastrofoj, dank' al nia granda sukceso en la irigacia konstruado, precipe dank' al la nove naskitaj popolaj komunumoj kiuj gvidis milojn kaj dekmilojn da kamparanoj en intensa batalo kontraŭ la katastrofoj, en multaj regionoj oni jam ilin venkis, kaj espereble sur bazo de la riĉega rikolto de la lasta jaro, oni rikoltos ankoraŭ pli abunde ol lastjare.

Ĉiuj ĉi faktoj sufiĉas pruvi: unue, la postulo por multeco, rapideco, boneco kaj ŝparo estas tute reala, kaj jam komencas efektiviĝi, kaj iom poste, kiam pliriĉiĝos la spertoj, ĝi kontinue pli perfekte kaj efike efektiviĝos; due, por efektivigi la postulon oni devas bone plenumi la tutan serion da politikoj de "irado per ambaŭ kruroj", por ke la vastaj heroaj popolamasoj havu sian terenon por batalo; trie, por efektivigi la postulon, oni devas sub gvidado disvastigi en ĉiuj entreprenoj grandskalan amasan movadon, altigi la konscion, aktivecon, kreemon de la amasoj, gvidi ilin strebi tutforte kaj celi alten. Fakte, plenumi la politikon "irado per ambaŭ kruroj" en la tuta lando kaj disvastigi en ĉiuj entreprenoj la amasan movadon ja estas la du flankoj de labormetodo por apliki la amasan linion en la konstruado de socialismo.

El tio, oni povas vidi, ke ne nur en la socialisma revolucio, sed ankaŭ en la socialisma konstruado, la aplikado de la labormetodo de amaslinio garantias ege rapidan kaj ege glatan disvolviĝon de la socialisma afero en nia lando, flugan kaj saltan disvolviĝon de nia lando en ĉi tiuj dek jaroj kaj precipe en ĉi tiuj du jaroj.

Dank' al la dujara antaŭensaltego, la ĉefaj celciferoj por 1962, fiksitaj en la propono de la Dua Kvinjara Plano povos esti superplenumita en tiu ĉi jaro. Tiel ni povos akiri pli grandan disvolviĝon en industria kaj agrikultura produktado dum la venontaj tri jaroj, kaj havi liberan manon

por plifortigi la malfortajn ĉenerojn. Estas tute antaŭvideble ke la periodo de la Dua Kvinjara Plano certe estas kvinjaro de antaŭensaltego. Jam en la pasintaj dek jaroj okazis tiel granda ŝanĝo en nia nacia ekonomio, sendube okazos ankoraŭ pli granda ŝanĝo en la venontaj dek jaroj. Tiam, la produktkvanto de niaj ĉefaj industriaj produktajoj plejparte superos tiujn de Anglio.

Kompreneble, nia antaŭensaltego estas nur ĵus komencita. Koncerne la bezonojn de la lando kaj la popolo, la laboroj kiujn ni faris estas ankoraŭ ne sufiĉaj, kaj ankaŭ niaj spertoj estas ankoraŭ ne sufiĉaj. Ni devas daŭrigi pene labori kaj studi, serioze resumi kaj akumuli spertojn dum nia laborado kaj serioze lerni el la progresinta sperto de Sovetunio kaj aliaj frataj landoj. Tamen, almenaŭ ni jam metis la fundamenton de rapida disvolviĝo kaj eltrovis la vojon al daŭriga antaŭensalto. Kiel ajn la imperiistoj kaj reakciuloj en diversaj landoj nin kalumnias aŭ la enlandaj burĝaj dekstruloj kaj iuj dekstremaj oportunistoj interne de nia partio kontraŭas al ni, ili neniel povas detruigi la fundamenton metitan de la popolo de nia lando aŭ turni ilin for de la vojo kiun ili elektis. La popola komunumo estas priskribata de la popolo kiel "io ne frakasebla de tondrobato". Tio estas la konkludo de la vasta amaso, ne nur pri nia movado de popola komunumo sed ankaŭ pri nia ĝenerala linio, nia antaŭensaltego kaj la tuta afero de socialismo, kaj ankaŭ pri la unueco de nia Partio kun la 650-miliona popolo de nia lando.

Same kiel la internaj kondiĉoj, la internaciaj kondiĉoj estas tre favoraj al nia antaŭensaltego. Unue, dank' al la forteco kaj unueco de la socialisma tendaro, estrita de la granda Sovetunio kaj la disvolviĝo de la batalo de la popoloj tra la tuta mondo kontraŭ agreso kaj milito, la fortoj de paco kaj progreso pli kaj pli evidente superas la forton de milito kaj reakcio. Tiu ĉi fakto trovis novan, klaran esprimon en la sukceso de vizito al Usono de kamarado Ĥruŝĉov. Due, la socialisma afero de nia popolo gajnis la simpatian kaj subtenon de la popoloj tra la tuta mondo, antaŭ ĉio, la simpatian kaj subtenon de Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj, kaj de la popoloj en Azio, Afriko kaj Latina Ameriko batalantaj por sendependeco kaj demokratio.

Celebrante la dekan datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, nia popolo devas esprimi sian dankon precipe al Sovetunio kiu helpis nin plenumi 166 konstruajn projektojn dum la

periodo de la Unua Kvinjara Plano, lastjare kaj ĉijare kontraktis kun ni novajn traktatojn por helpi nin plenumi aliajn 125 projektojn, kaj en la daŭro de lastaj dek jaroj alsendis pli ol 10,800 specialistojn en la fakoj de ekonomio, kulturo kaj edukado por labori en Ĉinio. Samtempe, ni devas esprimi nian dankon al la aliaj socialismaj landoj kiuj helpis nin plenumi 68 konstruajn projektojn dum la periodo de la Unua Kvinjara Plano, poste kontraktis novajn traktatojn por helpi nin plenumi pli ol 40 aliajn projektojn kaj alsendis pli ol 1500 specialistojn por labori en Ĉinio. Niaj atingajoj estas neapartigeble ligitaj kun la granda helpo donita de la popoloj de frataj landoj. La ĉina popolo neniam forgesos ilian fervoron kaj amikecon. Ni devas por ĉiam persisti en la marksismo-leninisma principo de kombinado de patriotismo kaj internaciismo, kaj daŭre firmigi kaj disvolvi konstante kun ili la fratan kunlaboradon.

Por superi Anglion en la produktkvanto de ĉefaj industriaj produktajoj en la venontaj dek jaroj, ni devas peni por fortigi tiujn malfortajn ĉenerojn en nia nuna industria sistemo kaj devas daŭre energie plifortigi agrikulturon por ke garantianta pluan pliigon en la produktado de grenoj, oni povu samtempe havigi al la malpeza industrio sufiĉe da fontoj de krudaj materialoj. Evidente, post kiam ni atingis tiun ĉi celon, nia ekonomia nivelo ankoraŭ ne povos esti rigardata kiel alta. Ni ankoraŭ devas daŭre antaŭenmarŝi al pli alta celo per la rapideco kiun la okcidentaj burĝaroj neniam kuraĝas imagi. La ĉina popolo jam firme decidis por konstrui sian landon dum ne tro longa tempo en grandan socialisman landon kun alte disvolvitaj modernaj industrio, agrikulturo, scienco kaj kulturo, kaj finfine realigos la idealon de komunismo. Sendube, ekzistos malfaciloj, kaj eĉ ne malmultaj, sed ni neniam estos timigataj de ili. Rerigardante la atingajojn kaj resumante la spertojn de la pasintaj dek jaroj, ni firme konvinkiĝis, ke se ni persiste efektivigas la ĝeneralan linion de la Partio kaj decideme nin apogas sur la du grandaj fortoj de la granda unuiĝo de la popolo en la tuta lando kaj la granda unuiĝo de la popolo tra la tuta mondo, certe ni povos venki ankoraŭ pli sukcese ĉiujn barojn sur la vojo de antaŭenmarŝado kaj akiri ankoraŭ pli brilan venkon en la venontaj dek jaroj. La tuta popolo de nia lando daŭrigu tutfortan strebadon kaj antaŭenmarŝu kuraĝe por konstrui nian grandan patrolandon sub la gvidado de la granda Ĉina Komunista Partio kaj la granda popola gvidanto kamarado Maŭ Ze-dong, kaj sub la ĉiam venkanta standardo de marksismo-leninismo!



# Vivu la popola komunumo!

— Ĉefartikolo de la Popola Tagĵurnalo je la 29-a de aŭg., 1959 —

**H**ODIAŬ estas la unua datreveno de la aprobo de la historia “Rezolucio pri la starigo de popolaj komunumoj en la kamparo” fare de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio dum sia pligrandigita sesio okazigita ĉe Bejdajhe. Antaŭ unu jaro, la popolaj komunumoj nur komencis disvastiĝi en kelkaj regionoj en Ĉinio. Nuntempe ili estas starigitaj en ĉiuj kamparaj regionoj tra la tuta lando (escepte de kelkaj regionoj loĝataj de naciaj minoritatoj); ili jam firme enradikiĝis kaj estas paŝantaj antaŭen sur vojo de sana disvolviĝo. La popola komunumo, la matena suno leviĝanta super la vasta horizonto en orienta Azio, estas pli kaj pli forte disradiancia siajn grandan energion kaj brilan lumon.

La rezolucio ĉe Bejdajhe faris tri elstarajn kontribuojn al la historio. Unue, ĝi analizis la historian fonon sur kiu la popolaj komunumoj estiĝis, antaŭvidis la neeviteblan tendencon de ilia disvolviĝo kaj difinis la korektan politikon, ke la Ĉina Komunista Partio varme subtenu kaj aktive gvidu la popol-komunuman movadon. “La popolaj komunumoj,” elmontris la rezolucio, “estas la neevitebla tendenco de la disvolviĝo de aferoj. Grandaj, ĉionfaraj popolaj komunumoj ne nur aperis, sed eĉ jam vaste disvolviĝas kelkloke. En certaj regionoj ili disvolviĝas tre rapide. Tre verŝajne baldaŭ aperos alta tajdo en la disvolviĝo de popolaj komunumoj tra la tuta lando kaj la disvolviĝo estos nekontraŭstarebla.” La historio jam pruvas, ke tiu ĉi takso kaj la pozitiva politiko alprenita laŭ tiu ĉi takso estas absolute korektaj. Due, la rezolucio science difinis la ekonomian karakteron de la popolaj komunumoj kaj ilian estontan disvolviĝon. Kvankam ĝi opiniis, ke la popola komunumo estos en la kamparo la plej bona formo organiza por la transiĝo de kolektiva posedanteco al posedanteco de la tuta popolo kaj por la transiĝo de socialismo al komunismo; tamen ĝi ankaŭ klare elmontris, ke la popola

komunumo en sia nuna stadio estas “ankoraŭ socialisma en karaktero — ‘de ĉiu laŭ lia kapablo kaj al ĉiu laŭ lia laboro’”, ke la posedanteco en la popola komunumo “estas ankoraŭ kolektiva posedanteco”, ke “la transiĝo de kolektiva posedanteco al posedanteco de la tuta popolo estas proceso kies kompletiĝo bezonos plurajn jarojn kaj ke eĉ post kiam la popola komunumo estos transpasinta al posedanteco de la tuta popolo, ĝia karaktero restos socialisma por sufiĉe longa tempo. Por eviti miskomprenon, la rezolucio detale priskribis la kondiĉojn necesajn por realigi la transiĝon de socialismo al komunismo, kiuj ankoraŭ ne ekzistas en Ĉinio nun. Trie, la Bejdajhe-a rezolucio ankaŭ fiksas serion da konvenaj paŝoj farotaj en la disvolvo de popolaj komunumoj. Precipe ĝi emfazis la memvolan partoprenon de la kamparanoj dirante ke “devigo estu evitita” kaj “neniu deviga aŭ malpacienca paŝo estu farita”. “En ĉiu gubernio unue elektu punkton por fari eksperimenton kaj poste disvastigu paŝon post paŝo.” “En la komenco de la unuiĝo de agrikulturaj kooperativoj en popolajn komunumojn la metodo ‘ŝanĝi la superan strukturon sen ŝanĝi la malsuperan’ povas esti uzita. . . . La originaj organizoj de produktado kaj sistemo de administrado povas resti provizore senŝanĝaj kaj funkcii kiel antaŭe.” “Estas ne necese solvi tro haste problemojn pri rezervitaj parceloj privataj, dise troviĝantaj fruktarboj, akcifonduso, ktp., nek necesas klare fiksi regulojn koncerne tiujn ĉi problemojn” “Post la starigo de popolaj komunumoj estas ne necese haste ŝanĝi la organan sistemon de distribuado por eviti malfavoran influon sur produktadon.” Tiuj ĉi rimarkigoj klare montras kiel absolute senbaza estas la babilajo de la imperialistoj kaj kelkaj aliaj kontraŭantoj al la popolkomunuma movado, kiuj intence penas krei impreson, kvazaŭ la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio fanatike dezirus “marŝi en komunismon unupaŝe” pere de la popol-

komunuma movado kaj devus "retiriĝi paŝon post paŝo" nur pro tio ke ĝi renkontus malfacilaĵojn.

Pro la varma bonvenigo al la popolkomunuma movado esprimita de centoj da milionoj da kamparanoj farantaj grandan antaŭensalton en produktado, kaj la pozitiva subtenado kaj korekta gvidado donitaj al ĝi de la Bejdajhe-a rezolucio, estiĝis granda tajdo de la popolkomunuma movado tra la tuta lando de post la publikigo de la rezolucio. En malpli ol du monatoj, la kamparana popolamaso de pli ol 700,000 agrikulturaj kooperativoj, organiziĝis en pli ol 26,000 popolajn komunumojn kaj efektiviĝis la popolkomunumigon en la kamparaj regionoj tra la tuta lando. Tio estas epokfara evento en la historio de nia lando.

Forpasis nur malpli ol unu jaro, post kiam efektiviĝis la popolkomunumigo en la kamparaj regionoj tra la tuta lando. Sed tiu ĉi nove naskita socia organizo — la popola komunumo — jam pruvis per nerefuteblaj faktoj en la vivo siajn grandegan vivforton kaj senkomparan superecon, kaj sian grandiozan rolon en la disvolviĝo de niaj kamparaj ekonomio kaj kulturo kaj en la plialtigo de la vivnivelo de niaj kamparanoj.

Tuj post la efektiviĝo de la popolkomunumigo en la tutlanda kamparo en la lasta jaro okazis senprecedenca riĉega rikolto aŭtuna kaj la popolamaso movado de fer- kaj ŝtal-produktado. Kvankam la asignado de homaj fortoj en la rikoltado estis ne tre bone aranĝita en multaj lokoj, tiel ke la rikoltaĵoj estis kolektitaj pli malpli trorapideme, tamen la rikoltoj de greno kaj kotonino estis multe pli abundaj ol en la jaro antaŭ la lasta. Kaj plie, kelkaj milionoj da tunoj de "moderna fero" estis elfanditaj el malgrandaj altfornoj dum aliaj milionoj da tunoj de indiĝenaj fero kaj ŝtalo estis elfanditaj el indiĝenaj altfornoj, gisfornoj k. a. Samtempe plenumiĝis giganta tasko de mallong-distanca transportado de agrikulturaj produktaĵoj kaj materialoj rilatantaj fer- kaj ŝtal-produktadon. Sen popolaj komunumoj, estus tute ne eble plenumi tiajn pezajn taskojn en la sama tempo. En la somera rikolto ĉijara, la unua de post la starigo de la popolaj komunumoj, malgraŭ la malfavoraj naturaj kondiĉoj ni akiris rikolton eĉ pli abundan ol tiun en la somero de 1958, la jaro de granda impeto. La unuapaŝa statistiko pri Ŝanhi-, Hebej-, Henan- kaj Gjangsu-provincoj montras, ke pli ol 500 ĝinoj da tritiko po muo estas rikoltitaj en pli ol 650,000 muoj. En 1957, la jaro antaŭ la starigo de la popolaj komunumoj, neniun provinco tra la tuta lando atingis la sumon de pli ol 200 ĝinoj da tritiko po muo. Sed en la

kuranta jaro ses provincoj kaj municipaloj jam superis tiun nivelon. Tio estas la stato en la agrikultura produktado. La sama estas tiu en industrio, forstokulturado, dombest-bredado, kromokupoj kaj fiŝkaptado. Miloj kaj miloj da fabrikoj estas starigitaj tra la kamparo por fari agrikulturajn instrumentojn, produkti kemian sterkon aŭ prilabori agrikulturajn produktaĵojn. Tre nekompleta statistiko en februaro ĉijara montris, ke la popolaj komunumoj jam starigis pli ol 86,000 fabrikojn por fabriki aŭ ripari agrikulturajn ilojn. Kvankam la kolektiva bredado de dombestoj ege disvolviĝis en la tempo de la kooperativoj, tamen ĝi tute ne povas kompari kun tiu en la tempo de la popolaj komunumoj. Laŭ la enketo farita antaŭ nelonge en 21 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, pli ol 80 milionoj da porkoj estas kolektive bredataj de la popolaj komunumoj, aŭ meznombro pli ol 3,000 po komunumo. La nombro de porkoj private bredataj de la popolkomunumanoj ankaŭ kreskas rapide. La popolaj komunumoj akiris grandajn atingojn same en la konstruado akvoutiliga. Krom sennombraj malgrandaj akvorezervejoj, ĉiu kun kapacito de malpli ol 10 milionoj da kubaj metroj, la popolaj komunumoj konstruis ekde lasta vintro 60 grandajn akvorezervejojn, ĉiu kun kapacito de pli ol 100 milionoj da kubaj metroj, kaj pli ol 1,200 mezgrandajn akvorezervejojn, ĉiu kun kapacito de 10 milionoj ĝis 100 milionoj da kubaj metroj. Ĉi tiun jaron Ĉinio estis atakita de la plej seriozaj senpluveco kaj inundoj en la lastaj jardekoj; pli ol 510 milionoj da kulturata tero estis plagitaj. Sed dank' al tiom da akvoutiligaj konstruaĵoj konstruitaj de la popolaj komunumoj, la plena mobilizo de viroj kaj virinoj fare de la popolaj komunumoj por kontraŭbatali la naturajn katastrofojn kaj la kunlaborado grandskala, pli ol 270 milionoj da muoj de la tero plagita de sekeco estis irigaciitaj kaj savitaj el la serioza minaco. La publikaj manĝejoj, la infanvartejoj kaj la "hejmoj de respekto al la maljunuloj", kiuj estas vaste starigitaj en la kamparaj regionoj, ludas gravan rolon por liberigi la virinojn por produkta laboro kaj plibonigi la vivnivelon de la kamparanoj.

En la popolamaso revolucia movado en tiel granda skalo kaj disvolviĝinta tiel rapide kiel tiu de la popolaj komunumoj, estas memkompreneble, ke kune kun la grandaj atingoj neeviteble okazis iom da mankoj. Efektive ne estas mirinde, ke okazis iom da mankoj, sed mirinde, ke la mankoj estas tiel malmultaj en komparo kun la atingoj kaj tiel rapide forigitaj. La rezolucio pri la popolaj komunumoj estis publikigita la dekan de septembro lastjare. En la unua tagodeko de

novembro, la konferenco kunvokita de K-do Maŭ Ze-dong en Ĝengĝoŭ jam eltrovis, ke en kelkaj rilatoj, la movado estas devianta for de la korekta vojo difinita en la Bejdajhe-a rezolucio kaj re-bonigaj rimedoj estis proponitaj. Post tio, la Sesa Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio, kunvokita de la fino de novembro ĝis la unua tagodeko de decembro, kaj la dua Ĝengĝoŭ-a konferenco (la pligrandigita kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio), donis detalajn instrukciojn por la reĝustigo en la popolaj komunumoj. Ili estis efektivigitaj en nur du ĝis tri monatoj kaj la problemoj, kiuj aperis en la unua stadio de la movado, estis plene solvitaj. Rezulte de tio, ne nur la plejmulto de la kadroj kaj la popolamaso, kiu estis por la popola komunumo ekde la komenco, fariĝis pli fidantaj sed ankaŭ tiuj en la kamparo, kiuj estis skeptikaj antaŭe, estis plene konvinkitaj kaj fariĝis spirite senĝenaj. "La popolaj komunumoj estas bonaj efetive! Vivu longe la prospero de la lando kaj popolo!" tiel entuziasme prikantas la kampara popolamaso de Ĉinio pri la popolaj komunumoj el la fundo de la koro.

La popolkomunuma movado estas la daŭrigo kaj disvolviĝo de la granda socialisma revolucio en la ĉina kamparo. Evidente la socialisma revolucio, kiel la demokrata revolucio, devas esti daŭrigota ĝis la fino. Sub la nunaj kondiĉoj en nia lando, la popola komunumo estas fortega ilo por plirapidigi la disvolviĝon de nia kolektiva ekonomio en la kamparo kaj elradikigi la eblecon de la restariĝo de kapitalismo. Ĉar ĝi kunigas industrion, agrikulturon, komercon, edukadon kaj militajn aferojn kaj unuigas registaran administradon kun la komunuma, kaj ĉar malgraŭ ke ĝia posedanteco estas ankoraŭ kolektiva en karaktero, ĝi tamen entenas certajn elementojn de posedanteco de la tuta popolo (tio ĉefe manifestiĝas en la unuiĝo de la registara kaj komunuma administrado kaj la disvolviĝo de la ekonomiaj entreprenoj funkciigataj de la komunumo), kaj ĉar tiu ĉi sistemo, kiu estas socialisma en karaktero, enhavas kelkajn ĝermojn de komunismo, la popola komunumo sub la aktualaj kondiĉoj en Ĉinio estas la plej bona formo de socia organizo ne nur por la transiro de kolektiva posedanteco al posedanteco de la tuta popolo, sed ankaŭ por la transiro de socialismo al komunismo en la estonteco. Ĝuste pro tio la popolaj komunumoj renkontis tuj post sia apero la malamegon kaj furiozajn atakojn de ĉiuj malamikaj fortoj kontraŭsocialismaj. Ekde la komenco la imperialistoj uzis la plej sovaĝan lingvon kaj la plej abomenajn kalumniojn en siaj atakoj kontraŭ la popolaj komunumoj. En nia

propra lando, la restantoj de la renversita reakcia klaso kaj la burĝaj dekstruloj, rimarkinte ke iliaj "bonaj tagoj" estas forpasintaj por ĉiam, ankaŭ krude kalumniis la popolajn komunumojn kun akra malamo. Tamen, ju pli furioze ili atakas, des pli pravaj pruviĝas la popolaj komunumoj. Kiel ajn ili kalumnias, ili povas neniel malhelpi la grandpaŝan antaŭeniron de la popolaj komunumoj.

Nun, kiam la unua datreveno de la rezolucio pri la popolaj komunumoj estas celebrata kaj kiam la mankoj, kiuj troviĝis en la unua stadio de la popolaj komunumoj, estas forigitaj kaj la popolaj komunumoj jam surpaŝis la vojon de sana disvolviĝo, ni devas rimarki, ke krom la reakciuloj hejmlandaj kaj eksterlandaj sin trovas ankoraŭ kelkaj personoj, kiuj malkontentas kaj kontraŭstaras al la popolkomunuma movado. Ili estas tiuj en la vicoj de la ĉina popolo, inkluzive de kelkaj dekstremaj oportunistoj en la Komunista Partio, kiuj estas sufiĉe serioze influitaj de burĝa ideologio. Ili ne vidaŝ, ke la popolkomunuma movado estas granda socia movado de centoj da milionoj da ĉinaj kamparanoj, produktaĵo de la granda disvolviĝo de agrikulturo, la granda disvolviĝo de la akvoutiliga konstrulaboro kaj la alta leviĝo de socialisma konscio de la kamparanoj por kunlaborado en pli granda skalo. Nek ili vidas, ke kun la efektiviĝo de la principo "al ĉiu laŭ lia laboro" kaj kun la klara difino de la baza posedanteco en la produktaj brigadoj de la popolaj komunumoj, la organiza formo de la popola komunumo estas efektive fortega instrumento por plua disvolvo de socialisma kolektiva posedanteco. Ili babilas, ke "al la popola komunumo mankas objektiva materia bazo, ĝi ne estas produktaĵo de objektiva neceso, sed la frukto de subjektiva deziro de malmultaj, kiuj ĝin estigis per brukrioj." Ili babilas, ke "la popolaj komunumoj estas starigitaj tro frue, tro rapide, kaj tute fuŝiĝis." Unuvorte, ili ne vidas la avantaĝojn de la popolaj komunumoj kaj la revolucian fervoron de centoj da milionoj da kamparanoj. Ili nur interesiĝas pri la dumtempaj, lokaj jam antaŭ longe venkitaj mankoj de la komunumoj. Tiamaniere ili sin lokas kontraŭ la popolo, la grandaj socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Ĉu la popolkomunuma movado ne havas objektivan materian bazon? Ĉu ĝi ne estas nepra tendenco de la disvolviĝo de la situacio? Historio respondu al ni la demandon. La popolkomunuma movado komencis disvastiĝi en kelkaj partoj de Ĉinio en la somero de 1958. La kaŭzo, kial ĝi okazis en tiu aparta tempo, estas ke la rektifa kampanjo, la kontraŭ-dekstrula lukto kaj la movado de socialisma eduko en 1957 kondukis al

senprecedenca leviĝo de socialisma konscio kaj labor-entuziasmo inter la kadroj kaj la popolamaso en la kamparo kaj al decidemo por rapide ŝanĝi la ekonomian estiĝintecon de la kamparo kaj ilian staton de "malriĉecon kaj malpleneco". Tial ekde la vintro de 1957 (por konveneco, ni ne rerigardos ĉi tie la pli fruan originon de organiza formo de la popola komunumo en nia lando), ege disvolviĝis la produktado kaj konstruado en la kamparo komence de akvo-utiligaj projektoj. La antaŭa organiza formo de altgrada agrikultura kooperativo, malgranda en skalo kaj limigita al agrikulturo, ne povis kontentigi la bezonon por disvolvi produktadon rapide kaj grand-skale. En multaj lokoj kooperativoj komencis unuiĝi en pli grandajn kooperativojn en la kunveno kunvokita en marto de 1958 en Ĉengdu kaj partoprenita de kelkaj gvidantaj membroj de la Centra Komitato kaj la lokaj komitatoj de la Ĉina Komunista Partio, k-do Maŭ Ze-dong konsiderinte tion proponis konvenan kunigon laŭplanan de malgrandaj kooperativoj en grandajn. Tiu ĉi propono estis poste oficiale aprobita de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio. Mallonge post tio, en majo, la Dua Sesio de la Oka Nacia Kongreso de la Ĉina Komunista Partio elmetis la ĝeneralan linion por socialisma konstruado, kiu ege kuraĝigis la kadrojn kaj la popolamason en la vasta kamparo, ke des pli altiĝis ilia batalspirito, des pli fortiĝis ilia batalvolo, kaj la agrikulturaj produktado kaj konstruado, la industrio, transportado kaj komunikado servantaj agrikulturon, kaj la komerco, kultura kaj eduka laboro kaj militaj aferoj en la kamparo ĉiuj disvolviĝis rapide. La kamparanoj postulis pli racian kaj pli efikan organizadon de laborforto kaj la unuiĝon de la bazaj organizoj ŝtatpotenca kaj ekonomia por atingi pli fortan unuigitan gvidadon. Sekve naskiĝis tre nature en la vasta kamparo de nia lando nova formo de grand-skala socia organizo, kuniganta industrion, agrikulturon, komercon, edukon kaj militajn aferojn kaj unuiganta registaran kaj komunuman administradon. Tiu ĉi nova formo de socia organizo ja tute estas kreaĵo de la popolamaso. En la komenco, oni donis al ĝi diversajn nomojn. En junio, la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj k-do Maŭ Ze-dong elektis la nomon "popola komunumo", kiu povas plej bone esprimi la esencon de tiu ĉi formo organiza estas plej bone bonvenigata de la popolamaso. Ĝi estis unuanime akceptita en la Bejdajhe-a konferenco de la Komunista Partio en aŭgusto. Fakte, longe antaŭ la Bejdajhe-a konferenco kelkaj pioniraj populaj komunumoj kiel la Ĉajaŝan-a Popola Komunumo en Sujping-gubernio kaj la Kiliĵing-a Popola Komunumo en Hinhiang-gubernio, Henan-provinco,

estis vizitataj de centoj da miloj da kamparanoj kadroj el ĉiuj partoj de la lando kaj sekvi la ekzemplojn de tiuj ĉi komunumoj jam fariĝis ne kontraŭstarebla tendenco. Ĝuste sub tiaj cirkonstancoj de granda disvolviĝo de la kampara ekonomio kaj la alta leviĝo de la politika konscio de la kamparanoj estiĝis la alta tajdo de popolkomunumigo en la kamparo. Tial nur tiuj, kiuj fermas siajn okulojn antaŭ faktoj, povas aserti, ke tiu ĉi popolamaso movado, kiu estas "konforma al natura leĝo kaj homa sento", estas frukto de subjektiva deziro de malmultaj, kiuj ĝin estigis per brukrioj aŭ ke "la populaj komunumoj estas starigitaj tro frue, tro rapide kaj tute fuŝiĝis". La historio de la estiĝo de la popola komunumo kaj precipe la historio de ĝia disvolviĝo en la pasinta jaro pravas, ke ĝi estas neevitebla produktaĵo de historia disvolviĝo. Malgraŭ ke ĝi havas historion de apenaŭ unu jaro sur tutlanda skalo, ĝi jam garantias ĝeneralan plialtiĝon de po-mua produkto en agrikulturo kaj ĝeneralan aperon de grandareaj kampoj altproduktaj. Neniu komunumo kolapsis sub la rigora provo de severaj naturaj katastrofoj. Kontraŭe, dum la batalado kontraŭ la naturaj katastrofoj, la kamparanoj konis pli profunde la superecon de la komunumo en kamparo kun la agrikultura kooperativo kaj ligis pli firme sian sorton al tiu de la komunumo. Marks skribis: "Novaj, plialtaj rilatoj de produktado neniam aperas, antaŭ ol la materiaj kondiĉoj por ilia ekzisto maturiĝis en la utero de la malnova socio mem. Tial la homaro ĉiam difinas al si nur tiajn taskojn, kiajn ĝi povas solvi; ĉar rigardante al la afero pli detale, ni ĉiam trovos, ke la tasko mem aperas nur kiam la materiaj kondiĉoj por ĝia solvo jam ekzistas, aŭ almenaŭ estas en la procedo de formiĝo." Kial tiuj, kiuj havas dubon pri la popolkomunuma movado, ne studu pli serioze la faktojn de historio kaj tiun ĉi fundamentan marksisman vidpunkton de historia disvolviĝo?

Nuntempe sin trovas en nia lando du specoj de argumentoj, kiuj esence neas la populajn komunumojn. Unu asertas, ke se oni starigas populajn komunumojn, oni devas praktiki komunismon, alie oni ne povas ilin starigi. La alia opinias, ke la populaj komunumoj estas preskaŭ la samaj kiel la altgradaj agrikulturaj kooperativoj kaj sekve estas tute ne necese ilin starigi. Homoj de ambaŭ argumentoj, estas efektive absolute senciaj pri la aktuala stato de la populaj komunumoj. Estas vere, ke la nomo "komunumo" povas rilatiĝi al komunismo, sed ĝi ankaŭ povas ne rilatiĝi al ĝi; alivorte, povas ekzisti komunumoj, kiuj ne estas (aŭ ankoraŭ ne estas) komunismaj en karaktero. Ni ĉiuj scias, ke sin trovis ĉiuj specoj de "komunumoj" de diversaj karakteroj en


la moderna historio. Troviĝis ne nur “komunumoj”. kiuj ne estis komunismaj en karaktero, en la periodo de proleta revolucio, sed ankaŭ troviĝis “komunumoj” en periodo de burĝa revolucio, burĝa demokrata revolucio. La popolaj komunumoj en Ĉinio hodiaŭ estas socialismaj en karaktero. Tio estas klara kaj senduba de post la rezolucio de la Bejdajhe-a kunveno de la Komunista Partio okazinta antaŭ unu jaro. Ĉu estas io erara en la organizado de la popolaj komunumoj por pli efike antaŭenigi la socialisman kolektivajn ekonomion? Rilate al la socialisma karaktero la popola komunumo estas sama kiel la altgrada agrikultura kooperativo. Sed en multaj flankoj ili diferencas unu de la alia: la altgrada agrikultura kooperativo estas kampare malgranda kolektivo, la popola komunumo multe pli granda kolektivo; la altgrada kooperativo sin okupas nur pri agrikulturo, la komunumo pri diversaj ekonomiaj entreprenoj; la altgrada kooperativo estas nur ekonomia organizo, la komunumo unuigita organizo de politika, ekonomia, milita kaj kultura agadoj; la altgrada kooperativo estas nur organizanto de kolektiva produktado, la komunumo ankaŭ tiu de kolektiva vivo. Pli grave estas, ke en la nunaj komunumoj, kvankam la baza formo de posedanteco estas tiu de la produkta brigado, kiu ĝenerale estas egala al la altgrada agrikultura kooperativo, tamen jam estas parta posedanteco de la komunumo, kiu tute ne ekzistis antaŭe. Kaj ĝuste tiu ĉi parta komunuma posedanteco reprezentas la brilan estontecon de la popola komunumo. Posedaĵoj rekte apartenantaj al la popolaj komunumoj, kiel ekzemple la entreprenoj kaj servoj administrataj de la komunumo kaj la akumulata kapitalo kaj la fonduso por publika bonstato, estas ankoraŭ ne multaj, sed ĝi reprezentas la grandiozan brilan estontecon por la kamparo de Ĉinio. Ĉar la komunumo povas ĉiujare eltiri akumulon de la produkta brigado, ankaŭ ĝin plimultiĝi per la profitoj de la entreprenoj administrataj de la komunumo kaj ricevi ŝtatajn investojn, la disvolviĝo de la parto posedata de la komunumo estas ne malrapida, sed tre rapida. La posedanteco de la komunumo jam enhavas elementojn de posedanteco de la tuta popolo. Sekvante la disvolviĝon de produktado kaj la iompostioman pligrandiĝon de la posedanteco de la komunuma nivelo, la elementoj de posedanteco de la tuta popolo ankaŭ kreskos konstante. Kvankam la transiro de kolektiva posedanteco al posedanteco de la tuta popolo estas procedo, kies plenumiĝo ankoraŭ bezonos plurajn jarojn, tamen la popola komunumo estas sendube la plej bona formo de socia organizo por efektivigi tiun ĉi transiron. Samtempe, kvankam la popola komunumo estas ankoraŭ socialisma en karaktero,

tamen ĝi jam enhavas kelkajn ĝermojn de komunismo, kiujn la altgrada agrikultura kooperativo ne havis nek povis havi. Sin trovas multaj kialoj por aserti, ke la popola komunumo estas ne nur tre potenca instrumento por plirapidigi socialisman konstruadon, sed ankaŭ la plej bona formo de socia organizo por la estonta transiro de socialismo al komunismo. Se la nova formo de socia organizo, la popola komunumo, povas plene disvolvi la originajn avantaĝojn de la altgrada agrikultura kooperativo kaj venki certajn limigojn de la kooperativo kaj se ĝi enhavas la ĝermon de granda nobla idealo, ĉu troviĝas ia kialo por ne organizi popolajn komunumojn por anstataŭi la altgradajn agrikulturajn kooperativojn? Ĉu ne estas pli bone “aldoni florojn al belaĵo”?

Estas vere, ke la historio de la popola komunumo de ĝia naskiĝo ĝis hodiaŭ estas ankoraŭ tre mallonga; ĝiaj avantaĝoj nur komencas montriĝi kaj ĝiaj elementoj kun vastaj perspektivoj estas nur en la burĝona stadio de la disvolviĝo, sed ĉu oni povas ilin malestimi, simple pro tio ke ili estas en la burĝona stadio? Kiu arbo ne kreskas de juna ĝermo? “Mokado je la malforteco de la junaj ĝermoj de la nova ordo, malkara skeptikismo de la intelektuloj, kaj similaj — ĉio ĉi estas esence metodoj de klasa batalo de la burĝaro kontraŭ la proletaro, defendo de kapitalismo kontraŭ socialismo. Ni devas zorgeme studi la novajn ĝermojn, ni devas dediĉi nian plej grandan atenton al ili, fari ĉion por plirapidigi ilian kreskadon kaj varti tiujn malfortajn ĝermojn. . . . Grave estas flegi ĉiun novan ĝermon; kaj la vivo mem elektos la plej vivpovan.” (De Lenin: “Granda iniciato”) Jen kiel Lenin sintenis al tiaj junaj ĝermoj. La Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj k-do Maŭ Ze-dong traktas la popolkomunuman movadon kun tiu ĉi marksisma-leninisma sinteno.

Nur unu jaro forpasis de post la Bejdajhe-a kunveno de la Komunista Partio. Pasis ankoraŭ malpli ol unu jaro de post la plenumo de popolkomunumigo en la kamparo tra nia lando. Sed la popola komunumo, la nove naskita socia organizo, jam travivis seriozajn provojn kaj akumulis riĉan sperton. Spite la insultadon kaj subfosadon al ili faritan de malamikaj fortoj enlandaj kaj eksterlandaj, spite la kondamnon kaj kontraŭstaron de la dekstraj oportunistoj en la Partio, kaj spite la grandajn atakojn de la naturaj katastrofoj, la popola komunumo ne kolapsis. Sekve ni rajtas diri, ke la popolaj komunumoj neniam kolapsos. La brava kaj laborema ĉina popolo rigardas al la estonteco kun plena fido de venko. Ni havas milojn da kialoj por krei laŭte:

Vivu la popola komunumo!



Post la fondiĝo de la popolaj komunumoj, jen aperas reto de irigaciaj kanaloj en norda Anhuĵ-provinco, kio certigas abundajn rikoltojn.


# ANTAŬEN MARŜAS LA POPOLA KOMUNUMO


(Fotoj de Hinhua-novaĵagentejo)



Pli bona kulturado ebligas sur la kampoj de Giade-a Popol-komunumo, Ŝanĥi-provinco, dank' al pli bona organizado de la laborforfoĵoj.

Sur la vastaj kampoj de Juĥiang-a Popolkomunumo, Ŝanĥi-provinco, jam laboregas traktoroj por abunda tritika rikolte en 1960.






Pli ol 200,000 kokojn bredas la Blankmonta Popola Komunumo, Gilin - provinco. Jen unu el ĝiaj bredejoj.

Ĝoje vivas la infanoj en la popol-komunumaj infanvartejoj kaj bone laboras iliaj patrinoj en siaj novaj labor-kampoj.

*Sube maldekstre:* Vang Ĝi-fa, dungita kamplaboristo antaŭ la Liberigo, nun estas ne nur bona brigadestro, sed ankaŭ bona teknika instruisto en Kiliĵing-a Popol-komunumo, Henan-provinco.

*Sube dekstre:* Kultura domo de Ĝouĝuang-a Popola Komunumo, Ĝiangsu-provinco.



# La Ŝanhaja Fabriko de Maŝinfabrikiloj


**L**A malnova duonkolonia Ĉinio ne nur ne havis industrion por produkti maŝinfabrikilojn, sed eĉ devis importi radpolurilojn el fremdaj landoj. Tia stato jam tute ŝanĝiĝis dum la pasinta jardeko.

Dum la dek jaroj la Ŝanhaja Fabriko de Maŝinfabrikiloj sukcese produktis pli ol sepdek specojn kaj ĉirkaŭ dek mil pecojn da cilindrigaj, ebenigaj, universalaj, specialaj frotumaj maŝinoj, alteprecizaj dentradigaj kaj helickaneligaj frotumaj maŝinoj, kaj rulilaj frotumaj maŝinoj pli ol 40 tunojn peza, per kiuj ĝi subtenis la produktadon de pli ol mil fabrikoj kaj minejoj en pli ol sepdek urboj de Ĉinio.

Dum la dek jaroj ĝi disvolviĝis komence de imita fabrikado de Sovetuniaj frotumaj maŝinoj ĝis produktado de alteprecizaj frotumaj maŝinoj memprojektitaj; en la komenco ĝi povis provfari en unu jaro nur unu specon de nova produktaĵo, sed nun ĝi jam povas provfari unu specon ĉiumonate. La produktkvanto en la kuranta jaro

**Altprecizaj ebenigaj frotumaj maŝinoj produktitaj de la Ŝanhaja Fabriko de Maŝinfabrikiloj**

*Foto de Ĝang Ping*



plimultiĝis tridekoble kompare kun tiu en 1950. La profito de unu jaro kaj du monatoj laŭplane akumulata en la kuranta jaro de la fabriko kaj liverota al la fisko de la ŝtato sufiĉas por konstrui unu fabrikon samskalan, kiel la Ŝanhaja Fabriko de Maŝinfabrikiloj. Tamen, dum la dek jaroj, la ŝtato investis al tiu ĉi fabriko nur kvaronon de la sumo bezonata por nove konstrui tian fabrikon.

Multe da fremdlandanoj vizitis la fabrikon. La frotumaj maŝinoj produktitaj de la fabriko estas ekspoziciitaj en Sovetunio, Hindio, Francio, Svisio k.a., sume dek ok landoj. Dum la periodo de Lejpsziga internacia foiro en 1954, la ĵurnalo "Nova Germanio" revuis la plialtiĝon de la industria teknika nivelo de nia lando, citinte kiel ekzemplon, la precizan frotuman maŝinon produktitan de la fabriko. Iu gasto el kapitalista lando, vizitinte la fabrikon, diris malkaŝe: "Dum la vizitado, ni sentis kvazaŭ ni starus en torento, kaj ĉiumomente ni povus esti forportata de la rapida fluo. Dum tiel mallongaj jaroj, vi jam akiris tian sukceson, estas maltrankvilige ekimagi kian ŝanĝon vi faros post dek kvin jaroj!"

Sed, la plej granda fabriko de frotumaj maŝinoj sur la bordo de la rivero Huangpu, produktis dum pli ol tri jaroj ekde la fondiĝo de la fabriko en 1946 ĝis la liberiĝo de Ŝanhajo, nur kelkajn pedalmovatajn kotonmaŝinojn, draŝmaŝinojn, pakmaŝinojn movatajn per manoj, kaj pli ol dek mil pioĉojn, plugilojn, erpilojn ktp, tiel simplajn agrikulturajn instrumentojn fareblajn eĉ de la forĝejoj en la kamparo. Tiam ĝi estis branĉo de la tiel nomata "Ĉina Agrikultura Maŝina Kompanio", federacia entrepreno de Usonaj imperialistoj kaj la burokrata kapitalo de Kuomintango. Malgraŭ tio ke ĝi havis multajn precizajn



ekipajojn, multnombre da Usonaj "specialistoj", kaj koncentris pli ol 300 diplomitojn el dek tri teknikaj universitatoj de tuta Ĉinio kaj 30-40 studentojn revenintajn el alilandoj, du tutajn monatojn ĝi pasigis ekde la decido pri la farado ĝis la elfaro de la unua pioĉo. Tiam la administranto de la kompanio Lin Gi-jong kaj direktoro de la fabriko Ĉen Hi-hiang publikigis en gazetoj artikolojn fanfaronantajn ke "Oni povas multe esperi pri la prosperiĝo de la fabriko." Antaŭ nelonge iu gasto el Cejlono vizitis la fabrikon. Li ankaŭ vizitis ĝin antaŭ la liberiĝo. Post la vizitado li diris kortuŝite: "Tio, kion mi vidis, estis nur sovaĝejo. Tiam la usonanoj donacis al mi simplan modelon de agrikultura instrumento, sed nun ĉio estas konstruita." La gastoj admirege diris, "Saltego kiel en mito!"

Tio, kion postlasis la "Ĉina Agrikultura Maŝina Kompanio" estis preskaŭ nura ruino. En la komenco post la liberiĝo, la bombardado kaj blokado de la malamiko minacis nin. Ni ne havis spertojn por produkti frotumajn maŝinojn, ne havis teknikistojn kaj laboristojn kiuj iam produktis frotumajn maŝinojn . . . kaj ni komencis nian novan vivon sur tia ekstreme malfacila bazo.

Malfacile! Multaj malfaciloj kuŝis antaŭ ni. Sed dank' al la klopodado de niaj laboristoj kaj teknikistoj, finfine ni venkis la malfacilojn unu post la alia.

Per embargo k. a. malnoblaj rimedoj la imperiistoj intencis malhelpi nian landon antaŭenmarŝi al la pinto de tekniko sed ili malsukcesis. Ni jam elfaris altgrade precizajn frotumajn maŝinojn. En julio de 1958, vizitinte la Ŝanhajan Fabrikon de Maŝinfabrikiloj la negocista reprezentanto de la federacia organizado de ses anglaj kompanioj de maŝinfabrikiloj, malkaŝis sian kordoloron. Li diris: "Tute sensenca estas la embargo. La frotumajn maŝinojn kiujn ni malpermesas eksporti al vi, vi mem jam povas fari. Verdire, la embargo nur baris la vojon de eksportado al la angloj mem."

Jes, la imperiistoj firme ligis la pendigan ŝnuron ĉirkaŭ sian kolon!

Tre malfacile oni povas imagi ke tiuj kiuj elfaris precizajn frotumajn maŝinojn ne farantajn eraron de la dikeco de kelkdekono de homa haro, havas meznombre ne pli ol la kvaran rangon teknikan, kaj meznombren aĝon nur de dudek naŭ jaroj.



**Ŝou Kuej-fu (la dekstra) kaj alia laboristo-teknikisto Ĝang Ĵung-haj kune projektas altprecizan frotuman maŝinon.** Foto de Huo Ŝeng-lian

Eĉ pli malfacile oni povas imagi ke tiuj, kiuj per siaj manoj entombigis la historion ke Ĉinio ne povas elfari frotumajn maŝinojn, kiuj per siaj manoj elfaris por nia patrio milojn da frotumaj maŝinoj, estas la insultitoj kaj persekutitoj de malnova socio, kaj la homoj kiuj neniam tuŝis maŝinojn, kaj la knaboj kiuj en la komenco de la popola reĝimo ankoraŭ portis ruĝan koltukon.

Oni tute ne povus imagi ke purigisto Ŝou Kuej-fu, de la "Ĉina Agrikultura Maŝina Kompanio" antaŭ la liberiĝo, jam fariĝis nun projektanto de altprecizaj frotumaj maŝinoj. Ĝuste kiel Ŝou Kuej-fu diris laŭ sia memoro: "Tiam mi estis tre timema pri la laboro de projektado kio estas scienco tiel profunda kiel oceano. Oni diris ke por fariĝi universitata diplomito oni bezonas lerni dek ses jarojn, kaj post tio oni ankoraŭ bezonas labori dum multaj jaroj ĝis kiam oni povas projekti per si mem. Kiel mi povus fari projektadon, nur lerninte en elementa lernejo?" Tamen, li komprenis ke tio estas la konfido kaj la edukado de la partio, tial li decidis ellerni ĝin kaj mem kredis ke li certe povas ellerni ĝin. Kun tia fido, post obstina lernado, Ŝou Kuej-fu akiris nunan sukceson. Finfine, li rapide fariĝis projektisto el laboristo.

Kiel granda kaj profunda ŝanĝiĝo okazis en la Ŝanhaja Fabriko de Maŝinfabrikiloj dum la jardeko, la tre mallonga jardeko! Tio montris la disvolviĝon de la ĉina maŝina industrio, kaj la venkon de la socialisma konstruado de la ĉina popolo.

**L**A aŭto rapide kuradis. Jen kaj jen alblovigis bonodoro de rizplantoj el la kampoj ambaŭflanke de la ŝoseo. Tra la fenestro de la aŭto, ni povis vidi, ke la densaj flavaj rizplantoj jam ekverdiĝis kaj ondadas en vento; la altaj maizplantoj ombris unu flankon de la ŝoseo; la kotonplantoj altaj je unu metro, paradas kun violaj kaj bluaj floroj. La aŭto subite haltis—ni jam alvenis al la Ŝton-bova Popola Komunumo en Zitong-gubernio de Siĉuan-provinco. Ni pensis, ke ni vojeraris, ĉar ni volis veturi al regiono plagita de trosekeco, sed ni venis al regiono promesanta abundan rikolton! Descendinte el la aŭto, ni demandis al iu. Tie ĉi ĝuste estas la Ŝton-bova Popola Komunumo kiu jus suferis la plej teruran el la trosekecoj en la lastaj tridek jaroj.

Post kiam ni eliris el la aŭto, la sekretario de la partia komitato de la popola komunumo kondukis nin ĉie pririgardi. En la montetoza kamparo de 5 kvadrataj kilometroj, oni ne povis trovi unu vakan lokon, ĉie kreskis densaj grenajoj, ĉirkaŭ la domoj la ĝardenoj plenis de kukurboj kaj legomoj, kaj ĉie promenis kokaroj kaj anasaroj. Laborbrigadoj mortigis malutilajn insektojn kaj forigis herbaĉojn; en kotonkampoj, junulinoj ĉirkaŭtrancis branĉojn babilante kaj ridante; de malproksime oni aŭdis la voĉon de junuloj vokantaj brutojn dum akvumado kaj sterkado. Ĉio estas en paca atmosfero de klopodado por abunda rikolto. Tamen, la sekretario de la partia komitato de la popola komunumo diris al mi, ke de aŭtunfino de la pasinta jaro ĝis somerkomenco de la kuranta jaro, nur pluvis trifoje, sume nur malpli

Li Kaj Ju:

## Samaj trosekecaj malsamaj

ol tri milimetrojn, la trosekeco estis eksterordinare grava: la krevajoj en la rizkampoj estis ĉirkaŭ 20 centimetrojn larĝaj; en la senakvaj kampoj la tero sekiĝis kaj fariĝis bulegoj, la lagetoj plejparte senakvigis, la irigaciaj kanaletoj malhavis akvon. Sed tia eksterordinara trosekeco ne senkuraĝigis la membrojn de la popola komunumo. Ĉiuj membroj viraj kaj virinaj, junaj kaj maljunaj unuanime luktadis tri monatojn sub gvidado de la partia komitato kaj finfine ŝanĝis la stacion kaj venkis la “diablon” de trosekeco.

Transirinte montkreston, la sekretario de la partia komitato kondukis nin al maizkampoj. Montrante al ni la densajn maizplantojn altajn je pli ol du metroj, li diris: “Antaŭ tri monatoj, tie ĉi okazis batalo vektportis akvon por savi la junajn plantojn. La homa forto ja venkis la naturon, kaj la kampo de velkantaj plantoj jam fariĝis kampo altprodukta.” Antaŭe tiu ĉi maizkampoj estis kulturita de la Junula Produkta Brigado. Kiam la junplantoj estis nur kelkajn kolorojn altajn, iliaj folioj sekiĝis kaj tubiĝis. La sola metodo por ilin savi estis nur akvumado. Sed nur en la rivereto trans la monto estis akvo, kaj oni devis iri zigzage laŭ la montvojoj pli ol unu kilometron por ĝin atingi kaj alporti akvon. En la unua punkto, la brigadestro Jang Deguj kun kelkaj junuloj vektportis akvon de tie por vidi ĉu oni povas tiel akvumi la kampojn, sed ilia provo malsukcesis: Kiam ili ankoraŭ ne alportis akvon duafoje, la akvo surverŝita en la unua fojo jam elsekiĝis, tial kvankam ili portadis dum la tuta nokto, tamen la kampo ankoraŭ restis seka. En la sekvinta tago, li mobilizis pli multajn homojn por vektportis akvon. Ĉar ankoraŭ malmultaj estis la labor-

**Membroj, de Ĉengguan-a Popolkomunumo, Henan-provinco, fosas irigacian kanalon por kontraŭbatali trosekecon**

*Foto de Hju Ĝen-jeng*



# katastrofoj kun rezultoj

antoj, kompare kun la laboro kiun ili devis fari, la efiko estis malgranda.

Sciiginte pri tio, la komunumo tuj sendis homojn kaj ilojn por subteni la Junulan Produktan Brigadon. Tiu ĉi maizkampo ja estas savita per ŝvito. Nun la maizplantoj staras rekte en la kampo ege amindaj.

Ni foriris de la maizkampo, kaj preterpasis grandan pecon de rizkampo. La partia sekretario ekhaltis. Ni ĉirkaŭrigardis kaj vidis ke la rizkampo ĉirkaŭita de malaltaj montetoj vastas almenaŭ kvin-ses-dek muojn\*, la longeco de la spikoj estis sep-ok coloj, kaj kvankam nur komencante maturiĝi, ili jam klinis la kapon — jen antaŭsigno de abunda rikolto. La partia sekretario diris al ni, ke ankaŭ tiuj ĉi pli ol kvindek muoj da rizo estis savitaj el malespero. Kiam oni komencis transplanti la junajn rizplantojn, la rizkampo ankoraŭ estis plena de krevajoj. La unua brigado de la unua distrikta taĉmento, kiu kulturis la rizkamon, uzis ok grandajn akvoĉerpilojn longajn je dek ok futojn. Ili ĉerpis akvon el rivero, kaj ĝin levis pli ol dek futojn alten. Du brigadoj alterne penlaboradis senĉese tage kaj nokte. Ili tiel luktis unu tutan monaton, kaj la akvo en la rivero preskaŭ elĉerpiĝis kiam la pli ol kvindek muoj da kampo fariĝis akvoplena rizkampo kaj oni transplantis la rizplantojn.

Vespere, ni alvenis al la manĝejo de la dektria distrikta taĉmento. Ĉar estis varmege, oni metis la manĝotablojn ekstere sur la placon. Ni alvenis ĝuste je la tempo por manĝo. Tio estis ordinara vespermanĝo. Sur la tablo estis plado da fritita melongeno, pelvo da kukurba supo, unu telero da verdaj kapsikoj krom rizaĵo. Dekoj da viroj kaj virinoj, infanoj kaj plenkreskuloj sidis ĉe dekkelkaj manĝotabloj, kaj manĝis babilante. Pli ol kvindekjara maljunulino Liu kaj ŝiaj filo, bofilino kaj tri nepoj sidis ĉirkaŭ manĝotablo kaj manĝis kun bona apetito. Tiu ĉi maljuna kamparanino rakontis al ni pri sia dolora vivo antaŭ tridek jaroj: En la jaro 1929, tie ĉi okazis trosekeca katastrofego. En la kvin muoj da kampo, kul-

turitaj de ŝia familio, ili neniam da greno rikoltis, kaj la bienulo forrabis la kvin dekalitrojn da greno de ŝia familio, kiel lupagon. Ŝia tuta familio devis manĝi kuiritajn foliojn de morusarbo. La maljunaj bogepatroj malsatmortis, la edzo forfuĝis por eviti malsaton kaj neniam venis de li ia novaĵo. Kunportante la trijaran filinon kaj mamsuĉan infaneton ŝi almozpetis de mateno ĝis nokto. Granda feliĉo estis por ŝi, se ŝi povis elpeti iomete da brano. Montrante la manĝaĵojn sur la tablo per la manĝbastonetoj kaj ekrigardinte la tri grasajn nepojn bonapetite manĝantajn apud ŝi, maljunulino Liu diris al ni: "Kvankam en la kuranta jaro okazis terura trosekeco, tamen ni ankoraŭ povas manĝi tian bongustan manĝon trifoje ĉiutage. Ni tre dankas al Prezidanto Maŭ, bonan sorton ja havas tiuj ĉi infanoj. Se ilia avo ankoraŭ vivus! . . . ." En la ĝemo de tiu ĉi maljunulino, ni kvazaŭ vidis la kontraston de du malsamaj epokoj.

En la kampoj la grenoj kreskis tre prospere. Kompreneble tio ebligis nur dank' al la penado de la homoj, kiuj heroe kontraŭbatalis la trosekecon. El ili estas bravaj junuloj, diligentaj virinoj kaj laboremaj mezaĝaj komparanoj. Sed la okdektri-jara maljunulo Guo Ŝi-van nin impresis pli profunde. Antaŭ longe la komunumo jam decidis ke li fariĝu pensiulo, sed kiam oni komencis kontraŭbatali la trosekecon, la maljunulo ne

**Membroj de Ĉengguan-a Popolkomunumo, Henan-provinco, batalas kontraŭ trosekeco.**

*Foto de Tang Maŭ-lin*



volis ripozi, multfoje li petis la brigadestron de produkto asigni al li taskon. Finfine, la brigadestro asignis al li la laboron nutri du bovojn. La maljunulo ankoraŭ ne kontentis, li plektis korbon, kaj ĉiutage antaŭ sunleviĝo li eliris kolekti fekaĵon. Ĉiutage kiam li eliris, li provokis al la junuloj, kiuj ĉerpadis akvon por kontraŭbatali trosekecon. Ĉiufoje la maljunulo laŭte kriis al la junuloj starante sur altaĵo: "Antaŭ ol vi plenigos unu terpecon, per akvo, mi jam kolektos plenkorbon da fekaĵo. Venkon gajnis ofte la maljunulo. Tiamaniere, dum la tuta tempo de la batalo

kontraŭ trosekeco, la okdektri-jara maljunulo ne nur nutris la du bovojn grasaj kaj fortaj, sed ankaŭ kolektis pli ol sepcent kilogramojn da fekaĵo. Kial li tiel fervorege laboris? Antaŭ tridek jaroj, kiam okazis la trosekeca katastrofo, li ankaŭ klopodis kontraŭbatali trosekecon, sed la kamparanoj ĉiuj zorgis pri si mem, kaj lia klopodo estis vana. Kiam la trosekeca katastrofo serioziĝis, li raportis pri tio al la gubernia registaro, esparte, ke la Kuomintang-a gubernia registaro savos la mizerajn kamparanojn, sed la guberniestro, kiu zorgis nur pri kolektadi impostojn, tute

---

# Feliĉa Familio

## Ĝang Jong-ŝan k Ju De-ĉeng (laboristoj de la Unua Aŭtofabriko)

**L**A familio de kamarado Vu Dan, ĉefo de la sekureco-departemento, estas fame konata en Cangĉun, la urbo de aŭtomobiloj. En la pasintaj dek jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, same kiel la patrolando, pli kaj pli prosperiĝis la familio de Vu Dan.

En iu somera vespero, ni vizitis la Vu-familion. Grupo da infanoj, ludantaj en la sportejo sub salikarboj antaŭ la pordo, naive kaj vigle kuris al ni kaj nin ĉirkaŭis scivoleme. Ni demandis la knabinon dekdu- aŭ dektri-jaran starantan en la fronto, kiel ŝi estas nomata. "Mia familia nomo estas Vu," ŝi respondis ridante. Unu knabo ĉirkaŭ ok- aŭ naŭ-jara fingromontris unue sian razon kaj poste siajn kamaradetojn kaj diris: "Vu, Vu, Vu, Vu, ĉiuj nomataj Vu!"

Ni ridetis, rimarkante ĉe tiuj ĉi interesaj infanoj la feliĉan trajton de la granda familio.

La familio de Vu Dan estas tipa granda familio de laboristoj. Maljuna Vu Dan kaj sia edzino loĝas kune kun siaj tri filoj kaj tri bofilinoj, kvin infanoj de sia unua filo, tri infanoj de sia dua filo kaj unu infano de sia tria filo — estas familio el dek sep membroj de tri generacioj. El la dek sep anoj, Vu Dan kaj siaj tri filoj kaj tri bofilinoj laboras ĉe la Unua Aŭtomobila Fabriko. Matene, antaŭ ol ili iras al laboro, sep manĝskatoloj jam atendas ilin en la vaporumilo, kaj sur la vojo al la fabriko maljuna Vu iras ĉe la kapo de la taĉmento de sia familio.

### I

Same kiel ĉiuj feliĉaj familioj starigitaj en la nova socio, tiel feliĉa nun estas la familio de Vu Dan, sed antaŭ la Liberiĝo, maljuna Vu Dan vivis tute alie.

Li naskiĝis en Ŝandong-provinco. Lia patro estis ĉarpentisto. Kiam li estis deksesjara, la tuta familio fuĝis el Ŝanhajguan\* pro katastrofo. Vu Dan eniris kiel metilernanto en maŝinriparejon poseditan de blankruso. Tiam li komencis kontakti aŭtomobilojn, kaj ankaŭ ellernis ilin veturigi. Por vivteni sian familion, Vu Dan laboris kiel kaj aŭtomobila ŝoforo sur la tero kaj motorboata navigisto sur Songhua-rivero, sed malgraŭ tio, lia familio neniam povis liberiĝi de la sorto de malsato. La japana invado al la Nordoriento de Ĉinio de post la 18-a de septembro, 1931, instigis lian patriotismon. Poste, ĉar li kontaktiĝis kun revoluciuloj, li eksciis revoluciajn teoriojn kaj partoprenis en revoluciaj laboroj en 1933. Ekde 1925 li jam veturigis kaj riparis aŭtomobilojn, kio estis la fonto de lia vivtenado. Post lia partopreno en revolucio, la aŭtomobilo fariĝis kaj lia kunbatalanto kaj lia batalilo. Li transportis propagandajn flugfoliojn kaj revoluciajn kamaradojn per aŭtomobilo, faris revolucian aktivecon kamuflante de sia ŝofora

---

\* Ŝanhajguan (Mont-mara Pasejo), pasejo ĉe la orienta fino de la Granda Muro inter norda Ĉinio kaj nordorienta Ĉinio.

ne zorgis pri la popolo. Oni vipis kaj elpelis Guo Ŝi-van kaj la aliajn kamparanojn ekster la pordegon. De tiam li devis eliri ĉiutage por elfosi sovaĝan legomon kaj deŝiri arbofoliojn por manĝo, kaj lasi la grenojn forvelki. Hodiaŭ, kiam tia trosekeco reokazis tie ĉi, la maljunulo reakiris junulan energion. Prave diris la maljunulo: "Hodiaŭ la popolo estas la mastro de la lando, kaj ni povas venki ĉiujn naturajn katastrofojn, kial do ni ne laboru pli bone?"

\* *Muo* = 6 2/3 aroj.



**Vu Dan ĝuanta libertempon kun siaj familianoj.**

profesio. Lia nomo estis en la "nigra listo" de la policejo. La danĝera, malfacila kaj mizera vivo lin hardis. Tiutempe, lia familio estis disigita, sen iu ajn garantio por la vivo. Tial, vivante feliĉe post la Liberiĝo, Vu Dan ofte diras: "Se ne estus la gvidado de la Komunista Partio, mi ne povus eĉ sonĝi pri la hodiaŭa vivo!"

## II

Vu Dan, lia unua filo kaj bofilino, kaj lia dua filo kaj bofilino ĉiuj estas membroj de la Komunista Partio.

Lia unua filo Vu Ja-ĝoŭ estas 37-jara, maldikakreska, kun du grandaj okuloj brile ridetantaj. Li lernis nur kvar jarojn en lernejo. Kiam li estis dektri-jara li ellernis veturigi aŭtomobilon de sia patro kaj en la 17-jara aĝo, li jam komencis labori kiel ŝoforo. Li ankaŭ havas sperton de direktado de motorboatoj kaj traktoroj. Unuvorte, li estas spertulo en la fako de aŭtomobilo. La revolucia aktiveco de lia patro tiam donis al li tre profundan impreson. Li memoras, ke en tiu tempo li ne kuraĝis iri kune kun sia patro, kiun li devis nomi onklo. Lia patro estis ŝoforo, ankaŭ li estis ŝoforo de la juneco. Dum lia patro laboris por la Partio, li helpis lin de la juneco.

La dua filo, nomata Pan Hiaŭ-li, estas 34-jara. Kial lia familia nomo estas Pan? En la pasinteco, maljuna Vu Dan pseŭdonimis sin Pan Zi-hoŭ, kaj sekve lia familia nomo ankaŭ fariĝis Pan. En la malnova socio, ĉiam estis malfacile por infanoj de laboristoj frekventi lernejon. Li lernis en lernejo nur tre mallonge, kiam li devis tion interrompi kaj eklabori kiel metilernanto en iu fabriko. Ĉar li estis lerta, li ellernis fajladon, tornadon, rabotadon, kaj elektro- kaj gas-lutadon. Li ankaŭ scipovas veturigi kaj ripari aŭtomobilon.

La tria filo nomata Vu Hua, 32-jara estas la plej juna el la fratoj. Antaŭ la Liberiĝo, la plejaĝa frato diris: "Malgraŭ ĉiuj malfaciloj, mi lin subtenos por lernado en lernejo." La dua frato konsentis, dirante "Certe, certe." Tial la tria frato ne metilernis en la malnova socio, kaj post la Liberiĝo li eniris en la Specialan Lernejon de Ruslingvo.


En 1952, la parti-branĉo kunvenis por transdoni la instrukcion de la Centra Komitato de la Partio, ke estas konstruota moderna grandtipa fabriko de aŭtomobiloj. Kio? Ĉu aŭtomobilojn ni mem fabrikos en Ĉinio? Ja ĝojeginda afero! Maljuna Vu Dan kun ekscito petis la administracion lin transpostenigi al la aŭtomobila fabriko. Sed la administracio pensis ke la konstrua laboro de la fabriko estas tro malfacila por li kiu estis jam maljuna. Sed ĉar li insistis, fine li venis al la aŭtomobila fabriko. Poste, ankaŭ liaj filoj kaj bofilinoj, transposteniĝis al la aŭtomobila fabriko unu post la alia.

Post alveno al la fabriko, lia unua filo estis sendita al Sovetunio por lerni. Li ellernis la kompletan teknikon de aŭtomobila fabrikado. Nun li laboras en la instituto de Aŭtomobilo kaj Traktoro. Ankaŭ la dua filo lernis en Sovetunio, kaj nun estas vicĉefo de la teknik-kontrola departemento de la branĉofabriko de instrumentoj. La tria filo laboris kiel interpretisto de teknikaj materialoj pri aŭtomobila industrio kiam Sovetiaj specialistoj




laboris en la fabriko. Nun li ankoraŭ tradukas tiajn materialojn.

La edzino de la unua filo, Ĝan Hiu-ĝi, oficistino de la Branĉfabriko de Instrumentoj, ankaŭ laboris super aŭtomobiloj kelkajn jarojn. Ŝi ĵus revenis al la fabriko, fininte lernadon en la partia lernejo. La edzino de la dua filo, Vang Gjun, estas laboristino en la fabriko. En la tempo de la Kontraŭjapana Milito, ĉiuj ŝiaj familianoj estis mortigitaj de japanoj pro ilia aktiveco en revolucio. Tiun ĉi solecan junulinon la granda familio akceptis kun varmega koro. Ŝi ne estas multe instruita, sed tre diligenta en lernado. La edzino de la tria filo, Han Ju-lan, estas la plej juna inter la bofratinoj. Antaŭe, ŝi estis kampara knabino diplomita de elementa lernejo. Post la edziniĝo, ŝi ricevas grandan helpon ĉiurilate de la granda familio. Nun ŝi estas teknika laboristino de la premformiga fako.



### III

La familio de Vu Dan estas feliĉa kaj bela kolektivo. Ĉiumonate post kiam ili ricevis sian salajron de la fabriko, ĉiu el ili retenas dekkelkajn juan-ojn por poŝmonon, kaj transdonas la tutan restajon al la familia kaso disponata de la patrino. Ĉu estas necese reteni poŝmonon? Ili diris: "Ne havi poŝmonon estas ne oportune, ĉar oni devus peti monon de la familio ĉiufoje por aĉeti ĉu dentbroson, ĉu dentpaston, ĉu ĵurnalon, ĉu libron." Iliaj salajroj ne estas egalaj — iu ricevas pli multe kaj alia malpli multe. Ĉu ne estiĝis malkonsento inter ili pro la komunigo de ilia enspezo? Ili diras: "Ne eble! Ni estas fratoj kaj bofratinoj, kaj precipe ni estas de la laborista klaso!" Ili havas bonan financon planon. Se iu volas farigi al si kompletan da novaj vestoj, li devas antaŭe elmeti sian postulon, por ke aranĝo estu farita. Kaj ili ĉiuj estas spanemaj ili portas simplajn vestaĵojn kaj tre malofte farigas al si novajn. La plejaĝa



1. Vu Dan, maljuna patro tamen kun junula laborfervoro.
2. La unua filo Vu Ja-ĝou (la maldekstra) esploranta la funkciadon de aŭto-motoro.
3. La dua filo Hiaŭ-li (la meza) kontrolas la precizecon de dentrado.
4. La tria filo Vu Hua (la meza) interpretanta.

frato diris sprite: "Panjo estas ministro de internaj aferoj, ministro de financo, kaj ministro de eksterlandaj aferoj. Krome, ŝi estas ankaŭ vartistino kaj aĉetistino." La sep laborantaj membroj de la familio honeste laboras en la fabriko, lasante la mastrumajn aferojn al la patrino.

Ĉar tiel multaj estas la familianoj, estas neeviteble ke konflikto iam okazas. Kion ili faras se tio okazis? Multaj bagateloj en la vivo kelkfoje povas kaŭzi malkontenton. Sed se oni malkaŝeme elparolas sian malkontenton, la problemoj povas esti solvitaj post klarigo, ĝuste kiel la plejaĝa frato diris: "Nia familio kunvivas sur la bazo de memkonscio." En malnovaj familioj, konfliktoj ofte estiĝis inter bofratinoj. Tamen, tiuj ĉi tri bofratinoj estas karaj unu al la alia kiel fratinoj. La plejaĝa bofratino lertas en vestfarado. Ŝi ofte faras en libertempo vestojn per kudromaŝino por unu post la alia. La edzino de la tria frato, Han Ju-lan, ĉiam klopodas fari dommastrumajn laborojn konkure kun la unua kaj la dua bofratinoj.

En tiu ĉi familio okazas ankaŭ kunvenoj, kelkfoje kunvenetoj de kelkaj anoj, alifoje plenaj kunvenoj de la tuta familio. Kompreneble, la pliaĝaj

infanoj povas ĉeesti ĉe la kunveno kiel observantoj, sed la plijunaj bruemuletoj estas malakceptitaj. Ili kunvenas regule, ofte sub la prezidado de la plejaĝa frato. Post la malferma parolado, li prezentas la proponojn por libera diskuto. Fine li petas la patron aŭ patrinojn fari instrukciojn. En la kunveno ili aŭ diskutas pri gravaj aferoj de la ŝtato aŭ de la fabriko; aŭ faras kritikojn kaj memkritikon. Kelkfoje ili kunvenas diskuti pri la ĉiutaga vivo, studante kia estos la plej bona menuo por la sekvantaj tagoj, aŭ kies metodo por infanedukado estas netaŭga. La patro ankaŭ ŝatas ŝerci ordinare, sed li estas tre serioza kiam li parolas en tiaj kunvenoj. La patrino estas ĉiam laŭdita de ĉiuj en la kunveno. La membroj de la familio, estas komprenemaj kaj prizorgemaj unu al la alia, en atmosfero plena de amikeco.

Ĉiu ajn kiu kontaktiĝas kun tia laborista familio, ne povas ne esti ekscita de ilia anima viveco. Vidante la nunan vivkondiĉon de la familio, kiu povus imagi al si ilian mizeron en la malnova socio? Tamen, mizeregajn tagojn ili ja travivis. Kaj tio kion ni vidas ĉe ili ne estas nur ŝanĝo de unu familio, sed la granda ŝanĝo de nia lando!

---

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

---

### **Verkistoj en la komunumojn**

Multaj ĉinaj verkistoj nun iris al popolaj komunumoj kaj tie enradikiĝis por bone observi kaj sperti kaj poste per diversformaj literaturaĵoj respeguli la grandajn ŝanĝojn en la kamparo, la prosperon de ilia bonstato, la grandajn sukcesojn kaj avantaĝojn de la popola komunumo.

### **Amnestio por krimuloj**

Speciala amnestio por krimuloj estas eldonita de Prezidanto Liu Ŝaŭ-ki je la mezo de septembro antaŭ la 10-jara nacia festo de nia popola respubliko. Ĝi validas al ĉiuj krimuloj, kiuj pentas pri siaj krimoj kaj vere progresas laŭ la bona direkto, inkluzive la milit-krimulojn de Kiangkajŝek-kliko kaj de pupet-

reĝimo de Manĉuguo (Manĉurio sub Japanio), antirevoluciulojn kaj ceterajn krimulojn. Oni, laŭ tiu ĉi amnestia ordono ilin liberigos aŭ reduktos ilian puntempon por celebri la 10-jaran nacian feston, la venkon de socialisma konstruado kaj brilajn sukcesojn de la granda impeto kaj la popola komunumo.

### **La unua elektrona kalkula maŝino**

La unua rapida universala elektrona kalkula maŝino estas fabrikita en Ĉinio lastjare de Kalkula-teknika Instituto de Ĉina Scienca Akademio sub kunlaboro de aliaj institutoj. Teknikaj materialoj por la fabrikado estas ricevataj el Sovetio kaj ankaŭ Sovetiaj specialistoj

multe helpis en la fabrikado. Ekde lasta aprilo tiu ĉi maŝino jam komencis labori por multaj matematikaj problemoj en la grandskalaj konstruadoj en multaj lokoj en la lando.

### **Antikva enciklopedio reeldonita**

La plej granda antikva enciklopedio "Jongle Dadian" kompilita antaŭ 550 jaroj (vidu paĝo 87 en n-ro 3) nun estas reeldonita de Ĝonghua-librejo. La nova eldono estas fotolitografie presita laŭ la originaloj konservataj en Pekina Biblioteko kaj tiuj redonitaj de Sovetio kaj Germana Demokrata Respubliko kaj kolektitaj fotoreproduktaj. Ĝi enhavas 720 librojn binditajn en 200 volumoj, t. e. 90% de la restanta parto.

# Mia verkista vivo en lastaj dek jaroj

*La verkinto de tiu ĉi artikolo estas unu el la fame konataj malnovaj verkistoj en Ĉinio. Li multe verkis ankaŭ post la Liberiĝo en 1949. Ĉi sube, ni tradukis lian artikolon pri lia verkado en lastaj dek jaroj, el kiu la legantoj povos iom kompreni kia estas la vivo de ĉinaj verkistoj.*

— La Red.

**J**AM pasis dek jaroj de post la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko.

Okaze de la ĝojega nacia festo, eble estus oportuna momento por mi iom rememori mian verkistan vivon. En la lastaj dek jaroj, profunde min kortusis la entuziasmo al konstruado de nia popolo. Miaj modestaj verkoj nur atestas, kiel la popolo min stimulis. Kiom ĝojega estas mi! Kaj pri tio mi volas priskribi!

En la lastaj dek jaroj, mi verkis ĉefe dramojn kaj eseojn, sed ne romanojn. Kial? Antaŭ ĉio, la tempo ne min permesis. Por verki romanon oni bezonas tre longan tempon, al mi mankis pacienco ĝisatendi. Mi estas urĝema. Mi volas rapide ion verki laŭ bezono por prikanti la novajn homojn kaj la novajn aferojn. En la malnova socio, verkistoj, kia mi, krom verkado ne kuraĝis sin miksi en aliajn aferojn por ne venigi malfeliĉojn. Sed nun, la verkistoj estas trezoroj de la socio, ĉie ili estas respektataj, konsekvence ili partoprenas kun granda plezuro ĉiajn sociajn agadojn, kaj tio, malpliigis relative la tempon por verkado. Tial mi devas verki rapide. Dramoj, ĉiuokaze, ne bezonas cent mil vortojn, ĉu ne? Por ĝi sufiĉas kvar aŭ kvin dek mil vortoj. Nu, ju pli malmulte da vortoj la verko postulas, des pli rapide oni povas ĝin finverki. Mi emas urĝe ion elverki kaj deziras ke la verkoj donu tujan edifan efikon. Kaj tiun mian postulon respondas la formo de dramo.


Dramoverkado ne estas facila laboro. Eble unu, du aŭ tri jaroj estas bezonataj por iu sperta dramoverkisto elverki unu perfektan dramon. Do, ĉu mia rapida verkado ne fuŝis la kvaliton de la dramoj? Tio dependas de tio kiel oni rigardas la aferon. Kiel ekzemple, se mi vivus en socio senŝanĝa aŭ nur malmulte ŝanĝiĝanta, certe mi povus verki malrapide, tute ne zorgante pri bezonata tempo. Sed en lastaj dek jaroj, la ŝanĝiĝo de Ĉinio estis rapida kaj granda, ĉiutage kaj ĉie aperis

novaj homoj kaj novaj aferoj. Se mi pacience ĝisatendus por finverki ian grandiozan epokofaran epopeon, eble mi nenion sukcesus verki. La ŝanĝiĝo ĉe ni estas samtempe ankaŭ disvolviĝo, sed ne ia ŝanĝo nur formala. Tio kio disvolviĝas ĉiutage, neniam restas senmova, sed tuj forpasanta dum palpebrumo. Nur tiu kiu ĉiam zorge observas la disvolviĝon povas priskribi ĝian aktualajn, kaj sekve, facile kompreni ĝian sekvaĵon. Se oni ne riĉigas sian scion sekvante la konstantan disvolviĝon, sed nur atendas senfare por verki post dudek jaroj la epokan konkludon, tre verŝajne, nenian ĝustan konkludon li elverkos, sed nur forlasas sian devon stimuli ĉiam la popolon antaŭen. Homoj kaj aferoj morgaŭaj estos nur disvolviĝo de la hodiaŭaj. Se oni pagas malmulte da atento al “hodiaŭo”, vere estos malfacile por li kompreni la “morgaŭon”. Ni neniel volas per tio neglekti la pasintcon, kaj forpuŝi historian dramon, sed ni plimulte atentis pri la morgaŭo. La historion de morgaŭo ja kreas ni mem hodiaŭ.

Jes, nenian majstrajon mi verkis. Tamen, mia verkado tenas saman ritmon kun la socia vivo. Tio ĝojigas mian vivon. Mi ĉiam observas la socion atente, por ke mia plumo bone sekvu la torenton de la tempo. Limigitaj estas miaj talento kaj spertoj, tial mi ne povas profunde kompreni ĉion aktualan. Tamen, kiom mi povis kompreni, mi ĝin respegulis ĝustatempe en miajn verkojn. Per tio mi plenumis pli malpli mian devon kiel verkisto stimuli la popolon antaŭen por respondi stimulon donatan al mi de la popolo. Mi hontas, ke mi ne verkis pli bone, sed mi ĝojas, ke mi tamen ne estas postlasita longdistance post la epoko. Al maldiligentuloj la torento de la epoko ja ne estas indulgema.

Antaŭe mi ne estis lerta verki dramojn. En lastaj dek jaroj, mi verkis entute dek-kelkajn dramojn kaj libretojn, el kiuj kaj estas prezentitaj en teatroj kaj iuj estas preterlasitaj. Mi ja estas en lernado. Do produkto de senval-





Laŭ ŝe

orajoj estas neevitebla. Kiom mi malsukcesis tiom mi spertis. Tial, kvankam foje min trafis malsukceso, tamen ankaŭ en tio ne mankis al mi ĝojo. Tiu, kiu ne timas malsukceson, akiras pli da kapablo. Mi vere sentas, ke ju pli multe mi verkis, des pli bona fariĝas la rezulto. Peno ja neniam estas perfidema. Finverkinte iun dramon, mi kompreneble diskutas pri ĝi kun reĝisoroj kaj aktoroj. Ili estas fakuloj, kaj paroli kun fakuloj ĉiam alportas nerimarkite novajn sciojn. Tiamaniere mi ekkonis iom post iom la teatran arton. Tio donis al mi ankaŭ ĝojon. En nia nova socio ĉiuj volonte inici aliulojn pri siaj fakscioj. Nur se oni volas lerni, okazoj ĉie favoras. Mi nomas mian verkon "demokratia dramo". Tio signifas, ke mi bonvenigas ĉies rimarkon por ĝin plibonigi. Kompreneble, la reviziado estas afero sufiĉe peniga. Tamen, se vi tion ne timas, ankaŭ tio ĉiam donas al vi ĝojon. Cetere la reĝisoroj kaj aktoroj ne nur sincere donas sian konsilon, sed ankaŭ fervore helpas min. Sufiĉe grave malsanas miaj kruroj. Tial okazis, ke por informiĝi pri iu afero, ili ofte iris longan vojon por mi; por profunde ekkoni iun aferon, ili ofte iris al vilaĝo aŭ fabriko, kaj loĝis tie por ĝin trasperti. Dum la lastaj dek jaroj, kiom da novaj amikoj mi ekhavis! De kiom da reĝisoroj kaj aktoroj ricevis subtenon miaj demokratiaj dramoj! Ĉu tio ĉi ne estas ĝojiga afero? Kun-

laborado estas bona moro en nianova socio. Post la prezentado de dramo, la rigardintoj ankaŭ fervore komunikas al mi siajn opiniojn. Ankaŭ tio estas speco de kunlaborado.

La rilatoj inter homoj ŝanĝiĝis. Tio estas la ĉefa enhavo de miaj verkoj. Mi priskribis kiel la aktoroj, precipe aktorinoj, estis ekspluatataj kaj turmentataj antaŭe, kaj kiel ili estas respektataj kiel artistoj post la Liberiĝo en 1949. Ili ne nur ne plu estas ekspluatataj kaj turmentataj, sed ricevas eĉ honorajn politikajn poziciojn,—jes, el la geaktoroj nun estas multaj, ĉu regionaj, ĉu tutlandaj popolaj reprezentantoj aŭ membroj de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco! Jam antaŭ la Liberiĝo mi amikiĝis kun ili, sed mi neniel povis ilin helpi en aliaj problemoj, krom verki iufoje por ili iujn kanttekstojn. Nun, solviĝis ne nur iliaj problemoj, sed multaj el ili ankaŭ ricevis kulturon kaj scipovas mem verki kanttekstojn.

Mi ankaŭ priskribis, kiel la malriĉaj laborantaj popolanoj plibonigis sian vivmedion, ili ne nur liberiĝis de la subpremoj kaj insultoj de la proto-kanajloj, sed nun povas eĉ labori en loko pura kaj ne plu fiodoranta. Tio ĉi estas la temo de mia dramo "Longhjuoŭ" (Drakoliphara Defluejo). Ĝi estis kloako en Pekino, fame konata pro siaj fiodoroj, kiu alportis al la loĝantoj proksimaj ĉiam malsanon kaj suferon. Post la Liberiĝo, spite la urĝan necesecon ripari la avenuojn kaj ĉefajn stratojn en Pekino, la Pekina Popola Registaro antaŭ ĉio forigis la malbonodoran defluejon por la loĝantaro. Tio ĉi ja estas bonfaro tuŝanta ĉies koron. Malgarŭ malfacileco de la tasko, arte prezenti la fakton, tamen mi fine ilin surscenigis. Eble estetikistoj konsiderus min maniulo por malbonodoro, kiu preferas priskribi la fiodoran kloakon. Tamen, la laboranta popolo loĝanta laŭ la bordoj de la defluejo havas sian respektindan kaj noblan karakteron. Neniu devas ilin malrespekti. Se oni priskribus nur pri floroj kaj vento, neĝo kaj luno, forgesante la respektindan kaj amindan popolon, oni neniel povus forigi la malbonodorajojn, kaj ankaŭ la socio neniam povus esti bela.

En miaj dramoj mi priskribis multajn virinajn figurojn. En la malnova socio multe suferis la polojanoj, precipe la virinoj. En nia nova socio, min kortuŝegis antaŭ ĉio la altiĝo de la socia pozicio de la virinoj. En la persono de virino aŭ knabino ĝoje iranta al sia laboro mi trovis la grandan ŝanĝon de homaj interrilatoj. Viroj kaj virinoj ekricevis egalan rajton. Tian grandan ŝanĝigon mi ne povis ne prikanti! Virinoj same kiel viroj kreas la historion de la nova epoko. "La Ruĝa Korto"

verkita lastjare, "La komizinoj" kaj "La Feliĉa Familio" verkitaj en la kuranta jaro, ĉiuj tuŝis la emocian temon pri virina liberiĝo. Eble la dramoj ne estas bone verkitaj, sed mia ĝojo estas nereten-ebla.

Jes, miaj verkoj tuŝis multajn faktojn kaj problemojn, ĉar ili troviĝas ĝuste antaŭ miaj okuloj. Ilin mi vidis, mi do ne povas ne ilin priskribi. Kaj plie, mi ne povis ilin priskribi kiel apudestaranto. Sed kiel unu inter ili. Nur tiel, mi povis fariĝi lernanto de la popolamaso, kaj akiris nereteneblan entuziasmon por verkado. Se miaj verkoj ne povas esti nomataj majstraroj pro manko de artismo,

tiam kulpas nur tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe lernis de la popolamaso. For de la popolamaso, kie ankoraŭ oni povus trovi fonton por verkado? Ĉu mi povus trovi novajn homajn interrilatojn de la nova epoko, la freŝan artan formon kaj vivoplenan lingvon, nur per miaj personaj imagoj? Mi ne kuraĝas esti tiel aroganta!

En la lastaj dek jaroj, mi skribis kelkajn verkojn, pri tio mi devas danki la popolon! Ĉar estas la popolo, kiu donis al mi priskribindajn karakterojn kaj faktojn, liveris al mi koncizan kaj efektan lingvaĵon. Mi devas ĉiam ankoraŭ lerni de ili por ke mi pli multe atingu en la verkado.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ

### Vitra hom-modelo

La unua vitra hom-modelo estas finfabrikita de Ŝanhaja Medicina Model-fabriko en lasta septembro. Tiu ĉi modelo havas pli ol mil maŝinpecojn. La konstruo estas tre komplika. La ekstero de la modelo estas farita el organika vitro. Tra ĝi oni povas vidi klare la intestojn, Ĝinlo-sistemon (organismo nevidebla sed esprimebla per speciala elektra aparato laŭ ĉina medicino.), diversajn kurac-punktojn de akupunkturo kaj ostojn de la homa korpo. Se oni premas koncernan elektran butonon ĝi tuj parolas

pri Ĝinlo-sistemo, kuracpunktoj en la homa korpo. Dume la korpo kontrolata de elektrona valvo malrapide turniĝas kaj ekbrilas unu post la aliaj la ĉ. 200 kurac-punktoj.

### Enketo de dialektoj de han-lingvo

Han-lingvo estas parolata de pli ol 600 milionoj da ĉinoj kaj estas tre vaste disvastigita en diversaj regionoj, en kiuj formiĝis diversaj dialektoj. Por pavimi la vojon por disvastigi la komunan parolon kaj antaŭenpuŝi la studon de han-lingvo, la Eduka Ministerio kaj la


Lingvistika Instituto de Ĉina Scienca Akademio organizis komence de 1956 ĝeneralan enketon de dialektoj de han-lingvo en la tuta lando. Nun oni jam finis la enketon en 1822 lokoj, t. e. pli ol 91% el la laboro estas plenumitaj. 1195 raportoj pri la enketo kaj 307 lernolibroj de komuna parolo por regionoj de malsamaj dialektoj estas verkitaj.


### Pluraj mondrekordoj rompita

En la Unua Tutlanda Sportkunveno okazinta de la 13-a de septembro ĝis la 3-a de oktobro pluraj malnovaj rekordoj estis rompita de centoj da atletoj. El ili 664 atletoj rompis 106 landajn rekordojn en 844 konkursoj, kaj 7 atletoj rompis 4 mondrekordojn. Jen estas la novaj mondrekordoj kreitaj en la konkurso: 1 minuto kaj 11.1 sekundoj por vira centmetra rana naĝado, 5.11-metra meznombra distanco de la centro en la virina dumtaga milmetra kolektiva fikspunkta paraŝuta salto, 589 punktoj por po-30 pafoj je la distancoj de 50- kaj 100-metroj en la virina kuŝpafado per fusilo de malgranda kalibro, kaj fine 1,200-metroalta flugado de aeroplanmodeloj kun elektrokontrolataj motoroj.

### La vitra hom-modelo en funkcio

Foto de Jang Bo-taŭ





Gastoj el pli ol 80 landoj festas kun ni la 10-an nacifeston en la Popola Halo.

Foto de Niu Vej-ju

## Popola Ĉinio ĉie havas amikojn

*Jene estas traduko de redaktora artikolo publikigita en "Peking Review" je la 13-a de oktobro.*

— Red.

**E**MINENTAJ gastoj de okdek sep landoj tra la tuta mondo celebris kune kun la ĉina popolo la dekan datrevenon de la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio. Sur la revua podio por inspekti la popolamasan paradon en la ĉefurbo je la Nacia Jubileo, troviĝis gvidantoj de la partiaj kaj registaraj delegacioj de Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj, gvidantoj de frataj Komunismaj kaj Laboristaj Partioj, registaraj delegitoj de amikaj landoj de Azio kaj Afriko, reprezentantoj de popolaj organizaĵoj internaciaj, kaj amikoj de diversaj landoj de Azio, Afriko, Eŭropo, Sud- kaj Nord-Ameriko, kaj Aŭstralazio. La fakto ke tiel granda eksterlanda gastaro partoprenis la historian kunvenadon kaj laŭdis la atingojn de Ĉinio signifas la grandan unuecon de la socialisma tendaro, la grandan unuecon de la internacia komunisma movado, kaj la grandan unuecon de la popoloj de ĉiuj landoj. Tio estas grandega kuraĝigo kaj subteno al la popolo de Ĉinio.

Ekde la naskiĝo Popola Ĉinio jam alte taksis la kooperadon kaj reciprokan subtenon inter la popoloj de la mondo en la komuna batalo por paco, popola demokratio kaj socialismo. Je la antaŭtago de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Prezidanto Maŭ Ze-dong instruis la ĉinan popolon ke "dum la imperiismo ankoraŭ ekzistas, estas ne eble por vera popola revolucio venki en iu ajn lando sen helpo en diversaj formoj de la internaciaj revoluciaj fortoj. Eĉ se la revolucio venkus, ĝi ne povus firmiĝi."

La granda venko de la popola revolucio kaj la atingoj de socialisma konstruado en Ĉinio estas

nedisigebla de la grandega helpo de Sovetunio kaj aliaj frataj socialismaj landoj, de la simpatio kaj subteno de la tutmondaj popoloj.

Aliflanke, la venko de la popola revolucio kaj la sukcesa konstruado de socialismo en Ĉinio estas treege signifa por mondpaco kaj la komuna afero de la progresema homaro. La venka efektivigo de la kontraŭ-imperialisma kaj kontraŭ-feŭdalisma popola revolucio en Ĉinio, kaj la naskiĝo de la nova popola respubliko, rompis unu el la centraj ĉeneroj en la imperialisma kolonia regado. La inspira ekzemplo starigita de Popola Ĉinio ege fortigis la esperon kaj memfidon de la popoloj en postiĝintaj landoj, kiuj estas batalantaj por akiri sendependecon. La partopreno de nova Ĉinio en la socialisma tendaro kun Sovetunio ĉe la kapo plue pliiĝis la forton de mondpaco kaj socialismo, kontraŭ imperialismo. Popola Ĉinio firme batalas por paco kaj donas kiel eble plej multe da subteno al la luktado por nacia liberigo kaj popola demokratio en ĉiu parto de la mondo.

La ĉina popolo tre ĝojas pri tio ke ĝi povis kontribui al la afero de mondpaco kaj la progreso de la homaro en la pasinta jardeko kaj profunde dankas pro ilia simpatio kaj subteno ĉiujn niajn internaciajn amikojn. Prezidanto Liu Ŝaŭ-ki voĉigis la veran senton de la ĉina popolo kiam li diris ke la ĉina popolo certe ne estos malinda je la espero kaj subteno de niaj eksterlandaj amikoj, kaj certe sukcesos en la daŭro de ne tre longa tempo konstrui Ĉinion en grandan socialisman landon kun moderna industrio, moderna agrikulturo kaj modernaj scienco kaj kulturo.

## La semoj de



Gang Haŭ-kjuan:

*Ne foriru, ne foriru, kamarado!*

Onjo tenas manon de l' sekretario,  
ne foriru, ne foriru, kamarado!  
Por ni portis akvon kontraŭ senpluveco  
vi ŝvitante kote sur la tuta korpo.  
Frotŝirigis al vi la ĉemizo blanka,  
frotvundiĝis al vi ankaŭ ambaŭ manoj.  
Akvumite levis kapojn la plantaĵoj.  
Akvumite l' ter' fariĝis verda,  
De tagiĝo vi portadis ĝis noktiĝo,  
kaj subite diras al mi: 'ĝis revido!'  
Onjo nun la manon vian tenas,  
iri for ne povas vi laŭvole.  
Venu hejmen preni kun mi manĝon  
por konstati ĉu ĝin bone faris la manĝej'  
komuna.

**Elĉinigiĝis Laŭlum**

## Dankesprimo

Okaze de la dekjara jubileo de la Ĉina Popola Respubliko, ni ricevis multajn gratulajn leterojn kaj telegramojn de niaj legantoj, amikoj kaj frataj organizoj. Pro tio ni esprimas niajn korajn dankojn kaj reciprokas niajn sincerajn bondezirojn al la sendintoj!

**Ĉina Esperanto-Ligo**

Laŭ iu serpentuma vojeto, ni atingis rizkampon, kun dense kaj dike kreskantaj rizplantoj.

La kampo estas kvadrata kaj situanta ĉe kelkaj liĉiarboj\* apud la vilaĝo. Ĝi estas glata kaj brila kiel spegulo, kiam nenio kreskas en ĝi; sed post plantado de junaj rizplantoj, ĝi fariĝas kvazaŭ verda tapiŝo dika kaj mola.

La maja vento en la sudo kombas la rizkampon en multajn tufarojn.

Iutage ni kolektis freŝruĝajn liĉiojn apud la rizkampo, kaj samtempe absorbite rigardis la verdan ondaron sur la kampo. Tiam ni ekmemoris la korean panjon, kiu loĝas fore trans malproksimaj montoj. Ja el koreaj semoj kreskas la vasta kampo da smeraldverda rizo.

Nu, imagu, kiom longa estas la vojo trans Jangzi-rivero, la Flava Rivero, la Jalu-rivero, Ĉongĉon-rivero. . . .

Jes ja, ju pli longa la vojo, des pli alloga la rakonto kiel pura dolĉa fontakvo.

Estis printempo en 1953, tiam nia produkta grupestro ankoraŭ estis volontula armeano defendanta la pacon en Koreio. Ruĝiĝis la floroj, verdiĝis la herboj, degelis la surmonta neĝo kaj alflugis sovaĝaj anseroj. La printempo sin montris ĉie ĉe la korea fronto.

Sed, antaŭ la morto, la malamikoj ankoraŭ tagnokte maltrankviligis la koreajn popolanojn kiel sovaĝaj lupoj.

Ĝuste tiam, lia intima korea kunbatalanto, kiu batalis kun li ŝultron ĉe ŝultro, falis sub la kanonfajro de la malamikoj. Ho, ĉielo, ja tiun ĉi unu solan filon havis lia patrino kun nove pliiĝintaj blankaj haroj!

En la tranĉeo nia volontula armeano skribis leteron al la korea panjo, dirante: "Korea panjo! Via filo mortis, sed restas ankoraŭ mi, via alia filo. . . ."

Ekde tiam, verdaj poŝtacakoj seninterrompe malfermadis antaŭ ili—unu en la fronto, kaj la alia en la postfronto. Kiam ekflugis neĝeroj, la leteroj de la panjo alportis varmon al la filo, kaj kiam la montdeklivon ruĝigis rododendro-floroj, la leteroj de la filo anoncas al la panjo, ke "ĉio en paco". Tiel inter ili enradikiĝis vera amo de patrino kaj filo. Ili estas tiel intimaj kiel ram-

# korea panjo

pantaj verdlianoj al la monto, kaj flugantaj birdoj al la arbaro. Fine la volontula trupo jam devis reveni al la patrio. Tiam nia volontulo petis forpermeson por viziti la korean panjon. En iu montvilaĝo, en kiu ankoraŭ restis postsignoj de bombardoj, li trovis ŝin.

Ho, kiom da feliĉo kaj kiom da kordoloro miksita alportis al ili la subita renkonto! Nu, kion la panjo devis donaci al la filo? Ŝi cerbumis kaj cerbumis, fine ŝi prenis el grenejo manplendon da rizsemoj nove rikoltitaj kaj ĝin envolvis per ruĝa tuko dirante: "Ho, mia filo, per eĉ miloj da vortoj mi ankaŭ ne povus bone esprimi mian korsenton. Jen, kunportu, ĉi tio estas la koro de via panjo. Semu en via kampo reveninte hejmen, kaj vi povos manĝi korean rizon ĉiujare, kaj rememoros min tuj kiam vi ekprenos manĝpelveton. . . ."

Sekve, la semoj estis alportataj kiam li revenis hejmen, kaj efektive ili prospere kreskis tie ĉi ĉiujare.

Kelkaj jaroj forpasis kiel fluo en montriveretoj. Dume la semoj pli kaj pli multiĝis kaj la

semita areo pligrandiĝis ĝis dudek muoj\*\*. Kiel zorgeme nia grupestro prilaboris tiun ĉi plej frue kulturitan de li kampon! La kampeĝoj estas rondigitaj kvazaŭ kadrojn de pentraĵoj kaj la akvo en la kampo estas de tempo al tempo ŝanĝita tiel ke ĝi estu ĉiam klara kaj brila. Ĉu en tago, ĉu en nokto, ĉu en vento, ĉu en pluvo, li diligente stampadis siajn piedsignojn sur la kampon.

Nu, por tiu ĉi kampo, ĉu vi povas simple diri, ke ĝi estas nur peco da rizkampo? Ne, ĝi ja estas glaso da vino, en kiu fermentas la amikeco inter Ĉinio kaj Koreio.

Nun, ĉina filo ree skribis al la korea panjo:

"Panjo, la semoj, kiujn vi donacis al mi nun denove fariĝis smeraldverda vastajo. Ili jam spikiĝas kaj baldaŭ ekfloros. De la lastaj jaroj, la abunde rikoltitan grenon el semoj de vi donacitaj manĝas ne nur mi, sed ankaŭ ĉiuj miaj grupanoj kaj samvilaĝanoj. . . ."

Aŭdinte tian rakonton kaj rigardante tian smeraldverdan vastajon kiel ni povas ne sopiri al la malproksima panjo.

\* *Fruktarbo* (science nomita: *Nephelium Litchi*)  
*Kreskanta en Sud-ĉinio.*

\*\* *Mezurunuoj* = 6 2/3 aroj.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ


## Mijun-akvorezervejo

Mijun-akvorezervujo, unu el la plej grandaj akvoutiligaj konstruoj, komencis funkcii ekde lasta septembro. Tiu ĉi akvorezervujo situas en Mijun-gubernio ĉ. 70 kilometrojn nordoriente de Pekino. Ĝi ampleksas 200 kvadratajn kilometrojn kaj kapablas enteni 4,100,000,000 kubmetrojn da akvo. Tia konstruado ordinare bezonas unu ĝis du jarojn por preparado kaj kvar ĝis kvin jarojn por konstruado. Sed la konstruantoj finis 70% el la tuta laboro nur en unu jaro. Tial ekde lasta septembro ĝi jam komencis reteni la torrentojn de la supraj riveroj, kaj tiel savis de inundo pli ol 2,666,000 hektarojn da agroj malsupre de ĝi.

## Filatela ekspozicio

Komence de lasta septembro oni aranĝas filatelan ekspozicion en la Kultura Palaco de Laboristoj en Pekino. Troviĝas en ĝi 292 belaj poŝtmarkoj eldonitaj depost la liberiĝo en 1949. Ankaŭ la poŝtmarkoj ĵus eldonitaj por celebri la 10-jaran nacian feston estas ekspoziciataj tie.

Inter ili estas 12 specialaj poŝtmarkoj pri la popolaj komunumoj prezentantaj ilian prosperan vivon per delikataj kaj belaj desegnaĵoj. Krome oni povas vidi tie ankaŭ poŝtmarkojn dum la revoluciaj militoj kaj tiujn eldonitajn de niaj frataj landoj pri socialisma solidareco kaj pacdefendo.



# Simplaj kaj belaj fajencoj

**E**N vilaĝoj de norda Ĉinio, oni ofte vidas, sur nekolorigitaj lignaj mebloj, fajencojn kun nigra glazuro aŭ blankajn fajencojn kun nigraj desegnaĵoj el fortaj strekoj. En suda Ĉinio, oni povas vidi sur malpezaj bambuaj mebloj, fajencojn kun verda aŭ ruĝa glazuro kaj fajencojn kun pli malpli delikataj bluaj desegnaĵoj sur blanka fono. Tiuj ĉi fajencoj estas grava konsistiga parto de la popolaj metiartaj kreaĵoj. Ili estas vaste uzataj en nia kamparo. Kvankam iuj rigardas ilin kiel "krudajn objektojn", tamen ĝuste en la t. n. krudaj objektoj ordinaraj oni povas vidi la eminentan tradicion de nia popolo en farado de fajencoj.

La tradicia fajenco-farado de la popolo havas multajn avantaĝojn, kiel ekzemple, uzo de lokaj materialoj, lerta prilaboro super krudaj materialoj, prizorgo pri



**Pekla poto el Hubej-provinco.**

ambaŭ praktika bezono kaj beleco. Per siaj manoj kaj kelkaj simplaj instrumentoj la lertaj popolaj artistoj faras diversajn simplajn kaj belajn fajencojn. Ekzemple, vinkruĉo havas buŝon kun formo de konvolvula floro por ke oni povu senmese en-versi vinon. Ĝi havas sur la ŝultro ankaŭ du

orelojn aŭ kvar ringojn, kiuj faciligas portadon kaj servas kiel teniloj dum versado. La oreloj, ringoj, buŝo kaj




**Kruĉo por vino aŭ oleo el Siĉuan-provinco.**

fajencistoj ofte ornamas la potojn, per desegnaĵoj faritaj sur ili per fingro aŭ bambua tranĉilo, kiam la ekstera tavolo de blanka argilo ankoraŭ ne tute sekigis. Tia ornamado donas originalajn ornamajn efektojn kaj estas facile farebla.

En la montregionoj de norda Ĉinio, oni ŝatas uzi tragravuritajn fajencajn kapkusenojn. Ankaŭ tio estas speco de praktika kaj bela fajenco. Sur tia kapkuseno estas pentritaj tre vivecaj fiŝformaj desegnoj bluaj kaj nigre-brunaj per glazuroj kun kobalta kaj fera oksidoj. Krome, ankaŭ la ĉiutage uzataj fajencoj kiel teleroj, manĝobovloj, akvo-potoj kaj infanaj ludiloj, kiel homfiguraj "fajfiloj", "ĉevalrajdantoj" k.t.p., havas ankaŭ la supre diritajn karakterizajojn.


Fajencoj estas produktataj preskaŭ ĉie en



**Vinujo el Siĉuan-provinco**

tenilo kune kun la kruĉo mem formas artajn simetriajn, harmonian kaj variecan.

Ankaŭ la potoj por peklado estas vazoj ĉiutage uzataj. La formo de la potoj atestas sciencon en praktiko kaj la saĝon de la fajencistoj. La pekaj potoj havas ĉirkaŭ la buŝo ringforman trogeton por enteni akvon, kiu malebligas enflon de aero en la poton post surmeto de la kovrilo. Dank' al tiu aranĝo la preparata legomo en la poto ne putriĝas kaj fariĝas post fermentado bongusta peklaĵo iom acida kun freŝaodoro. La



**Kvar-orela poto el  
Ŝenhi-provinco**

Ĉinio. Havante tre grandan praktikan utilon, ili respegulas ofte la vivkutimojn kaj simplecon de la laboranta popolo. La desegnaĵojn de la popolaj fajencoj karakterizas freŝeco en formo kun serena kaj agrabla tono; kaj ilia komponado ĉiu havas sian tradician formon, tamen ĝi ne estas unuforma

kaj konservative sensanĝa. Ĉiu floro kaj herbero sur la fajencoj estas ne rigida imitaĵo de la naturo, sed artisme kreita belajo.



**Brunaj fajencaj kruĉoj k.a. el la fama fajencourbo Ithing, Giangsu-provinco**

*Foto de Giang Guo-hian*

**Kiugi:**

# DEFENDU PACON!

— Por la Zamenhofa Jaro —

**L**A 15-an de decembro ĉijare estas la centjara jubileo de la naskiĝo de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Ni ĝin celebras kun pasio.

Oni komprenas bone, ke nia majstro Zamenhof kun nobla idealo kreis Esperanton. Li esperis, ke la homoj en la tuta mondo povos interkompreni pere de Esperanto, kaj tiel ili povos eterne kunekzisti amike en mondo senmilita kaj harmonia. Por realigo de tiu ĉi sankta idealo, nia majstro alvokis nin, ke ni laboru ĉiam diligente kaj pacience, iru la vojon celitan nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, iru obstine antaŭen.

Dum 72 jaroj de post la naskiĝo de Esperanto, la tutmondaj popoloj suferis dufoje grandajn militkatastrofojn, kaj ankaŭ la samon suferis la esperantaj movado kaj idealo. Tial, milito estas la komuna malamiko de la tutmondaj popoloj kaj Esperanto.

Kial okazis la milito? Ĉu ĉefe pro la diverseco de lingvoj? Ne, tute ne. Ĝi okazis nur de la sangsoifantaj imperiistoj kaj koloniistoj, kiuj

invadis kaj ekspluatis la malpotencajn naciojn kaj landojn, kaj forrabis unuj de la aliaj koloniojn.

La historiaj faktoj kaj spertoj pruvas, ke la invada milito estas ĉiam farata de la sangsoifantaj ekspluatantaj regantoj. Ili utiligas militon por sin pliriĉigi. Sed en milito, la laborantaj popoloj sangas, mizeras kaj mortas.

Kial la sangsoifantaj ekspluatantaj regantoj povis faradi militon? Ĉefe pro tio, ke la popola forto kontraŭ milito ne estis sufiĉe granda, kaj multaj naivuloj estis trompataj de la mensogoj kaj intrigoj de la sangsoifantaj ekspluatantaj regantoj, kaj utiligitaj kiel iloj militaj. Ĉar ili ne povis klare distingi, kiuj estas la veraj krimuloj de militfaro, kiuj estas invadantaj kaj kiuj estas invadataj, kiuj estas justaj kaj kiuj estas maljustaj en la milito. Ili ne komprenas, ke batalo kontraŭ invado kaj koloniismo ankaŭ estas ne apartigebla parto de pacodefendo, ke la kaŭzo de milito povas esti por ĉiam elradikigita nur por neniigo de imperiismo kaj koloniismo.

Nun, la imperiistoj, precipe la Usonaj, ankoraŭ ludante nukleajn armilojn, konspire preparas trian



Maǔ Dun

## Antaŭparolo de

*Baldaŭ aperos "Ĉina Antologio" (1949-1959) en Ĉinio. Por ĝi k-do Maǔ Dun (plumnomo de Ĉinaj Verkistoj, verkis speciale antaŭparolon.*

de post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Ne, tute ne. Ĉar en tiun ĉi antologion estas enmetebaj nur verkoj malpli longaj, tial multaj elstaraj romanoj, longaj poemoj kaj eĉ teatraĵoj ne povis trovi lokon en ĝi. Cetere, ĉar ni intencis per la limigita nombro de verkoj respiguli laŭeble plej diversajn facetojn de la grandioza ŝanĝiĝo de nia socia vivo (inkluzive tiun de la naci-minoritatoj) dum la lastaj dek jaroj en nia lando, oni estis devigataj forlasi kun bedaŭro multajn belajn verkojn, kun similaj temoj pri vivo de laboristoj kaj kamparanoj, kiel temas la dekelkaj noveloj kaj skizoj jam enmetitaj en tiu ĉi antologio.

Ĝuste pro tio ni ankoraŭ ne povas diri ke tiu ĉi libro povos kontentigi niajn eksterlandajn legantojn, kiuj volas kompreni la grandajn ekonomian kaj kulturalan ŝanĝiĝojn de Ĉinio dum la lastaj dek jaroj. Sed ni esperas, ke ili tamen povos imagi al si la tuton el la etaj detaloj.

Ankaŭ laŭ arta vidpunkto tiu ĉi antologio povos informi al niaj legantoj nur tre malsufiĉe kiel grandan disvolviĝon kaj kiom profundan in-

**E**STAS kolektitaj en tiu ĉi antologio entute 17 noveloj, 3 skizoj kaj 21 poemoj. Ili estas elektitaj el la literaturaj verkoj abunde publikitaj en lastaj jaroj. Sed tio ne signifas, ke oni povas konsideri tiujn verkojn jam kiel la eliton de la ĉina literaturo en la dek jaroj

(Daŭrigo de p. 231)

mondmiliton, por daŭre konservi kaj plifirmigi siajn ekspluatrajton. Sekve, la milito ankoraŭ ĉi minute minacas la mondon, la civilizacion kaj la homaran vivon.

Kompreneble, en moderna interkontinentraketa nuklea milito, suferus ekstermon ne nur la soldatoj en la batalfrontoj, sed ankaŭ la loĝantoj post la batalfrontoj, ne nur la laboristoj, kamparanoj kaj aliaj laborantaj popoloj sed ankaŭ la burĝoj, kaj ankaŭ la militfarantoj mem. Tial la vivo mem postulas, ke landoj de malsamaj socisistemoj kunekzistu paco en la mondo, ke la homoj diverstavolaj, diverskredaj kaj diversideografiaj en la tuta mondo interligiĝu en granda rondo por kunbatali kontraŭ milito, defendante la mondpacon.

La nuntempe ĉefa tasko de esperantistoj en la tuta mondo ankaŭ estas pacdefendo. Ni devas ligi la Esperantan movadon forte al la movado kontraŭmilita kaj pacdefenda. Alie, Esperanto ne povos por si trovi luman estontecon kaj nia komuna idealo estos nenio pli ol vana revo, kaj ni esperantistoj estas nur vanaj revuloj.

Kion do ni, esperantistoj, devas fari konkrete en la batalado por la longdaŭra mondpaĉo? Laŭ mia opinio, estas tri ĉefaj taskoj:

Unue, ni devas senlace propagandi al niaj samlandanoj por mondpaĉo kaj kontraŭ invada, koloni-raba milito; ĝisfunde malkaŝi al ili la militintrigojn de la imperiistoj; ilin bone sciigi, ke la kulpaj militfarantoj estas nenio alia ol la imperiistoj, kaj intime kunligi nin mem kun la popolamasoj kaj dediĉi nian forton al la realigo



# “Ĉina Antologio”

la unua Esperanta libro de tia speco eldonita de k-do Ŝen Jan-bing), prezidanto de la Ligo Jen ni unue ĝin aperigas ĉi tie. — la Red.

fluon havis nia literatura movado en la pasinta jardeko. Tial, profitante la okazon, mi volus iom paroli pri la disvolviĝo en nia literaturo dum la nomita periodo.

Antaŭ ĉio, ni vidu el la ciferoj. En la jaro 1950 en nia lando estis nove eldonitaj entute 156 literaturaj verkoj, dume en 1958, 2600 verkoj (ambaŭ ekskluzive la represitajn); la eldonkvanto en 1950 estis 2,147,700 ekzempleroj, dume en 1958 — 39,364,094 ekzempleroj. En 1949 la literaturaj periodaĵoj en la tuta lando nombriĝis dek ok, dume en 1959 — okdek ses. En 1950 verkoj elstaraj vendiĝis poĵare nur en kelkdek mil ekzempleroj, dume en la lastaj du jaroj — en kelkcent mil ĝis milion kelkcent mil ekzempleroj. La Ligo de Ĉinaj Verkistoj nombris nur 401 membrojn en 1950, sed nun, ĝiaj membroj, inkluzive tiujn de la 23 lokaj filioj sumiĝas 3,136 (laŭ statistiko ĝis septembro, 1959, kaj post tiam la nombro daŭre kreskas).

Se ciferoj povas bildigi la disvolviĝon de kvanto, mi volas ja ankoraŭ aldoni, ke, kvankam tiuj ciferoj respegulas niajn grandajn sukcesojn

en la lastaj dek jaroj, tamen tiu kvanta disvolviĝo evidente ne sufiĉas por nia lando havanta 670 milionojn da popoloj! Mi volus speciale atentigi al niaj eksterlandaj legantoj la pli profundan signifon post la ciferoj, nome:

Unue, nia literaturo de la lastaj dek jaroj vere indas esti nomata literaturo servanta al la vasta popolo. Ĝi respegulas per veraj figuroj la vivon kaj spiritan fizionomion, la idealon kaj aspiron de nia laboranta popolo, kaj dank' al tio, levas ilian konscion.

Due, ĝuste pro tio, ke nia literaturo vere servas al la vasta popolo, sekve, la literatura aktivado en nia lando jam ne estas laboro sole de malmultaj profesiaj verkistoj, sed ankaŭ okupo postlabora de la vastaj popolamasoj. Kontrolinte nur la prosperon de la literatura kreado de la vastaj popolamasoj (laboristoj, kamparanoj, kadroj en komercaj entreprenoj kaj aliaj institucioj, studentoj ktp.) kaj iliajn belajn fruktojn (cent miloj da noveloj, poemoj, operoj kaj teatraĵoj, inter kiuj ne malmultaj estas eminentaj) en lastaj du jaroj, ni plene rajtas diri, ke nia literatura aktivado fariĝas jam vera nemankebla parto de la popola vivo, ne parolante jam pri tio, ke plejparto de la 3,136 membroj de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj estas ankaŭ amatoraj verkantoj. Tio eblas nur pro tio, ke nia literaturo servas al la popolo.

Trie, sekve de la amas-movada karaktero de nia literaturo, en la lastaj du jaroj amase aperis el la popolamasoj amatoraj verkistoj, precipe el la vicoj de laboristoj, kamparanoj kaj armeanoj. Tio estas senprecedenca en la ĉina historio.

de internacia malarmado kiun Sovetunio proponis al la Unuiĝintaj Nacioj lasttempe.

Due, ni devas plifortigi la kunlaboron inter la esperantistoj kaj Esperantaj organizoj en la tuta mondo, por pliprofundigi la interkomprenon inter la nacioj, kaj pli energie batali kontraŭ milito.

Trie, ni devas subteni ĉiujn subprematajn koloniajn popolojn en ilia batalo kontraŭ invado kaj koloniismo kaj por sia nacia sendependeco, por forigi por ĉiam koloniismon kiu estas la rezulto de invada kaj sklaviga imperiismo, la kaŭzo de milito.

Paco ne estas senenhava termino, ĝi devas havi realan signifon. Oni devas stari en la justa flanko. Kondamni egale la invadantojn kaj la invadatojn povas nur kuraĝigi invadon kaj ko-

loniismon, sed neniam elradiki militon. Nur kiam la tutmondaj popoloj unuiĝos, aŭdigos sian komunan voĉon kontraŭ la maljustaj militoj kaj senmaskigos la intrigistojn kiuj fabrikas streĉan atmosferon, ĉie instigas armadon kaj militpreparadon, intervenas en la internan aferon de aliaj landoj kaj fabrikas militon sub la bela nomo de paco — nur tiam oni povas akiri pacon kaj defendi la mondpacon.

Ni kredas, ke nia laboro donos pozitivajn rezultojn al la mondpaĉo kaj ankaŭ al la Esperanta idealo.

Ni celebru la Zamenhofan jaron per la laboro por mondpaĉo!

Vivu mondpaĉo!

Vivu Esperanto!

Kvare, debutis la unuaj literaturaj floroj de la nova epoko de niaj naciaj minoritatoj. Multaj el ili, ekzemple la mongoloj, tibetanoj, ujuguroj, hujoj, koreoj k. a., havas sian longdaŭran kaj brilan kulturan tradicion, sed antaŭ la Liberiĝo en 1949 pro longjara subpremiteco, ne nur maleblis al ili disvolvi la malnovon kaj krei la novon, sed perdiĝis iom post iom eĉ la brilaj heredajoj. Post la Liberiĝo, laŭ la politiko de niaj partio kaj registaro: plenforte disvolvi la kulturon kaj artojn de la naciaj minoritatoj, ni unuflanke kolektis kaj redaktis la epopeojn, eposojn, popolrakontojn ktp. de la naciaj minoritatoj, kaj aliflanke energie kulturis iliajn novajn fortojn de literatura kreado. Tial, nun ili jam havas siajn proprajn literaturajn armeojn kaj ekfloras la unuaj floroj literaturaj de la nova epoko.

La supraj kvar punktoj estas la plej profundaj signifoj kaŝitaj post la kvanta disvolviĝo de niaj

**Sun Jung :**

## Alilandaj literaturoj elesperantigitaj en Ĉinio

“Por mi tio estas certa, ke mi estas por Esperanto,” tiel skribis Lusin en la jaro 1937. “Kaj mi jam estis por ĝi de tre frue, eble de preskaŭ 20 jaroj, tamen la kialoj estis tre simplaj.—laŭ mia nuna rememoro: 1. ĉar per ĝi la tutmondaj homoj, precipe la subpremataj, povas esti interligataj; 2. ĉar per ĝi—por mia propra kariero—oni povas interkonatigi sian literaturon. . . .”

Tio estas tute vera, ke en la lastaj 40-50 jaroj ni ofte tradukis en la ĉinan lingvon alilandajn literaturajojn pere de Esperanto.

Antaŭ pli ol 40 jaroj, k-do Hujucz elesperantigis verkojn de Sovetia esperantisto, amiko de la ĉina popolo, V. Eroŝenko: *Unu Paĝeto en Mia Lerneja Vivo kaj Rakontoj de Forvelkinta Folio*. Post tio multaj noveloj, poemoj, teatraĵoj kaj prozaĵoj el diversaj landoj estas tradukitaj sinsekve ĝis nun, de ĉinaj esperantistoj pere de tiu artefarita lingvo.

Pro la baro de lingvoj, en tiu tempo literaturaj de rusaj kaj orienteŭropaj verkistoj estis kompatinde malmulte tradukitaj en la ĉinan, kompare kun tiuj de germanaj, francaj, anglaj, Usonaj kaj japanaj verkistoj, kaj esperantistoj faris sian

literaturaj aktivadoj. Mi kuraĝas diri, ke ĝuste tiuj ĉi kvar karakterizaj punktoj garantias ne nur grandajn sukcesojn akiritajn en la lastaj dek jaroj, sed ankoraŭ pli grandajn akirotajn en la estonteco.

Tiu ĉi libro estas la unua volumo de Ĉina Antologio en Esperanta traduko. La duan, trian kaj sekvontajn ni intencas ankoraŭ daŭrigi. Okaze de la eldono de tiu unua volumo mi iom koncize informas vin, estimatajn eksterlandajn legantojn, pri la nuna stato de nia literatura movado, kaj ni estos ege dankemaj se vi donos al ni kritikojn kaj konsilojn post la legado, por ke nia laboro pliboniĝu senĉese.

**Maŭ Dun**

*Prezidanto de la Ligo de Ĉinaj Verkistoj*

*Pekino, 21 Okt. 1959.*

plejebulon en tiu flanko. Ĉina novelist-esperantisto Lu Jan skribis en sia antaŭparolo al la de li elesperantigita “*Kolekto de Mondaj Noveloj*” (1927):

“En iliaj ĝardenoj literaturaj [temas precipe pri la t. n. ‘malgrandaj, malfortaj popoloj’] mi ofte trovas florojn pli freŝajn ol en tiuj de la grandaj landoj. Esperanto havas nur 40 jarojn kaj en ĝiaj bedoj jam pompas tiaj floroj superece ol en aliaj bedoj. Mi volas servi kiel kolektanto de tiuj floroj por ilin dediĉi al la legantoj, kiuj havas saman preferon kiel mi.”

Sovetio estas nia bona instruisto kaj amiko, la orienteŭropaj landoj estas niaj simpatiaj fratoj kaj estas kompreneble ke ni ĉinaj esperantistoj multe elesperantigis iliajn literaturajojn. Sube estas verkoj libroforme aperigitaj, kiuj kompreneble estas ne kompletaj: (La unuopaj pecoj aperigitaj en periodaĵoj estas ne aparte nomeblaj, kaj ni devas simple forlasi.)

El Rusia kaj Sovetia literaturoj estas tradukitaj *La Kapitanfilino* kaj *Eŭgeno Onegin* de A. S. Puŝkin, *La Portreto* de N. V. Gogol, *La Sieĝo de Sebastopolo* de L. Tolstoj, *Fabeloj al Heleno* de D. M. Sibirjak, *La Morto de Danton* de A. N. Tolstoj, *Poemoj de V. Majakovskij*, *Elektitaj Poemoj Estonaj*, k. a.



### Kelkaj el la ĉinigitaj libroj el Esperanto

El orienteŭropaj landoj, kies lingvojn preskaŭ neniu sciis antaŭ dek jaroj en nia lando, kaj el kies lingvo oni povis traduki nur pere de aliaj lingvoj, la literaturaĵojn siatempe tradukis en la ĉinan ĉefe esperantistoj. El bulgara literaturo estas tradukitaj rakontoj, noveloj kaj poemoj de I. Vazov; *Noveloj de G. P. Stamatov*; *Baj Ganju* de A. Konstantinov, *Elektitaj Rakontoj de Elin Pelin*; *Septembro* de Geo. Milev; la ĵus antaŭ nelonge eldonita *Tra la Ventego* de H. Smirnenski; k. a. El ĉeĥoslovaka literaturo ni havas *Elektitaj Ĉeĥoslovakaj Poemoj*; *Elektitaj Ĉeĥoslovakaj Noveloj*; *Muta Barikado* de J. Drda kaj *Ĉina Rideto* de M. Pujmanova (ambaŭ el manuskripto de Esperanta traduko) k. a. El hungara literaturo estas tradukitaj *Johano la Brava* kaj *40 Poemoj de S. Petofi*; *Noveloj de F. Herczeg* k. a.; el la jugoslava — *Konfeso* de M. Pogaĉiĉ, *La Ringludo* de D. Ŝimunoviĉ, k. a.; el la pola — *Noveloj de H. Sienkiewicz*, *Marta* de E. Orzeszko, *La Fundo de l' Mizero* de W. Sieroszewski, *Noveloj de J. Korczak*, k. a.; el la rumana — *Noveloj de I. A. Bratescu-Voinesti*, *Sonorilo kaj Kanono* (ne presita libro-forme) de E. Isac, k. a.

En aparta kolekto aperigita kun titolo *Hebreaĵ Rakontoj* estas prezentitaj *Ŝalom-Aleĥem*, I. L. Perc, D. Pinski kaj J. Tajĉ.

Relative malmulte estas literaturaĵoj tradukitaj el okcidentaj landoj pere de Esperanto. Tamen ni povas noti la jenajn: *La Floro de la Pasinto* de itala verkisto F. de Amicis, *La Blankĉevala Rajdanto* de germana verkisto T. Storm, *Sango kaj Sablo* de hispana verkisto V. B. Ibañez, *La Mondo Ne Havas Atendejon* de Nederlanda verkisto Maurits Dekker. El japana literaturo estas nomeblaj la teatraĵoj de Ujaku Akita: *Danco de Skeletoj* kaj *Nokto ĉe Landolimo*.

Inter la tradukaĵoj de originalaĵoj de esperantistaj verkistoj estas *Printempo en la Aŭtuno*,

*Viktimoj*, *Nur Homo* k. a. de J. Baghy, *Abismoj* de J. Forge. Aliaj esperantaj verkistoj, kies verkaĵoj estas tradukitaj kaj aperigitaj aŭ en periodaĵoj aŭ en kunmetitaj kolektoj estas: K. Kalocsay, M. Ljubin, J. Flamo, H. M. Ĥrima k. a.

Dank' al struktura supereco de Esperanto beletristikaj verkoj tradukitaj en ĝin estas pli fidelaj al la originalo kaj pli bone konservas la originalan stilon. Plie Esperantaj tradukistoj havas eblecon ricevi helpon el la koncerna lando por venki eventualajn malfacilaĵojn en sia laboro. Tio estas du avantaĝoj de traduko farita pere de Esperanto. Menciinda estas ankaŭ la metodo de internacia kunlaboro de esperantistoj el malsamaj landoj por enkonduki reciproke literaturajn trezorojn. Unu el miaj esperantistaj amikoj kun la helpo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj tradukis el manuskripto de esperantaj tradukoj kaj nun ankoraŭ same tradukas jenajn verkojn de ĉeĥoslovakaj klasikuloj: *Silesiaj Kantoj* de P. Bezruč, *Bukedo* de K. J. Erben kaj *La Kantoj de Sklavoj* de S. Ĉeĥ. Jam de dek jaroj ili kunlaboras tiuflanke. Tiu rekta traduko el Esperanta manuskripto malfermas novan vojon al literatura transplantado, en kiu Esperanto ludas kvankam nur rolon de pontlingvo, tamen multe akiras al si prestiĝon inter la legantoj. Kiel la spertoj montris, la populariĝo de Esperanto en nia lando multe ŝuldas al la tradukaj laboroj de esperantistoj super literaturaj verkoj alilandaj.

(Daŭrigo de p. 237)

la Rigan golfon. En Cesis oni renkontiĝis kun lokaj gesamideanoj. La renkontiĝo estis tre gaja kaj gastama.

La tendaron vizitis ankaŭ kamarado S. Sariĉev el Moskvo. La malfermon de la tendaro kaj la vivon en ĝi fotografis por dokumenta filmo la latva fotoamatoro esperantisto Aleks. Straŭtmanis, la patro de Aija.

Pri la organizo kaj ĉiuj aranĝoj de la tendaro precipe zorgis la latvaj studentino Biruta Kondrats, docento Alberts Lapinš, lektoro Ervins Mozerts k. a., pro kio ĉiuj partoprenintoj en la tendaro estas tre dankaj al ili.

Jam nun oni planas venontjare okazigi la duan similan tendaron en Estonio aŭ Litovio, pri kio zorgas la estona, latva kaj litova delegitaro, elektita dum la dua studenta kantfesto en 1958. Tiu ĉi delegitaro entute koordinas la studentan Esperantan movadon en ĉebaltaj respublikoj.

Albinas Vebeliūnas

# Esperanto marŝas



## Esp-a Rondo de la Hungara Ĉina Amikeca Societo

En Budapeŝto oni fondis Esperantan Rondon de la Hungara Ĉina Amikeca Societo por subteni la amikecan kontakton en kulturaj kunlaboroj inter Ĉinio kaj Hungario. En tiu rondo kunlaboros ĉiuj hungaraj esperantistoj aprobantaj la celon, kaj k-do Balkanyi energie laboras por ĝi. Je la 14-a de lasta septembro fakrondo "Konkordo" invitis nian malnovan amikon J. Kiraly prelegi pri sia vojaĝo, spertoj, Esperanta vivo en Ĉinio. Jen valora laboro esperantista por amikigi la hungaran kaj ĉinan popolojn.

## 50-jara jubileo de Ints Ĉaĉe

Je la 1-a de lasta julio geesperantistoj en Riga festis la 50-jaran esperantistiĝon de K-do Ints Ĉaĉe. Kunvenis 40 gekama-

radoj. K-do Jaŭnvalks unu el la prezidantaro de la jubileo raportis pri personeco kaj agado de K-do Ints Ĉaĉe, k-dino Ludmila Jevsejeva dediĉis specialan poemon al la jubileo. Venis ankaŭ multaj salutleteroj de la neĉeestintoj.

## Uberlandia Esperanto-Klubo en Brazilo revigliĝas


Ĵus venis informo el Brazilo pri la antaŭe dorminta Esp-Klubo, ke ĝi revigliĝas ekde la 18-a de lasta aŭgusto. Estraro estas elektita. S-ro Sincero Borges da Silva estas ĝia prezidanto. Kvar elementaj Esp-aj kursoj estas organizitaj. Internacian ekspozicion la klubo ankaŭ okazigos je la fino de kuranta jaro por la glora Centjaro de la naskiĝo de Zamenhof. Multaj gesamideanoj tie deziras korespondi kun esp-istoj en Ĉinio.

## Uberlandia Esperanto-klubo ĉe Radio Educadora de Uberlandia okaze de la revigliĝa kunveno.



## Jubilea Medalo de Zamenhof

Skulptis: J. Goslawski, eldonis Pola Esperanto-Asocio, diametro: 70 mm., prezoj: 5 \$US por la bronza kaj 6 \$US por la arĝenta (ambaŭ kun skatolo) mendebla ĉe: Pola Esperanto-Asocio, Warszawa, Nowy Sviat 27, Polando.



Bareliefo de la medalo



Surskribo sur la dorsflanko

## TKEA alvokas al kuracistoj-esperantistoj

Lastatempe Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio publike alvokas al ĉiuj kuracistoj-esperantistoj, ke ili devas montri la maturecon kaj utilon de Esperanto por apliki en la nuna progresanta medicino, diskonigi la lingvon, instigi la lernadon, varbi subtenantojn en kuracis-

taj rondoj, ĝin enkonduki en internaciajn kongresojn kaj eldoni per ĝi verkojn kaj vor-

tarojn medicinajn. Ĉiuj interesiĝantaj kuracistoj-esperantistoj kontaktiĝu kun sekretario de

tiu asocio! Adr.: D. Maria JARNUSZKIEWICZ, Pollando Krakovo str. Mazowiecka 69.

## La Unua Pactendaro de Studentoj-esperantistoj en Tri Ĉebaltaj Landoj en USSR

Ekde la 1-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1959 en Latvio (Sovetunio), ĉe la pitoreska lago Balteza inter la pinarbato 20 km. de la latva ĉefurbo Riga, okazis la Unua Pactendaro de studentoj-esperantistoj el ĉebaltaj landoj Latvio, Estonio kaj Litovio. La tendaron organizis la studenta Esp-rondo de Latva Ŝtata Universitato. Ĝin partoprenis 25 geesperantistoj de Riga Universitato, Tallina Politeknika Instituto, Tartu-a Universitato, Moskva Energetika Instituto, Vilnjus-a Universitato kaj Kaŭnas-a Politeknika Instituto, inter kiuj kelkaj nestudentoj

diversaĝaj (la plej juna 12-jara estono Rāts Urmas).

La malfermo de la tendaro okazis tre impone. Ĝin partoprenis ankaŭ multaj esperantistoj nestudentoj el Riga. La plej juna latva esperantistino, sepjara Aija Straŭtmanis levis la verdan standardon de la tendaro. Sekvis kortuŝaj Esperantaj paroladoj kaj poste la unua komuna tagmanĝo.

La tempo en la tendaro pasis tre interese, kaj amuze kaj estis fruktodona por la interproksimiĝo kaj interfratiĝo de la partoprenintoj el najbaraj Sovetiaj socialistaj respublikoj.

Dum la tendado okazis la kunveno de tendaranoj-studentoj, kiuj diskutis la problemon pri la kunlaborado de studentoj de superaj lernejoj en la ĉebaltaj landoj. La tendaranoj kolektive aŭskultadis la Esperantajn radiodissendojn de la Pola Radio el Varsovio pri la 44-a kongreso; cetere dufoje partoprenis la kunvenojn de la Esperanto-Rondo en Riga. Okazis kvar ekskursoj por konatiĝi kun la plej famaj lokoj de Latvio. Oni vizitis la antikvan kastelon Sigulda kaj ĝia ĉirkaŭaĵoj, nomatan "Latva Svisujo"; la urbeton Cesis kaj

(Daŭrigo sur p. 235)



## SUR NIA LIBROBRETO

**15 jaroj da popola regado de Bulgario** — broŝuro kun formato de 14 × 20 cm., kaj 91 paĝoj montras panoramajn progresojn de nova Bulgario en lastaj 15 jaroj depost la popola regado. Ĝi dividiĝas en kvar ĉapitroj, nome: "Disvolviĝo de la industrio", "Disvolviĝo de la terkulturo", "La disvolviĝo de l' transporto kaj la komunikado", "Materiala kaj kultura stato de la laborhomoj en Popola Respubliko Bulgario" kaj konkludaj vortoj "La bulgara popolo batalas por paco kaj amikeco

inter la popoloj". La broŝuro ne estas ampleksa kaj nek ion pretendas, sed rakontas nur simplajn faktojn kaj statistikajn ciferojn. Tamen ĝi donas klaran kaj konvinkigan bildon pri la alta ritmo de socialisma konstruado ĉu en industrio, ĉu en agrikulturo, pri la rapida altiĝo de la bonstato de la laborhomoj. Ĝi do estas tre bona gvidlibro por tiuj, kiuj volas ricevi sciojn pri progreso en ĉiuj flankoj en Bulgario kaj konvinkiĝi, ke la popola regado ja garantias tian altritman progreson.

Majorie Boulton: **Virino ĉe landlimo** - kvina libro de KOKO-serio. En ĝi troviĝas 15 originalaj drametoj kaj skeĉoj kun dediĉo al Julio Baghy. 196 p., 13 × 21 cm., bindita kiel la antaŭe eldonitaj en la serio. Prezo: 14 d. kr.=2 US\$=28 steloj.

Ĝi estas la unua drama libro de la fruktoriga poetino, tamen la enhavo estas sufiĉe mizera. El la drametoj eble "Virino ĉe landlimo" kaj "Liberiĝo" plej trafe esprimas la ideon de la aŭtorino. El la unua drameto la aŭtorino priskribis paron de geamantoj apartenantaj al du malsamaj nacioj tamen najbaraj. Kiam ili rendezuis ravige ĉe la landlimo, alia viro, malsukcesa amanto de la sama knabino, alvokis landlingardistojn kaj ilin instigis mortigi la amaton de la knabino, pretekstante, ke


li estas spiono de la malamika lando. Fine la knabino frenezigis, same ankaŭ la ĵaluza viro pro riproĉo de la konscienco. Per tia priskribo la aŭtorino propagandas pri "civitano de la tero" kaj kondamnas ĉian patriotismon, ne distingante la vere kondamnindan invadan ŝovinismon de la pacama justa nacidefendo. En drameto "Liberiĝo" la aŭtorino priskribas la naciliberigajn partizanojn egale brutaj kiel la invadantaj faŝistoj kaj filozofas ke sufero bestigas kaj tiel estiĝas la senĉesa ĉeno de sufero, venĝo kaj sufero. Ŝi tute ignoras la fakton, ke nur invadaj militoj bestigas kaj naciliberigaj, nacidefendaj partizanoj kiuj estas la popolo mem ne povas estiĝi pro sufero kaj perforti siajn kunsuferantajn fratinojn.

**Mil papergruoj** — scenario de japana filmo kontraŭ atom- kaj hidrogen-bomboj. Oni priskribis en ĝi iu japana knabino Sadako infektita de atoma malsano metis sian tutan esperon al la faldado de mil papergruoj, kio, laŭdire, resanigus la malsanon. Ankaŭ la samlernejoj ŝin helpis. Sed la fatalo ne estas evitebla. Tre kortuŝa legaĵo. Esp-igis TANAKA-Sadami, eldonis: Hiroŝima Esperanto-Unuiĝo, ĉe s-ro TUTIYA-Tetuo, Minami-mati 2-465, Hiroŝima, Japanio.

**Ekskurso en nombroj** — 10-paĝa broŝuro propaganda pri dozena sistemo (dekduo-sistemo).

**La Esperanta traduko de la Malnova Testamento** — Dekbiblia konkordanco de 518 diskutindaj versoj. XII plus 57 paĝoj, formato: 14.5 × 20 cm. Verkis kaj eldonis D. B. Gregor En komisiio ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen, prezo gld. 2.10 aŭ angl. ŝil. 4/-.

## NOVAJ LIBROJ EL ĈINIO!



### Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko

Kataloga albumo de ĉinaj poŝtmarkoj. Formato 19 × 26.5 cm., 88 pĝ. Tole bindita. Prezo: Rb. 6; gld. 4.25; US\$ 1.20; £0-8-6.

### Mi volis viziti lernejon

Bildrakonto pri vivo de malriĉa kamparana knabo. Formato: 17.6 × 12.8 cm., 76 bildoj kun plurkolora kovrilo. Prezo: Rb. 0.80; gld. 0.50; US\$ 0.15; £0-1-0.

### Por nova afero, nova maniero

Kolekto de 12 nuntempaj ĉinaj noveloj pri diversaj facetoj de la lukto kaj spirita fizionomio de ĉina popolo. Formato: 13 × 18¾ cm., 202 pĝ. Prezo: Rb. 2; gld. 1.50; US\$ 0.45; £0-3-0.

### Homo

8 plurkoloraj il. pk. pri la aktuala vivo de ĉina popolo, desireblaj, en broŝuro, kun bildkovrilo. Prezo: Rb. 0.80; gld. 0.50; US\$ 0.20; £0-1-0.

### Ĉina Antologio

Kolekto de nuntempaj verkoj de pli ol 30 ĉinaj poetoj kaj novelistoj. La enhavo ampleksas 10 jarojn (1949-1959). Formato: 15.3 × 28 cm., en bela bindo kun ĉ. 400 pĝ., inkluzive bildojn, inter kiuj tri estas koloraj. Baldaŭ aperos.

### TUJ MENDU

ĉe niaj perantoj, UEA, la libroservo de la landaj Esperanto-organizoj aŭ rekte ĉe Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio!

# INDEKSO DE EPĈ 1959

(La titoloj kun "\*" estas informoj el "Kurantaj aferoj")

## EKONOMIAJ KONSTRUADOJ:

	paĝo
10,700,000 tunoj da ŝtalo .....	3
Malpeza industrio de popolaj komunumoj	4
Evento en ŝtalprodukta industrio . . .	5
Vizito al Panju-gubernio .....	7
*Viceprezidanto Ĝu De elkreskigis grandajn kukurbojn .....	8
La popola komunumo de Hjuŝuj .....	12
Al la pinto de tekniko .....	14
Nova ferŝtala bazo en Vuhan .....	16
*Aŭto por dezerto .....	33
*Fluohaltigo de la Flava Rivero .....	33
*Traksternado de Lanĝou-Kinghaj-Fervojo	33
*Kaŭĉuka lagro .....	33
Grandaj produktaĵoj per malgrandaj maŝinoj .....	46
La verda Granda Muro .....	46
*Agrikultura ekspozicio .....	59
*Disetendiĝo de poŝta kaj telefona retoj	65
*Guanghi-Gujĝou-a Fervojo funkciigis ...	65
*Bazo de elektro-industrio .....	76
Sukcese plenumiĝis la Unua Kvinjara Plano de Ekonomia Konstruado kaj la dua komenciĝis per antaŭensaltego ...	80
*Du grandaj enlandaj havenoj .....	87
*Fluigo de Suda akvo al la nordo .....	100
Aŭto-industrio en Ĉinio .....	120
La granda antikva kanalo en rekonstruado	121
Sur la tero de la patrio .....	147
Plenumo de kvinjara plano en du jaroj	149
Grandaj paŝoj de nova Ĉinio en industrio kaj agrikulturo .....	150
10 jaroj de Kajluan-karbonejo .....	153
Dekjara konstruado de agra akvoutilito	154
Grandioza jardeko .....	196
Vivu la popola komunumo! .....	209
La Ŝanhaja Fabriko de Maŝinfabrikiloj .	216
*Mijun-akvokonservejo .....	229
*La unua elektrona kalkula maŝino .....	223

## KULTURO, EDUKADO:

Impete disvolviĝas la ĉina edukado .....	22
*Han-lingva ĵurnalo kun fonetika skribo .	33
*600,000 libroj en buji- kaj miaŭ-lingvoj .	65
*Valora antikva enciklopedio represota ..	87
*Tri grandaj han-lingvaj vortaroj .....	87
*A. Mickiewicz konigita per Esperanto ..	101
*Esploroj pri ĉina nacia muziko .....	123
*Biblioteko de valoraj historiaj dokumentoj	125
*Ĉinaj sciencistoj honoritaj de la Scienca Akademio de USSR .....	133
*La kreskado de scienca studentaro en Ĉinio .....	151
*Novaj koncerne al la ĉina simio-homo	166

*La 4-a listo de simpligitaj ĉinaj ideografiaĵoj .....	166
*Du grandaj verkoj de ĉina medicino ....	185
*Antikva enciklopedio reeldonita .....	223
*Enketo de dialektoj en han-lingvo .....	226
*Vitra hom-modelo .....	226

## LITERATURO, ARTO:

Ĉielen kaj oceanen ( <i>poemo</i> ) .....	4
Tipa ekzemplo ( <i>novelo</i> ) .....	20
Tri en mateno kaj kvar en vespero ( <i>fablo</i> ) .....	26
Nove interkonataj kamaradinoj ( <i>novelo</i> )	50
Ora fenikso ( <i>fabelo</i> ) .....	53
Kontento ( <i>fabelo</i> ) .....	55
Poemoj de Prezidanto Maŭ Ze-dong ....	56
Poezio kaj pentroarto en filmo .....	82
La delikataj metiartaĵoj el lako .....	92
Mi kaj Malgranda Huang ( <i>novelo</i> ) .....	93
La fruktoj ne frapu al viaj kapetoj ( <i>poemo</i> ) .....	94
Lerni plugadon ( <i>infan-kanto</i> ) .....	94
Ĉiuj ĉinoj ŝtaliĝas ( <i>poemo</i> ) .....	95
Rakonto pri rizo ( <i>legendo</i> ) .....	96
Orangutanoj ( <i>fablo</i> ) .....	98
Putorano kaj marĥelonio ( <i>fablo</i> ) .....	99
*"La Kajto" prezentigis en Pekinaj kinejoj	125
*Bibliotekoj de ĉinaj popolkantoj kaj popolrakontoj .....	125
La maljuna ĉeflaboristo ( <i>novelo</i> ) .....	128
Mi volus fariĝi amema birdeto ( <i>poemo</i> ) .	131
*Longa pentraĵo sur rulvolvajo .....	133
Hieraŭ ( <i>humora dialogo</i> ) .....	171
Luna nokto ( <i>poemo</i> ) .....	172
En la granda familio de l' patrio ( <i>poemoj</i> )	176
Ĉajvang kaj demono ( <i>popola rakonto</i> ) ...	179
La ferpentraĵo .....	182
*Edenon ni starigos sur la tero .....	185
*Filmo pri argilstatuisto Ĝang .....	185
Mia verkista vivo en lastaj dek jaroj ...	224
Ne foriru, ne foriru, kamarado! .....	228
Simplaj kaj belaj fajencoj .....	230
*Verkistoj en la komunumojn .....	223

## POPOLA VIVO:

La brila ĉina medicino kaj farmacio ...	18
Maljuna ŝafisto fariĝis profesoro .....	20
*Scienco de flegado laŭ ĉina medicino ..	33
Por vivo riĉa kaj diverskolora .....	39
En lando de poezio .....	40
Scienco de birdolingvo .....	48
Unu tago en Ruĝ-flaga Komunumo .....	75
La printempo en Lhasa .....	84
Vangfuging — unu el la Pekinaj stratoj .	88
"Juna pioniro" kvardek-jara .....	89

*Ĉina sportisto atingis la ĉampionecon pri tabloteniso .....	101
*Nova mondrekordo de pezlevo .....	101
Lumo brilas en Tibeto .....	112
Kiu meritas la simpation .....	114
Medalo kaj pelto .....	117
Ĉen Ging-kaj—sesfoja rompinto de la monda rekordo .....	124
Kanto de la edzino .....	126
La saŭcitaj bambuĝerĉoj de Tongguan .	127
Junularo kuraĝa por fari ĉion .....	160
Nova etapo de virina movado en Ĉinio .	162
Nekonata gasto .....	165
Lin Hong-hi—metiartisto .....	180
Samaj trosekecaj katastrofoj kun mal- samaj rezultoj .....	218
Feliĉa familio .....	220
*Amnestio por krimuloj .....	223
*Filatela ekspozicio .....	229
*Pluraj mondrekordoj rompitaĵoj .....	226

### FUNDAMENTAJ SCIOJ :

La kulturo de la epoko de la Militantaj Regnoj .....	28
Kurso de ĉina lingvo .....	30, 68
Kinghaj—loko aminda .....	42
La lianokabla ponto en Luoĵu .....	45
Printempa orkideo .....	62
Filatelio en Ĉinio .....	64
Kin-imperio .....	66
Gujĝoŭ-provinco .....	90
La maj-kvara patriota movado .....	98
*Subtera maro trovita .....	100
*Ankaŭ Gansu-provinco produktas urso- katon .....	133

Rakonto pri la eniro en Tibeton de princino Ven-ĉeng .....	134
Kampano milito fine de Kin-dinastio .	136
60 jaroj de unu strato en Pekino .....	156
Ovo-insulo en Kinghaj-lago .....	184

### AMIKECO, PACO :

Grandioza himno internaciisma .....	10
Floru Ĉinio .....	24
Defendu la homajn rajtojn .....	50
Al niaj ĉinaj fratoj .....	58
Ĉina kaj japana vespero en Ĉeĥoslovakio	59
La interesiĝo de francoj pri Ĉinio .....	60
*Braille memorata .....	65
Ĉinio kaj Afriko .....	79
Por paco en Sud-Azio .....	125
Ponto trans Jangzi .....	130
Popola Ĉinio ĉie havas amikojn .....	227
La semoj de korea panjo .....	228

### PRI ESPERANTO K.A. :

D-ro Todorov en Pekino .....	32
Korespondi deziras ....	33, 69, 106, 142, 190
Sur nia librobreto	34, 70, 104, 141, 189, 237, 238
Esperanto Marsas ..	67, 102, 140, 186, 236, 237
“Nuntempa Bulgario” pli koloriĝas ....	104
La 44-a Universala Kongreso .....	111
“Vietnamio Antaŭenmarsas” .....	138
Maja vespero kun gastoj esperantistaj ..	138
La bela sonĝo de l' homaro efektiviĝas ..	195
Alilandaj literaturoj elesperantigitaj en Ĉinio .....	234
Antaŭparolo de “Ĉina Antologio” .....	232
Defendu pacon! .....	231

## TUJ ABONU KAJ REABONU E. P. Ĉ. - N POR 1960


Ĉe niaj esperantistaj perantoj, perantaj librejoj, Universala  
Esperanto-Asocio aŭ ĉe ni rekte.

### La nova tarifo de E.P.Ĉ. por 1960-jarabono

Anglio:	0-5-0	Francio:	350 Fr. fr.	Nederlando:	2.50 gld.
Argentino:	30 Ar. pes.	Germanio-okc.:	3 DM.	Norvegio:	5 N. kr.
Aŭstralio:	0-6-0 A£	Italio:	420 Lir.	Sovetunio:	6 Rb.
Belgio:	34 B. fr.	Japanio:	250 Yen	Svedio:	3.50 S. kr.
Brazilo:	80 Kr.	Jugoslavio:	300 Din.	Svisio:	3 S. fr.
Danlando:	5 D. kr.	Kanado:	1.00\$	Usono:	1.00\$
Finnlando:	250 FM.	Meksikio:	0.80\$	Aŭ 9 rpk.	

La administracio de “El Popola Ĉinio”





## PEKINO JUNIĜAS

1. La Muzeo de la Ĉina Popola Revolucio altas je 94.7 metroj.
2. La Domego de Elmigrantaj Ĉinoj.
3. Domegoj elkreskis interne de Fuhing-pordego.
4. La malnova aspekto de la sama strato en 1958.
5. Parto de la nove konstruita loĝkvartalo ekster Fuhing-pordego.

*(Fotoj de Hinhua-novajagentejo)*



花開天下暖  
花落天下寒  
年丰故產糧  
突破萬斤裝

一九五六年一月一日  
作於首都  
張健

